

JAN HUS  
(JOHANO HUS)

AŬTORO EVA KANTŬRKOVÁ

fragmentoj el la samnoma libro por elektronika publiko  
esperantigis ĉeĥaj esperantistoj  
(2005 - 2015)

## **JAN HUS (Magistro JOHANO HUS) – antaŭparolo**

Estas „la jaro de Jan Hus“ (2015) – tion scias (preskaŭ) la „tuta mondo“.

Ni finpretis jenan projekton – kiu aktuale kongruas kun la „konjunktura“ temo; granda temo! Jam antaŭ 12 jaroj, kiam mi unufoje havis la libron „JAN HUS“ de Eva Kantůrková (eld. Melantrich, 1991), mi pripensis, ke ĝuste pri tiu „heroo“ de la ĉeĥa historio sciuj (almenaŭ la esperantista) mondo. Por la eventuala eldono ni, naivuloj, komencis traduki la tekstojn de tiu-ĉi grava libro-eseo. Jen – nun la tekstoj troviĝis en la „malsupraj kestoj“ - kaj ni povas (en la „virtuala universo“ ) kongruiĝi kun la ĝenerala tendenco.

La eseo estas eksterordinare malfacila legado (mi opinias, ke pro la „plektita“ esprimstilo de la aŭtorino), kaj ni konsciiĝas, ke ne estas multaj interesiĝantoj, do ni ne daŭrigis la tradukon de la tuta libro, sed nur 3 ĉapitrojn, kiuj laŭ nia opinio ŝufiĉas por klarigi „pri kio temas“... Ni estas dankemaj, ke ni en la 3-a, (2008/ IDEAL-eldono) trovis la kompletan de recenzoj, kiuj en la Melantrich-eldono (1991) ne estis. Eble proponitaj „Editoraj anticipoj“, „provokas“ nin tralegi la tekstojn el la libro. Kompreneble, ke oni ne povas bildigi tiun-ĉi epokon sen ĉiuj gravaj eventoj kaj sen la personoj, kiuj ludas same gravan rolon. Tial ni taŭge aldonis eseon pri Jeroným Pražský (Hieronimo el Prago), pri kiu prelegas Oldřich Arnošt Fischer. La plej gravaj tradukantoj estas Miroslav Malovec kaj Jiří Patera, kiuj havu nian dankon.

Do, karaj legantoj, ĝuu almenaŭ fragmentojn de la historio, eble ankaŭ vi enviciĝos inter la demandantojn „Ĉu estas Jan Hus ankoraŭ aktuala?“...

Margit Turková, julio 2015

## **Editoroj antcipe**

La tekstoj kolektitaj en tiu-ĉi eldono devus respondi al la demando „ĈU ESTAS HUS ANKORAŬ AKTUALA?“ Recenzoj, prijuĝoj kaj personaj leteroj, koncernantaj al la romano JAN HUS donas unusignifan respondon. La historio de la verko pri Jan Hus invokas ankaŭ nian intereson.

La aŭtoroj de ĉi-tie invicigitaj tekstoj ja siajn opiniojn, ideojn kaj sentojn reciproke ne sciis... tamen ekestis spontana diskuto ne nur pri la formo kaj enhavo de la verko de Eva Kantůrková, sed ankaŭ pri la personeco de Jan Hus nome. Kaj ĝuste tio estas kialo, ke ni la tekstojn publikigis – ne nur pro ties aŭtoroj, sed ankaŭ por la amika legantaro.

Editoroj, novembro 1988

La eseo-romano JAN HUS estis skribita en la dua duono de la 80-aj jaroj (de la 20-a jrc.), sed en tiu tempo ĝi ne povis esti eldonita. Tuj post ĝia finiĝo, en la j. 1988, peris la aŭtorino la tekston al siaj amikoj, kaj per tio ŝi malfermis diskuton pri la temo: „Ĉu estas Hus ankoraŭ aktuala?“ Pro intelekta alpaŝo de tiu-ĉi postulema verko ankaŭ por la tutmonda esperantista legantaro ni el la libro elektis partojn, kiujn ni opinias nepraj por kompreni la grandan problemaron, kiu koncernas ne nur la landojn ĉeĥajn.

Margit Turková, julio 2015

## **EVA KANTŮRKOVÁ (\*11.5.1930)**

- estas prozo-verkistino, (precipe de prozoj psikologiaj), scenaristino. En sia junaĝo ŝi estis redaktorino de la gazeto Mladá fronta, poste ŝi finstudis filozofion kaj historion en la Karolo-universitato, en Prago. De la jaro 1967 ŝi okupiĝas pri literaturo profesie. Krom literaturo E.K. dediĉas sin al aliaj kulturaj kaj politikaj agadoj. Kiel subskribinto de „Charta 77“ (vd. „Částo“ en rimarkoj kaj klarigoj/Jos.Krob) ŝi en la jaro 1985 estiĝis ĝia proparolanto kaj kontaktulo kun publiko, post kiam antaŭe ŝi travivis unu jaron en esploraresto. Ŝi apartenas inter fondintoj de „Občanské fórum“ („Civitana forumo“, tuj post la ŝanĝo de reĝimo, novembro 1989), en la jaroj 1990 – 1992 ŝi estis deputito de la Ĉeĥa nacia konsilantaro, en la jaroj 1994-1996 prezidanto de la Komunumo de verkistoj.

Kreiva evoluo de la aŭtorino enhavas klarajn spurojn de la abruptaj eventoj kiel en la publika vivo, tiel en ŝia vivo persona. Sian literaturan agadon ŝi komencis en la gazetoj kaj magazenoj „Plamen“, „Směna“, „Kulturní tvorba“ k.a. En la 70-aj/80-aj jaroj (de la 20-a jrc.) ŝiaj noveloj kaj romanoj eldoniĝadis en la t.n. „samizdat“-eldonoj.

Ŝiaj plej konataj verkoj estas: „Pán věže“ (Mastro de la turo), eldonita en „samizdato“ en la jaro 1978, poste regule en la 1992 j., la same fama „Přítelkyně z domu smutku“ (Amikinoj el la domo de malgajo), en la 1984 en Kolonjo sur Rejno, en la 1992 en Ĉeĥio, laŭ kiu estis farita same titolita filmo.

La libro pri Jan (Johano)Hus eldoniĝis unue ankaŭ en „samizdato“, en la j. 1988, en la j. 1991 unue presita publike (eldonejo Melantrich), poste en la j. 2000 due presita (en eldonejo Hynek), kaj la tria eldono, kiu estas pliriĉigita per gravaj (laŭ nia opinio) rimarkoj, recenzoj, (vidu parton „Editoroj“) estas el la jaro 2008 (eldonejo IDEÁL).

Por la libro Jan Hus gajnis Eva Kantůrková en la jaro 1989 la Premion de Jan Palach.

Okaze de la „Hus-jaro“ (2015) estis farita televida filmo (3-parta), por kiu la scenarion kreis Eva Kantůrková mem.

JAN HUS

## Listo de nomoj en la venontaj ĉapitroj (laŭ la ABC-ordo)

**1. INTERNACIE UZATAJ: uzo en la libro** (*uzo en la ĉeĥa*)

**2. ĈEĤAJ: uzo en la libro** = ĉeĥa ortografio  
(*uzo en internacia formo – se konata*)  
(esperanta ortografio)

ad 1)

**Jan Hus** („ansero“)

**Venceslao** (*Václav*)

**Sigismondo (Sigismundo)** (*Zikmund*)

ad 2)

**A:** -

**B:** **Bechyně** (*Behinje*)

**C:** -

**Č:** **Český Brod** (*Ĉeski Brod*)

**D:** -

**Ď:** -

**E:** **Eliáš** (*Eliaŝ*)

**F:** -

**G:** -

**H:** **Havlíček** (*Havliček*)

**Heřman** (*Herman, German*) (*Herĵman*)

**Holubář** (*Holubarĵ*)

**CH:** **Chelčický** (*Ĥelĉicky*)

**Chlum** (*Ĥlum*)

**Chotek** (*Ĥotek*)

**I:** -

**J:** **Jan** (*Johano*)

**Jindřich** (*Henriko*) (*Jindrĵih*)

**Jindřichův Hradec** (*Jindrĵihuuf Hradec*)

**Jiří** (*Georgo*) (*Jirĵi*)

**K:** **Kantůrková** (*Kantuurkova*)

**Konrád** (*Konrado*)

**Křišťan** (*Kristiano*) (*Krĵiŝtĵan*)

**L:** **Labouň** (*Labounj*)

**Lažany** (*Laĵani*)

**Litomyšl** (*Litomiŝl*)

**M:** **Marek** (*Marko*)

**Mělník** (*Mjelnik*)

**Michal** (*Mikaelo*) (*Mihal*)

**Miličín** (*Miliĉin*)

**Mikuláš** (*Nikolao*) (*Mikulaŝ*)

**Mladoňovic** (*Mladonjovic*)

**Myška** (*Miŝka*)

**N:** -

**O:** **Ohře** (*Ohrĵe*)

**Oldřich** (*Ulriko*) (*Oldrĵih*)

**Ondřej** (*Andreo*) (*Ondrĵej*)

**Opočno** (Opočno)  
**P: Páleč** (Paleč)  
**Pekař** (Pekarj)  
**Plzeň** (*Pilzeno*) (Plzenj)  
**Poříčí** (Porjici)  
**Pražský** (Prajski)  
**Půta** (Puuta)  
**R: Rejnštejn** (Rejnštejn)  
**Rožmberk** (Rojmberk)  
**Ř: Řitka** (Rjitka)  
**S: Stanislav** (*Stanislao*)  
**Stojčín** (Stojcin)  
**Stříbro** (Strjibro)  
**Š: Šimon** (*Simeono*) (Šimon)  
**Škopek** (Škopek)  
**Štěpán** (*Stefano*) (Štjepan)  
**T: -**  
**U: -**  
**V: Vilém Zajíc** (*Vilhelmo Hazmburk*)  
**Vodňany** (Vodnjani)  
**Vojtěch** (*Adalberto*) (Vojtjeh)  
**Vyšehrad** (Višehrad)  
**Z: Zbyněk** (Zbinjek)  
**Zdeněk** (*Sidono*) (Zdenjek)  
**Zvířetice** (Zvirjetice)  
**Ž: Železný** (Jelezni)

## **Jan Dust sen.**

Estimata kaj kara sinjorino Eva K.,

mi finlegis Vian libron „Jan Hus“ – kaj ĝi min emociigis. Mi sincere Vin bondeziras. Mi deziras al la romano trovi multe da pensemaj legantoj kaj ankaŭ helpi al ili ĝuste orientiĝi spirite kaj morale... Mi denove ekkonsciis, kiel refoje aktuala fariĝas por ni lia konflikto: fidela penado por venko de la Dia Vero, kiu estas vivanta kaj porĉiama...

... Dirite teologie, ni ekkomprenos la signifon de fundamenta formala principo de la Reformacio, kiu temas pri aŭtoritato de Dia Vorto en la Biblio kiel unusola suverena arbitracio por aferoj de kredo kaj vivo, al kiu Jan Hus trovis aliron pere de sia sincera klopodo...

*Jan Dust, sen. (1903 – 1995) – evangelia pastoro*

Trad.O.A.Fischer

## **Bohumír Janát**

### *Lumo kaj ombro de ĉeĥa historio*

... la romano de Eva Kantůrková „Jan Hus“, kiu havas subtitolon „Kontribuo al nacia identeco“. La aŭtorino en ĝi revenas preskaŭ ses jarcentojn malantaŭen en heroan, tragikan tempon, kiu havis signifon precipe por kreado de spirita formado de la nacio, en la tempon, kiun kelkaj homoj kvalifikas malluma tempo de skismoj, kolero kaj perforto, la aliaj kiel kulmino kaj morala paradigmo de la ĉeĥa historio.

Tiel aŭ alie, la vivo de Hus, fiksita per grandaj historiaj eventoj de lia epoko, malkovris multe da emocioj, pensoj kaj sopiroj, kiuj ĝis nun persistas en ni kiel videblaj aŭ kaŝitaj arĥetipoj de la nacia konscio. Ja ĝuste en la vivo de Hus ĝi disvolviĝis en grandan dramon de spirita batalo pri senco kaj faco de tera ekzistado de la homo, en la dramon de konflikto de la plej alta monda aŭtoritato kaj principo de individua libereco kaj konscienco, en la dramon de espero kaj morto, sindonemo kaj perfido, suprenleviĝo al sankteco, kaj dekadenco en peko. En tiu senco E.K. rajtas diri, ke la vivo de Hus eble prezentas „la plej grandan eventon de la ĉeĥa historio“.

Ĝuste tiu ekzistosenca vidpunkto de la homa afero... kiel li per siaj decidoj determinas daŭran, nedetruoblan, spiritan formon de sia homeco, estas dominanta aspekto de la romano... ĝi enkondukas nuntempan leganton en intiman konatecon kun tio, kio jam povus ŝajniĝi kovrita per polvo de pasintaj tempoj...

La aŭtorino liveris al ni estimindan laboron kun historia materialo, kaj nemalgrandan pensan penon. Ŝia libro donas vivantan, kompletan kaj detalan bildon de vivo kaj epoko de Hus... Bone estas klarigitaj ĉefaj punktoj de la doktrinaro de John Wicleff, inspirinto de Hus, kaj same la esenco de la doktrino de Hus. Originale kaj alloge, kvankam certgrade intuitive, estas priskribitaj karakteroj de kunludantoj kaj kontraŭludantoj... Propra portreto de Jan Hus... de la viro, kiu, malgraŭ sia sopiro pri justa paco, ne alvenas doni pacon, sed glavon, de la viro, kiu dividigas sian ĉirkaŭaĵon al devotaj anoj kaj mortinsidaj malamikoj... Sed tamen Hus estas precipe la homo, kiu ne perdas de sia vidpunkto absolutan horizonton de Dia Vero... li en siaj malcertejoj, angoroj kaj malfortecoj impresas profunde home konvinke...

... leganto devas meti al si mem la demandon: kio estas en ni, ĉeĥoj, kio tiel profunde ligas nin al penso kaj ago de Hus, kio eĉ post jarcentoj, kiuj spirite kaj reale ŝanĝis facon de la mondo, faras kaŭzon de Hus senĉese aktualan?...

... Oni devas esperi, ke la ŝarĝo de kulpo, kiu estas fonto de malpacoj de pasinteco kaj nuneco, ne estos transportata trans sojlon de nova miljaro kaj ĉeĥoj pere de forto de sia aŭtenta kristaneco sukcesos superi sian malnovan internan dividon...

Prago, la 23-an de julio 1988

Obsah, aŭgusto 1988, Listy numero 6, 1988)

*Dr-o Bohumír Janát (1947-1997) – ĉeĥa filozofo, verkisto, proparolanto de la Ĉarto 77*

Trad. O.A. Fischer

## F. Kautman

### Libro verkita kun interna engaĝiĝo

Kara Eva,

Mi alpaŝis al via verko kun certaj embarasoj: mi devas prijuĝi la grandan taskon, kiun vi intencis. La taskon, per kiu jam jarcentojn klopodas teologia, filozofia, historia, sociologia, kaj ankaŭ belarta literaturoj de la tuta mondo – kaj kiun ĝis nun plenumi ne kapablis. Kaj tamen de la starpunkto al kelkaj grandaj personecoj de nia historio – al sankta Venceslao, sankta Adalberto, Karolo la Kvara, Georgo de Poděbrady, Hus, Chelčický, Komenio, Palacký, Havlíček, Masaryk kristaliĝis, kristaliĝas kaj kristaliĝos interpreto de ĉeĥa nacia identeco: se ni volas esti vera nacio, kiu havas sian propran historion kaj tiun historion devas postsekvi, se ni volas resti vera nacio, ni ne povas al la historio alpaŝi kun objektiva neŭtraleco.

... Ĉi tie nian simpatian havas la bonkarakteran Hus kaj naivecon, eble eĉ nekonskvencon (en la verko tamen ne estas multaj) ni al li volonte pardonos....

Vere, pro memofero de Hus eksplodis perforta husisma reformo ...

Vi mem ĝuste difinas, ĝis kigrade Hus estas aŭ ne estas respondeca pro husana ribelado...

...de Hus mi tute forigus la respondecon ....

Ne li, sed la brulŝtiparo en Konstanco tiel ofendis nacian fierecon de ĉeĥoj ke ili kontraŭleviĝis: tiom des pli, ke okazis ŝanco por profana potenc-sfero plifortiĝi je la konto de eklezia posedaĵo. Oni ne povas nei, ke Hus mem konsciiĝis la danĝeron de sia agado, de tie fontis liaj duboj kaj turmentegaj internaj luktoj en la finetapo de la konstanca proceso. Sed certe li ne deziris, ke lia martira morto estu perforte venĝita.

Via libro estas skribita kun intereso kaj amo al Hus....

Amu vin reciproke kaj bonvoligu la veron al ĉiu ... Tion ni komprenis kaj preskaŭ ĉiam nun komprenas laŭvorte, ni ne plu sentas, ke temas pri malnovtestamenta ordono de amo al nia homfrataro kaj pri klopodo de la evangelio apogi ĉiun vivopaŝon je Vero de Sanktaj Skriboj, ĉar neniu alian veron Hus opiniis.

Via F.K., 20.4.1988

*František Kautman (1927): ĉeĥa literatur-historiisto, verkisto kaj subskribinto de la Ĉarto 77*

Trad. M. Ribasová



## Miloš Rejchrt

*Jan Hus de Eva Kantůrková*

„La brila fenomeno de Hus staras antaŭ ĉies okuloj. Mi provis rememorigi personecan kernon de lia persistemo en batalo kontraŭ pliforto per aludo de lia koncepto de la vero.“ Per tiuj vortoj A. Molnár antaŭmencias sian traktadon pri Hus... kaj kontinuas: „Sed nur plena priskribo de viva vojo de Hus, kiu finiĝis sur la brulŝtiparo en Konstanco... kreus respektindan kontrapunkton de la intereso, kiun mi dediĉis al Luther kaj Calvin, kiam mi okupiĝis pri la 16-a jarcento.

En la jaro 1988 ni ja ĝisatendis la „priskribon de la tuta vojo de Hus“ kaj „brila fenomeno de Hus“ denove aperos, se ne antaŭ ĉies okuloj, do almenaŭ antaŭ okuloj de tiuj, kiuj akiros la „samizdatan“ publikaĵon de Eva Kantůrková „Jan Hus“.

Preskaŭ kvarcentpaĝa verko de E.K. estas koncize kaj precize detala historia traktado. Se leganto bezonas pene tralegi ekzemple dek kvin-paĝan analizon de ekleziologio de Hus kaj ĝian komparon kun la ekleziologio de Páleč, tio estas nur atesto, ke la aŭtorino pli ol fluecon de la rakonto preferas serĉadon de radikoj en la konflikto de Hus.

Páleč tial principe decidiĝas por obei eklezian institucion, sed Hus – por superinstitucion aŭtoritaton: Hus „el institucia komandemo elglitis danke al sia plej profunda pieco kaj ekzalteco por Kristo.“

Kantůrková verkis beletraĵon, kiun ĉeĥa legantaro atendadis jardekojn.

Kritický sborník (Kritika Kolekto) 2/1988, Svědectví (Atesto) 85/1988)

*Miloš Rejchrt (1946) – evangelia pastoro, proparolanto de la Ĉarto 77*

Trad. O.A. Fischer

**Milan Šimečka**

## **Libro pri Hus**

... estas libro de granda verkista kuraĝo ...

El sia fidinda propra memoro (mi mencias la libron „Miaj amikinoj en la domo de malĝojo) ŝi trairis en la teritorion de malfidinda kaj neunusenca memoro nacia, por ke ŝi, kiel diras la subtitolo, kontribuu al ekkono de nacia identeco. Ŝi en si subpremis pravigitan timon pro malfavoraj riproĉoj de historiistoj kaj pro demandoj de siaj konfesiaj diversspecaj geamikoj. La kuraĝo certe estis necesa ĉe ĉiu paŝo.

La libro ja finiĝas per morto de Hus sur brulŝtiparo. Kantůrková decidiĝis por tre malfacila solvo, ŝia libro pri Hus estas malferma, netrudas al leganto interpreton esprimeblan pere de konciza moto. Malkaŝemo de la evento de Hus estas certe intenca kaj spegulas sperton de nia lando kaj generacio kun ideologia karakterizado ...

Kantůrková volis ekspliki Hus prefere de li mem, de liaj verkoj, predikoj kaj ĉefe de liaj leteroj. Tial ŝi eĉ ne kaŝas lian mezepokecon, lian kredon en vorton kaj pravon de propra interpretado de Sanktaj Skriboj, pere de kiu li ankoraŭ antaŭ la koncilio alvokis siajn kontraŭulojn diskuti je vivo aŭ je morto. Kiu malvenkos, tiu mortos !

Hus treege deziris reveni Bohemion, sed li ne povis reveni kiel poltrono, kiel humiligita herezulo. Li ne havis, kiel havis Galileo, sian sciencan, li havis nenion, kion li povus superstarigi, li havis nur sian vivon kaj ĝin li metis en konflikton sen restaĵo, kun vera imago de brulanta fajro.

Ĝuste pro sia sincereco estas Hus en la rakontado de Kantůrková riĉtemperamenta, emocia persono, same kiel aliaj lin ĉirkaŭintaj – la reĝo, Hieronimo, la ĉefepiskopo Zbyněk, Páleč k.t.p. La aŭtorino estas konsekvenca ankaŭ rilate la eventojn kaj realaĵojn de tiama epoko...

... ŝi esprimas eĉ timzorgan strebon kompreni la veran motivon de kontraŭuloj de Hus ... Hus en la libro estas rezulto de kreado, li estas ŝia propra - Hus de Kantůrková, lia vojo estas akompanata kun admiro kaj ankaŭ kun konsterniĝo. La vidmaniero de la aŭtorino al Hus – tio estas rigardo de la plej larĝa morala interkonsento, de la plej bona ĉeĥa kaj eŭropa tradicioj. ...

... La libro postulas nehasteman leganton, eble eĉ leganton iom instruitan ... Treege min interesus, kiom da ties legantoj estas en nuna Ĉeĥoslovakio – husanoj, studentoj, ekumenaj katolikoj, vilaĝaj instruistoj kaj bibliotekistoj – simple homoj, kiuj ŝatus ekscii pli multe pri la viro, ĉirkaŭ kies monumento ĉiutage ili paŝadas.

(Obsah, septembro 1988)

*Milan Šimečka (1930 – 1990), ĉeĥa k. slovaka filozofa, verkisto, subskribinto de la Ĉarto 77*

Trad. M. Ribasová

## **Ĉu estas Hus ankoraŭ aktuala ?**

Aŭtorino detale citas leterojn, filozofiajn kaj teologiajn skribaĵojn, predikojn, traktaĵojn, eĉ polemikajn kantojn. Ŝi klopodas esencigi la idean lukton. La eventojn kaj socian resonon de Hus-agado ŝi notas nur margene. Ĝuste en tiu ĉi kreopova trakto estas kaŝita sekreto de la libro. La aŭtorino mem deziris ekscii, pri kio Hus luktis, kiaj ideoj regis korojn kaj pensojn de liaj samtempuloj kaj pro kio li mortis....

tio estas notaĵo de ŝia strebo trapenetri ĝis la senco de lia lukto. ...

... Multenhava listo de literaturo ... Ŝi laboris ne nur kun literaturo, sed evidente ankaŭ kun aliaj fontoj, ĉefe kiam ŝi klopodis trovi aŭtentan esprimon de la ideoj, pri kiuj oni konfliktis....

... Prijuĝintaj konkludoj de la aŭtorino pri kelkaj okazintaĵoj kaj aŭtoritatuloj estas diskutablaj... ... ŝi honeste penas eviti ideologion, ŝi deziris aŭskulti Hus mem, ebligi al li „publikan aŭdadon“ sen anticipa prijuĝo. ...

La libro de E.K. deziras nuligi kelkajn, ĉe ni disvastigitajn imagojn ... ekvilibriĝi kun homoj, kiuj demandas, ĉu Hus bone decidiĝis lasante sin mortbruligi. Tiuj ĉi fragmentoj apartenas en la libro al la plej belaj, la plej valoraj kaj la plej instigaj. La aŭtorino trafe esprimis, ke la decida momento estis la jaro 1412, kiam Hus kontraŭstaris ne nur eklezian hierarkion, sed ankaŭ la ordonojn de la reĝo, kiu ĝis tiam lin subtenadis. Hus devis elekti. Ĉu li sekvos la Veron tiel, kiel li ĝin ekkonis, aŭ li konformiĝos. „La decido en Konstanco“ jam estis sekvo de lia elekto, kie retiriĝo signifus trioblan perfidon: de Jesuo Kristo, de propra konscienco kaj perfidon al siaj disĉiploj. Sed la martireco nure por martireco estis tute fremda al lia interna emo...

... unuopulo, kiu memstare cerbumas, havas eblecon elekti: aŭ li certigos sin mem, ke estas ankaŭ morala la bonajn instituciojn respektive konservi kaj nur malrapide ilin influu. La unuan (eblon) elektis en la jaro 1412 Štěpán Pálec, kune kun aliaj, la dua konsekvencigis ĉe Hus gravan lukton, kaŭzis interdikon kaj mortbruligon...

... Rakontas pri Štěpán Pálec: Li estis amiko de Hus kaj fariĝis la plej grava ideo oponento en hejmlando. Kantůrková klarigas lian ŝanĝon pro timo. Ĉu temis pri nura „sekulara timo“, timzorgo antaŭ reprezalio? Ĉu Štěpán ankaŭ ne havis grandan respondencan kaj pro tio timis postsekvajn, kiuj certe realiĝus, se oni rompus validan regularon?! Pálec de siaj starpunktoj ne profitis, jam en la jaro 1413 li eĉ devis forlasi Bohemion. Ĉu ne meritis kompreni ŝanĝon de Pálec ankoraŭ pli profunde ? ... Kiel malfacile estis forlasi idearon de sia tempo kaj ekpaŝi al nekonata medio?! Kaj kiel oni devis senti sin respondecoplene, eĉ metafizike respondece por gardi tiun ĉi ŝemon kaj „nesubfosi la kristanan mondon“ !

### **Tribunalo por la lasta apelacio**

La plej elokventa atesto por decido de Hus kaj por lia maniero kiel solvi la streĉon inter konkreta kaj institucia pensmanieroj estas por ni nuntempe la teksto de lia fama apelacio al Kristo, la 13-an de oktobro 1412. Apelacii de papo al Kristo estis de jura vidpunkto malsenco. Kristo ne estis institucio..., ne nur la papan institucion, sed tutan eklezion oni komprenis „korpo de Kristo“ kaj la papon - ĝia kapo. Ago de Hus devis konsterni eĉ unu de la plej fidelaj amikoj, juran konsilanton, la Majstron Jan el Jesenice. Ja Hus sur sia vojo al ero finfine ekstaris sur pozicio kontraŭinstitucia. La Vero viva, ĉe liaj sekvantoj vero venkanta, signifis por li pli multe ol difinitaj juro kaj institucioj.

Kantůrková reliefe priskribas, kiel al tiu paŝo Hus kuraĝiĝis, kiam ĉiuj eblecoj de difinitaj juro kaj institucioj estis elĉerpitaj. Ŝi provas lian decidon proksimigi al moderna leganto, sed tio ne estas facila. Ĉu ankaŭ ni ne pensas jure kaj institucie ? Kaj ĉu ne ŝajnas al ni lia paŝo tro subjektiveca - kaj riska ?

*Jan Šimsa (1929) – evangelia pastoro, teologo, subskribinto de la Ĉarto 77*  
*Jaroslav Mezník (1928) – ĉeĥa historiisto, subskribinto de la Ĉarto 77*

Trad. M. Ribasová

# Via rakontado kaŭzas mian profundan malgajon

## Josef Zvěřina

Kara Eva,

la historio de la vivo de Magistro Johano Hus estas tre komplika kaj ĝiaj paraboloj – kaj pozitivaj kaj negativaj – estos neniam finitaj.

Jen, via rakontado kaŭzas mian profundan malgajon. Ambaŭ partoj volis reformi la eklezion. Ambaŭ partoj invokis la Sanktan Bibliion. Ili ambaŭ argumentis per la Sankta Biblio, ili ambaŭ akuzadis unu la alian, ke la interpreto de tiu alia estas malbona. Ambaŭ partoj reciproke forbruligadis siajn kontraŭulojn kaj mi treege bedaŭras la Magistron Johanon kaj pli multe eĉ la Magistron Hieronimon de Prago<sup>1</sup>) – kaj eĉ multe pli la abaton de la aŭgustiana monaĥejo, kiu – kontraŭe – estis forbruligita de la „Diaj batalantoj kaj la leĝo Lia“<sup>2</sup>) en barelo en la urbo Rokycany. Ili eĉ dispendigis la intestojn de aliaj murditaj monaĥoj sur arbojn. Mi bedaŭras eĉ tiujn ĝismorte turmentitajn monaĥinojn, kiujn vi ankaŭ forĵetis trans la kapon, kvankam ili mortis ankaŭ pro sia konfeso kaj fideleco al la eklezio. Mia bedaŭro estas pli granda tial, ke oni silentas pri tio <sup>3</sup>) Jen, tio ne estas justa. Mia doloro fontas el tio, ke ili ĉiuj estis kristanoj, kiuj ekstermis unuj la aliajn. La eklezio havas netrarigardeblan aron da martiroj, en iliaj vicoj Magistro Johano malaperas <sup>4</sup>) La „sankta“ inkvizicio kulpas pri la fino de multegaj kaj multegaj homaj vivoj, do la memoro je Magistro Johano Hus retiriĝas kaj aperas alia, terura kaj eterna demando, kiu ĝis nun ne estas solvita. Ĝi estas diversmaniere formulata: persona konfeso kontraŭ komuna konfeso; persisto je sia vero kontraŭ la senkaraktera indiferenteco; principeco kontraŭ malprincipeco; harmonieco kontraŭ malharmonieco; toleremo kontraŭ maltoleremo; libereco kontraŭ aŭtoritato; la certeco de propra konfeso kontraŭ la komuna sperteco; megalomanio kontraŭ la servo por la vero; erariga konscio kaj erara bono...

Jen mi kiel kredanto, pastro kaj teologo, havas pluan grandegan aron da problemoj. Tio afliktas min – pro la eklezio pasinta, nuntempa eĉ venonta. Tiujn problemojn portas kun mi ĉiuj homoj, kiuj ne estis trafitaj per fanatismo. Tiujn problemojn portas kun mi ĉiuj kredantoj, kiuj sentas la respondecon por la aspekto de kristanismo. Tiuj homoj tro ne malfaciligas mian situacion, sed la indiferenteco de kredantoj, same kiel ilia memsavantiga certeco kaj farizea malhumileco ŝargas mian kapon. Do, ne miru, ke mi ne estus volonta rakonti la historion de Magistro Johano Hus – eĉ ne kiel iun parabolon, ĉar la promocio de historia persono je simbolo ŝajnas al mi subjektiva, nepruvita kaj nepruvebla, nura projekcio – neniua akto.

Vi mem ie skribis, ke estas senvalore en historio demandi, kio okazus, se Ceaesaro ne transpaŝus Rubikonon – ĉar li transpaŝis ĝin. Simile en la teologio, mi ne ŝatas la demandojn, kio okazus, se... Mi ne ŝatas Jesuon kiel simbolon, sed kiel la veran homon kaj la veran Dion... Sammaniere Magistro Johano Hus estas por mi pli ŝatata kun sia retoriko, sed kun la energia entuziasmo reformi la eklezion, kun sia kredo kaj kritiko de prelatoj, ne pro tiuj simboloj en kiujn li estis korektita kaj pro kiuj li estis ekzekutita.

Alivorte, „la demando de Hus“ projekcias sin en miajn plej profundajn problemojn, kie povas servi por mi nek lia historia ekzisto, nek la mitoj pri li.

Ankaŭ ekinteresis min via penso, ke nur renesanco, klerismo kaj liberalismo alportis la estimon por la personeco kaj la finon de inkvizicio. Jen, la renesancaj magnatoj ne estis pli humanaj ol iliaj antaŭuloj rilate al militado, turmentado kaj premado de la servutuloj. Luther, ekz. kontraŭstaris okaze de la kamparana ribelo kaj lia estimo al la personeco neplialtiĝis – same ĉe Calvin kaj ĉe Zwingli. Baroko alportis la ekstermadon de sorĉistinoj kaj pluajn abomenaĵojn kristanajn kaj nekristanajn, kiuj estis disvastigataj per kolonialismo, por ke en tiuj mondpartoj unuj perfortaĵoj

estu anstataŭataj per aliaj perfortaĵoj. La klerismo elpensis krom alie ankaŭ gilotinon kaj mi ne scias, ĉu ĝi ne laboris pli arde ol la inkvizicio; se ĝi kulpas pri malpli da neniigitaj homaj vivoj ol la inkvizicio, do tial, ke la tempo ne ebligis al tiu terura reĝimo agi pli longe **5**) Post tio la plej abomenindaj teruraĵoj por kelka tempo malaperis. Sed tio, kio sekvis, similas al nenio en la plej nigra historio de ĉiuj plej teruraj reĝimoj, inkvizicio kaj turmentejoj. La granda Oktobra Revolucio neniigis 20 milionojn da homaj vivoj, la Patriota milito **6**) pluajn 20 milionojn da homaj vivoj, kaj stalinismo denove la pluajn. Komprenoble, ke Hitler kaj Mussolini agis en la roloj de savantoj de la homaro tiamaniere, ke oni kalkulas iliajn homajn viktimojn ankaŭ po dekoj da milionoj. Ĉu tio estas nur duonvero? Ĉu tie ne estas eĉ eta lumero? Ĉu ne estas ankaŭ duonvero tio, kion mi tie asertas kaj kion mi povus diri pri La Blanka Monto kaj pri Habsburgoj? **7**) Ĉu estas perfido je la ĉeĥa nacio, se iuj pensas, ke la Aŭstria-Hungaria Regno povus esti la ĝermo de la Kunligitaj Eŭropaj Nacioj. Jen, vi vidas: denove nuraj (ne)historiaj ,us-oj‘.

Kaj via malgaja libro forĝvidas min plu kaj plu de Johano Hus.

Min eĉ doloras pli multe tiuj ok mortaj kaj tridek vunditaj, la ago de la armita grupo en la preĝejo en Du Prince en Haitio. Multe pli estas por mi doloriga la „forĵetitaĵa urbo“ en Cairo, kie vivas miloj da homoj malantaŭ la muroj el forĵetitaĵoj de la urbo, malriĉaj ,felahoj‘, kiuj fuĝis el la mizero en la mizeron, multe la koptaj kristanoj, k. s. Doloriga por mi estas, ke ,muĝahedinoj‘ torturas sovetiajn kaptitojn kaj sovetianoj agas reciproke, sed pro tio ili trovas hejme malestimon, do ili venĝas per pluaj kruelaĵoj. Mian koron pli premas Martin Luther King kaj Gandhi ol Hus; murdado de pacemaj budhistoj ĉe hindiaj limoj kaj en Srilanko; masakroj en Afriko kaj Latina Ameriko, kie tion faras kristanoj, ol tiuj 6000 homoj, ĝismorte turmentitaj de husanoj. Do la demando koncerne al Hus, la demando ĉeĥa kaj disputoj pri tio ĉio iom malaperas por mi, kaj mi devas trudi min al la pensado pri la pasinteco, kiam mi sentas pezon de la nuntempo kaj venonteco.

Tio estas malgajo de la animo, kiun elvokas la pensoj pri via libro, kara Eva. Tio ne estas via kulpo, same kiel pluaj fontoj de amareco kaj angoro. Kelkaj miaj amikoj miras, riproĉas kaj akuzas min pro la totalisma pensado, pro tio, ke mi timas Romon, kaj mi ne scias pro kio alia – ke mi ne ardas pro la rehabilito de Hus. Kiel vi vidas, ili grave eraras, ĉar min pezas tute aliaj aferoj. Komprenoble, ke mi ne kontraŭos, kiel iuj katolikoj, se oni serĉos la veron pri Johano Hus, la vero, pri kiu li ja ĉiam klopodis. Sed mi dubas, ke oni forigos tiun miton. Do, mi lasas la miton esti mito kaj mi transiras aliloken, pli profunden.

Mi demandas: Kial eblas, ke tiu teruro en la homo kaj en la homaro ne ekstermis la tutan homarantenton? Kial eblas, ke homoj plu vivas, esperas, amas unu la alian?

La vero estas, ke la kristaneco ne kunligis la grekan kaj la hebrean pensmanierojn kaj ke tio eĉ ne eblas. Fakte ambaŭ tiuj linioj kontinuas plu en la kristana kadro paralele, la spiritoj preferas iam la unuan, iam la alian alternativon, kaj tiam estas devo ne esti nur unuflanke orientita. Kiamaniere tio povas okazi? Ĉu AGAPÉ **8**) – la principo de amo... Ĉu estas en la homo tiu ineffabile **9**) – nekomprenebla, neŝanĝebla kaj neniigebla sekreto de la humaneco, kontraŭ kiu ĉiuj potencoj de la malbono fine estas senpovaj? Tio, kio kaŭzas, ke la homo estas plej profunde la vera homo, kio estas ĝia principo kaj ĝia plenumo – estas tio Dia en la homo, t.s., ke la homo estas bildo de Dio kaj simileco Dia. Eterne homa, ĉar eterne Dia...

Mia estinta ministranto, D-ro Polc – nuntempe la historiisto en Romo – skribis al mi, ke li disponas pri dokumentoj, kiuj kompromitus Magistron Johanon, sed ke li ne volas ilin publikigi pro ekumenaj kialoj. Tio ne plaĉas al mi. Aŭ tiuj dokumentoj estas veraj – kaj tiam oni povas nenion fari, aŭ ili ne estas veraj, kaj tiam ili estas rifuzendaj. Ŝajnas, ke Magistro Johano Hus parolis alie en la Kapelo de Betlehemo **10**) kaj alie dum la universitata kunveno. (En la jaro 1411 li diras ekz. pri la papo Johano la XXIII<sup>a</sup>: „La Sankta Patro, la anĝelo de la Sinjoro, la pastro de Dio la plej alta, la granda episkopo, eminenta papo,

*la nobla instruisto, la servisto de Sanktuloj, la heredanto de apostoloj havanta la potencon de Sankta Petro, konsekron de Kristo.*“)

Johano la XXIII<sup>a</sup> estis eble bona soldato, sed kiel episkopo kaj poste eĉ papo li apartenis al tiuj plej malbonaj. Do, eĉ tiu ardo okaze de la korekto ne estis ĉiam pura. Mi volonte Johanon Hus laŭdus, sed mi ne povas kaj ne povas. Same kiel lia moralismo estis troigita, ankaŭ tiu laŭdo de la malbona papo estis troigita. Do mi ne povas neglekti la impreson de tio, kion riproĉis al Hus Páleč,<sup>11</sup> dirante, ke li parolas „ne ŝparante la langon“ („pompe“). Kaj ĝenas min ankaŭ pluaj faktoj. Mi ne povas trakti la veron de la kredo, eĉ mian personan kredon, tiel facilanime kaj neprofesie, kiel homoj, kies koro ne estas tiel sange premita per tiuj demandoj, aŭ ili ne estas teologiaj spertuloj, ke ili vidu kaj sciuj ankaŭ la konsekvencojn. Ankaŭ mi devis pro mia firmeco aŭdi multajn riproĉojn, kiuj doloris min.

*Josef Zvěřina(1913 – 1990) – katolika pastro kaj teologo, subskribinto de Ĉarto 77. 12)*

Skribite la 1988-09-21

Kiel tradukanto de la kritika eseo de J. Z. mi sentas devon klarigi kelkajn epizodojn de la ĉeĥa historio kaj same kelkajn lingvajn neprecizaĵojn, kiujn la aŭtoro faris, ĉar mi pensas, ke la eksterlandanoj povus ne kompreni la pensojn de la aŭtoro. Samtempe mi ne povas neglekti kelkajn opiniojn de J. Z. sen miaj propraj komentoj. *Josef Krob*

1. Magistro Hieronimo de Prago (ĉeĥe: *Jeronym Pražský*) amiko de Magistro Johano Hus, forbruligita en Konstanco la 1416-05-30.
2. Tiamaniere nomis sin la husanoj.
3. En la jaro 1979 la eldonejo „Svoboda“ lanĉis belegan Husanan Kronikon (aŭtoro Vavřinec de Březová), kie eĉ la abomenindaj agoj de husanoj estas vaste menciataj. La libro aperis en 42.000 ekzempleroj. Do la mencio pri la silento pri tiuj agoj estas iomete erara...
4. Kiom da martiroj ekflamigis tian egan incendion, kiel la morto de Magistro Johano?
5. Tre interese estas, ke la Granda Franca Revolucio (france: *La Révolution française*) (1789-07-14) estas de tn. „demokratiaj rondoj“ celebrata, malgraŭ tio la Granda Oktobra Socialisma Revolucio (ruse: *Великая Октябрьская социалистическая революция*) (1917-11-07) estas abomenata...
6. „La Patriota milito“ (ruse: *Отечественная война*) estas la milito kontraŭ Napoleon en la jaro 1812. La milito kontraŭ Hitler (1941 – 1945), pri kiu skribas J. Z., estas nomata „La Granda Patriota milito“ (ruse: *Великая Отечественная война*).
7. La batalo sur la Blanka Monto (ĉeĥe: *Bitva na Bílé Hoře*) – Blanka Monto (ĉeĥe: *Bílá Hora*) hodiaŭ estas kvartalo de Prago – okazis la 1620-11-08. Ĝi signifis finan fiaskon de la husana movado kaj komencon de perforta rekatolikado de la ĉeĥa loĝantaro sub la regado de Habsburga nobelara dinastio. (Ferdinando la II<sup>a</sup>). Pro tio multaj ĉeĥoj forlasis sian patrujon, inter ili ankaŭ Jan Ámos Komenský (Komenio).
8. Agapé (greke: *αγάπη*) estas unu el grekaj esprimoj por la amo, uzata ĉefe en la kadro de kristanismo. Koncernas pri la amo sen erotika fono, ĉefe pri la amo de la homo al Dio kaj reciproke.
9. Ineffabile (itale) = neesprimebla.
10. Kapelo de Betlehemo (ĉeĥe: *Kaple Betlémská*) – fama praga preĝejo, kie Magistro Johano Hus predikis en la jaroj 1402 – 1412.
11. Stefano de Páleč (ĉeĥe: *Štěpán z Pálče*) Universitata magistro, komence unu el amikoj de Hus. Post la karcerado kaj turmentado fare de la ekzekutistoj de la papo Johano la XXIII<sup>a</sup> li devis ŝanĝi sian opinion, por savi sian vivon kaj fariĝis kontraŭulo de Hus.
12. La Ĉarto 77 (ĉeĥe: *Charta 77*) – Dokumento lanĉita la 1977-01-01 de la grupo da homoj batalantaj kontraŭ komunisma reĝimo en tiama Ĉeĥoslovakio. Ĝiaj subskribintoj estis ofte persekutitaj de la sekreta polico.

## Konfeso de Eva Kantůrková

...ke mi komencis pri Jan Hus pli amplekse legi kaŭzis unu ne kompetenta prelego (dum iu seminario); tio estis bonega instigo, ĉar tra leginte verkojn de Jan Hus, mi eksciis ion, kio impetigis min skribi la libron...

*...la sekreto de eklezio klariĝas al homoj poŝtupe, po etapoj, kaj naskiĝas en doloro ĉe grandaj oferoj“... Kaj ĝuste la ofero por pli profunda ekscio de la eklezio estis „la strebo de Jan Hus, kiu devancis nian epokon je kelkaj jarcentoj.“ (Stefan Swieżawski).*

Hus estas plenkoscia platoniko kaj realisto, kaj neniam li dirus „mi pensas – do mi estas“... nur tion li diradis: „mi estas destinita de Dio – do tial mi estas.“ Hus opiniis plej malbona herezeco stariĝi en la „pozicion de Dio“. Ĝuste tial li konfliktiĝis kun la papo kaj kun la pastroj, ke ili nomis sin „kreintoj de Dio“. koncerne la sciencojn – kaj sociajn kaj naturajn – Hus rekte igas rilati ilin al Dio. ... mia libro estas intencata kiel demando ne kiel konstato; sed tion mi devas diri, ke neniu klarigo, kiun mi konas, al Hus estis plene prava. En Hus ni havas pli multe, ol ni scipovas kaj volas agnoski. Ankaŭ tial (mi opinias), ke lia persono estas tiel viveca. Kaj nura imagoscio, ke Hus estas „talenta, klera kaj honesta“ homo, kiu estis „en la tempoj de grandaj maljustaĵoj de la eklezio forigita el la mondo“, estas nesufiĉa.

Hus je estas per io eksterordinara – per io vere spirite granda – per sia alĵustiĝo al Kristo, al evangelioj... Mia mirega konscio – ke Hus estas sen Kristo neklarigebla (sen Kristo en Lia plej profunda senco)... Hus estis suverena! Sed nur en la aferoj homaraj. Kaj lia suvereneco elfluis el lia submetiĝo al Dio, kiel estas en la Biblio kaj evangelioj. Jam Kristo – ne Hus (aŭ protestanto-konfeso) por la homoj malkovris, ke ilia konscienco estas persona, ke ĉiu individuo respondecas mem antaŭ Dio. En tio estas esenco de la spirita revolucio de kristanismo, kompare kun la konfeso malnovtestamenta, kiu estas genta kaj gento-escepta.

Hus ja estis suverena, li fidis sian prudenton kaj propran opinion, sed li estis plene submetiĝinta antaŭ Dio – ĝuste pro tio li malakceptis obeemon al la mond-institucio – do al tiatempa eklezio, kies malĝustiĝeco al la Dio spitis. Lia kontraŭstaro okazis pro la konfeso-principo, ne pro ia orgojleco.

Hus estas eksterordinara – li kun plena pasio batalis por tio, kiu por ni estas rara: por submetiĝo al nobla spirita principo, por plena homa respondeco antaŭ ĝi. Ni havas en Hus pli multe – ol ni scias!

*Eva Kantůrková,  
11.10. 88*



## Eniro

Baltazaro Cossa, laŭ la nomo papo Johano XXIII-a, fuĝis merkrede nokte antaŭ la Palmodimanĉo el Konstanco, alivestita kiel soldato. Jan (Johano)Hus, la papa arestito, estis obsedita de sovaĝa espero, tia, kian li ĉe si mem ne supozus. La spirito certe posedas regadon super la blinde materia korpo, sed la korpo en la malplej atendebla momento ribelas al spontana emo povi libere agi. Ke la papo fuĝis, Hus verŝajne eksciis de siaj gardantoj. Ili apartenis al la papa kortego kaj kiam oni instalis en dominikana klostro ĉelon, la antaŭan ĉambron oni aranĝis por ili: por Hus oni mendis pli fortikajn serurojn, pordoriglilojn kaj pli rezistajn fenestrajn kradojn, por ili pli bonajn litojn. Kaj eble alhastis kun la informo pri la fuĝo de la papo al ni nekonata amiko de Hus, Pater, Patro, kiu sekrete elportadis el la karcero la leterojn de Hus. Li elportis ankaŭ tiun pri la sovaĝa espero.

Baltazaro Cossa, la papo Johano XXIII-a, promesis, ĉefe sub premo de la germana senditaro kaj ankaŭ pro insistado de la romia reĝo Sigismondo, ke li rezignos pri la tiaro, se la samon faros ankaŭ la du aliaj antipapoj. En la koncilio pro tio okazis granda glorado, kaj ankaŭ majstro Kristiano, kiu ĝuste en tiuj tagoj venis en Konstancon kaj vizitis Hus, povis al li priskribi la gloran *Tedeumo*-n, faritan omaĝe al la papa promeso, en Konstanco sonoris ĉiuj sonoriloj, la koncilio jubilis, kaj la romia reĝo Sigismondo sinkis antaŭ Cossa sur la genuojn, por danki pro la promeso, ke li kun-senigos la eklezion de la triobla regado. Sed poste la eventoj renversiĝis; Cossa rimarkis la rivalecon de la pariza kortego kontraŭ Sigismondo, en ekscititaj kunvenoj de la franca delegitaro, kiu kunsidis ĝuste en la klostro, kie Hus estis prizonata, li akiris por si parton de la konciliaj delegitoj eĉ kun kelkaj kardinaloj, kaj dum la menciita merkredo antaŭ la Palmodimanĉo li alivestis sin kiel soldato kaj superruzis la koncilion per fuĝo. Nun li klopodos trans la Rejnnon sub la francan protekton, kaj se li jam aranĝis unu militon por gajni la tiaron, li aranĝos pluajn, kaj kial li ne aranĝu, se - kiel oni asertis - por la papa rango li mortigis sian antaŭinton.

Sovaĝa espero tremigis la korpon, sed rezono tuj levas la menson super la malalte homajn esperadojn. Sub protekto de al ni nekonata Patro skribas Hus al siaj amikoj en Konstanco: „La koncilio troviĝas en kaoso, kiel mi supozas, pro la foriro de la papo. Jen pruvo, kiel mi ekkonis, ke ĉe ĉiuj agoj necesas starigi Dion super la homan prudenton; tion ili absolute ne faris; kaj tial ktp.“ - afero tiel klara, ke ne valoras penon disvolvi ĝin. Se la konciliaj patroj, kardinaloj, episkopoj, reprezentantoj de universitatoj kaj de eŭropaj registaroj kaj ankaŭ la reĝo Sigismondo estus juĝintaj pri Cossa laŭ la dia vero, ili ne marĉandus kun li pri potenco, ne servus pro lia fragila promeso Tedeumon, sed detronigus lin rekte desur la seĝo de Petro tuj pro liaj krimoj. Sed ĉar ili mem ... - ktp. Dion ili starigu super sian erareman prudenton.

Espero! Espero tamen ne cedis! Li estas prizonulo de papo, kaj la papo fuĝis; jam post la nura promeso de la papo, ke li rezignos pri la tiaro, la romia reĝo Sigismondo devis pli atente aŭskultadi la insistadon de bohemiaj sinjoroj, ke al li, al la papa prizonulo, li elpostulu publikan aŭdiencon. La zorgo de la koncilio pri Cossa ne estas lia zorgo, ĝi estas lia zorgo nur tiagrade, ke la eksplodinta kaoso povas prokrastigi la fermon de la konflikto; tamen la fuĝo de Cossa povus faciligi lian mision ĉe la koncilio. Kaj se Dio permesos - ĉe tiu ideo li impetekbrulas! - li povus atingi liberecon. Kaj al liberulo ili apenaŭ rifuzos publikan aŭdiencon ... Ja kial tiel neatendite venis al li la bohemiaj sinjoroj el kortego de Sigismondo? Ĝis nun li havis en la prizono nur minimume da vizitantoj: venis polaj kavaliroj kaj poste Kristiano, tiu bona, bona Kristiano. Eĉ Johano de Chlum ne kuraĝis viziti lin, kvankam la vojo al la ĉelo estis interkonsentita kaj ĉe la gardistoj subaĉetebla. Eble la bohemiajn sinjorojn sendis Kristiano; aŭ ĉu ili venis kun la scio de Sigismondo? Ĉu ili venis, ĉar la papo vidigis siajn kalkanojn? Kaj kiel afablaj ili estis! La sinjoro Venceslao el Dubé dum interparolo eklarmis. Li certe aspektas mizerigita, sed li klopodis infekti ilin per kreskanta espero, nur per la espero. Por li ekzistas sole unu: atingi la publikan aŭdiencon. Se la reĝo, kiel li promesis kaj kiel la bohemiaj sinjoroj urĝas lin, igos la koncilion lasi lin, Huson, publike prezentiĝi, lia ekspliko estos nerefutebla, kiel nerefutebla estas la Skribo. Tiom pli post la forkuro de Cossa.

Kun la sinjoro Venceslao, kiu ploreme kapjesadis, staris apud sinjoro Myška ankaŭ sinjoro Vilhelmo Zajíc; Hus ĝuste lin - samtempe kiel li penis akiri la sinjorojn por sia origina starpunkto,

ke li venis al Konstanco defendi la veron de Skribo, ne antaŭ la koncilio penti pro ĝi - ĝuste lin Hus atente observis kaj trankviliĝis, kiam el la gestoj, voĉo kaj rigardo de Zajíc li komprenis, ke la nobelo sentas al li amikecon. „Mi konstatis,“ li skribas al Johano el Chlum, „ke sinjoro Vilhelmo estas mia amiko. Bonvolu danki lin.“ Rigardante sinjoron Vilhelmon la koro de Hus premiĝis pro trokomplika rememoro pri alia Hazmburko, pri la sinjoro Zbyněk.

Johano XXIII-a sukcese fuĝis al la teritorio de aŭstria duko Frederiko, kiun li subaĉetis per granda mono; de ĉi tie li intencis trabatali sin al Francio, kiu subtenos lin kontraŭ Sigismondo, kaj ordonis al sia kortego veni post lin. Okazis forkurado el Konstanco, al kiu aliĝis ankaŭ multaj antaŭe kontraŭpapaj kardinaloj, foriris la tuta kurio kaj la koncilio estis minacata per disfalo. Raportoj tralikiĝas tra la prizonpordo kaj la esperon, kiu tiom varmigis, tajde alternigas panika timo. Estas antaŭvespero de la Palmodimanĉo, la gardistoj jam diris al Hus, ke ili foriros, ĝis la mateno restos eĉ ne unu; kiam fuĝas la papo, ne povas certi pri sia vivo eĉ lia lasta soldato; kaj la amiko, kiu por Hus faris tiom da bono, atendas en la ĉelo, ĝis li finskribos la lastan leteron el ĉi tiu prizono. „Jam miaj gardistoj ĉiuj foriras, kaj mi ne scias, kion mi manĝos, kaj mi ne scias, kio trafos min en la karceron,“ skribas Hus al Johano el Chlum. „Mi petas, turniĝu kune kun aliaj sinjoroj al la reĝo, ke li faru kun mi ian finon.“ Poste li alskribas: „Por ke li ne havu pro mi pekon nek honton.“

Li estas oponento, kondamnito kaj prizonulo de la papo, kaj kiam Baltazaro Cossa ne plu estas en Konstanco kaj lia kortego rapidas post lin, kiu kontraŭ li procesos en la koncilio? Kaj se la papo fuĝas kun sia tuta kortego, se li revokas de lia pordo la lastan gardiston, kial oni ne lasas lin libera? „La episkopo konstanca,“ skribas li al Chlum sian ĉefan sciigon, „sendis al mi leteron kun informo, ke li volas havi nenion kun mi. La samon faris la kardinaloj.“ La konstanca episkopo estas subordita viro, li faros tion, kion ordonos al li la reĝo aŭ la koncilio, sed se eĉ la kardinaloj rezignis pri la emo prizoni lin? Post forkuro de la papo ili iĝis plenaj regantoj de la koncilio, kaj se ili volas havi nenion kun lia prizonado, ili, kiuj enlogis lin en la prizonon, ĉu tio ne estas tempo por la reĝo Sigismondo veni kaj liberigi lin? „Turniĝu rapide al la sinjoro reĝo,“ petas Hus Johanon el Chlum, „ĉar prokrasto estas danĝera.“ Kiu alia nun posedas la ŝlosilon de lia karceron ol Sigismondo? „Cetere, kion mi petus de vi, komprenu rapide kaj bone,“ skribas Hus al sia amiko. Fidela kaj honesta Chlum konis zigzagojn de la pensmaniero de Hus, ni povas nur hipotezi, kion li devis kompreni r a p i d e kaj b o n e . Kio ĝi estis, ke tion ne povus surhavi eĉ papero, sendita per fidindaj manoj? Ĉu Hus postulas rapidan ĉevalon kaj veston por ŝanĝi aspekton, por ke li povu post liberiĝo de dominikanoj forkuri el Konstanco? Apenaŭ, ĉar plue li skribas: „Mi timas, ke la administranto de la papa kortego ne transportu min nokte for; nome, ĉinokte li restis en la klostro.“ Tio estas dua grava sciigo al Chlum: la papa ĉefprizonulo, tiom signifa, ke per li oni povus ĉantaĝi, timas esti forrabita de Cossa. „Se vi amas la kompatindan anseron,“ uzas Hus sian triste ironian kriptogramon, „prizorgu, ke la reĝo donu al mi gardiston de sia kortego.“ Li tute ne volas fuĝi! Se li - kun vizaĝo nemaskita kaj sub interdikto ne revokita de Cossa kaj sen la reĝa protekta pasporto - jam eniris la koncilian urbon, kie li ruze estis ĵetita en prizonon, li volas atingi precipe nun, kiam post la forkuro de papo kaoso regas en la koncilio, celon, pro kiu li venis: publikan aŭdiencon! Reĝo igu gardi lian prizonon. Kaj nur poste li alskribas frazon, kies sovaĝan esperon kvietigas la rezono: „Aŭ li liberigu min ĉivespere el la prizono.“ Se Sigismondo volos, nun li povos lin liberigi. Ho, se li povus esti ree en la afabla domo de vidvino Frida. Finverki la predikon por la koncilio! Ĉirkaŭbraki la amikojn! - kaj la prudento senĉese kvietigas la tremetantan koron. Estas vere kortuŝa, ke la eblon de sia liberiĝo Hus metas nur sur la duan lokon. Kvietiĝu, mia koro, kvietiĝu, ne prenu forton de mia persisto kaj de mia prudento kaj de mia volo.

La letero konserviĝis, ĝi do estis enmanigita al la adresato; kion faris Chlum, ne estas konate. Multon li ne kapablis, se entute ion. Reĝo Sigismondo post interkonsiliĝo kun la restintaj kardinaloj transdonis la ŝlosilon de la prizono de Hus al la konstanca episkopo Oto III., kiu ankoraŭ dum tiu Palmodimanĉo je la deka vespere transportigis la prizonulon al sia fortikaĵo Gottlieboj proksime de Konstanco. Sigismondo estas granda ludanto kaj ne rezignas facile de siaj profitoj. Havi Hus en prizono estas lia plurobla sukceso kontraŭ la hereza Bohemio, lia jam baldaŭa heredaĵo: Hus, la danĝeran herezulon, li tenas en ŝako, sed ankaŭ la bohemiajn sinjorojn, kiuj propetas lin; kaj diskvalifikas sian fraton Venceslaon, kompromititan en la tuta Eŭropo pro subteno

de la herezo. Per Hus li regas ankaŭ super la koncilio, la patroj sopiras puni la herezon; kaj kiam li kaptos ankaŭ Baltazon Cossa, li denove fariĝos mastro de la koncilio kaj ankaŭ de la centra Eŭropo.

En brilo de torĉoj ducent soldatoj transportis Hus boate laŭ la fluo de Rejno, tiom ili timis, ke iu povus lin liberigi. En Gottlieboj, obskura burgo, ili metis lin en turon; li havis sufiĉe da aero, sed ankaŭ da malvarmo, estis nur marto kaj de Alpoj kaj de la lago blovas. Kelkajn semajnojn poste Sigismondo kaj la kardinaloj enkarcerigos ankaŭ la detronigitan papon, ili kaptis lin pli frue, ol li sukcesis transiri Rejnon. Sed Baltazo Cossa, origine filo de pirato kaj sorte papa murdinto, kies nomon Johano XXIII., por purigi ĝin, post kvin jarcentoj akceptos viro, pli proksima al Hus ol al liaj juĝantoj, certe estis prizonata en la episkopa privata alo, dum al Hus ili fiksis sur la piedo ringon, per kiu li estis katenita al muro. Nokte ili katenis ankaŭ lian manon. Cossa estis de la nova papo liberigita kaj denove nomumita kardinalo, sed pri Hus la kardinaloj kaj la reĝo esperis, se li ne mortos en Gottlieboj, almenaŭ la peza karcero lin rompos.

Paskon travivis Hus en katenoj kaj soleco, sen diservoj kaj sakramentoj. „Ĝoju ĉiuj,“ li skribis unu du semajnojn antaŭ fortreno al Gottlieboj, „vi, kiuj estas komune sub la Sinjoro, salutu vin reciproke kaj preparu vin, por ke vi povu antaŭ paskaj festoj digne akcepti la korpon de la Sinjoro, kiun mi, dum ĝi estas sakrilegie akceptata, jam longe ne havis kaj ankoraŭ longe ne havos, ĝis kiam Dio deziros. Nenia miro, ankaŭ la sanktaj apostoloj de Kristo kaj multaj aliaj sanktuloj suferis pro la sama manko en karceroj kaj dezertaj loĝujoj.“ Sed ĉiam, ankaŭ antaŭe, kiam li troviĝis en granda angoro, lia kredo kaj lia fantazio alvokis Kriston plej proksime, do estus mirige, se dum ĉi tiuj teruraj tagoj kaj noktoj, kiam la espero pri la publika aŭdienco kaj pri la libereco rompiĝis per la perfido de Sigismondo kaj kiam ne eblis diveni, ĉu oni volas lin ĉi tie mortigi senspure aŭ nur forturmenti ĝis forgeso, li ne eksentus eĉ fizikan kuniĝon kun tiu, pro kies vero li batalis. En sia ĉambreto en Betlehemo onidire li havis Kriston bildigitan sur la muro kaj ne estis ne ebla, ke en Gottlieboj, kiam li fermis siajn okulojn, la bildo de la amata Sinjoro projekciĝis sur la ŝtonan muron. Lia Pasko, mia Pasko. Donu forton, Sinjoro, por ke mi kapablu sekvi vian ekzemplon. Li sciis jam en Bohemio, ke oni lin foje mortigos, plurfoje li jam povis elekti cirkonstancojn de la morto kaj nun li certe dankis Dion pro la saĝo prokrastanta la decidon. En Bohemio kaj aliloke multaj mortadis pro la Dia vero, sed la mondon ili ne skuis; se li mortos en Konstanco, ĝi havus signifon.

En Bohemio! El la fenestreto li eble ne vidis direkte al la hejmo, eble li havis en la ĉelo eĉ nenian fenestron, tra kiu li vidus pejzaĝon. Li promenis en la kriptoj, la katenoj knartintis kaj - pense en la hejmo - li ĉehlingve kantis. Li kantis ĉiujn siajn kantojn, kiujn Zbyněk Hazmburk malpermesis kanti en Betlehemo; kaj li komponis novan ĉeĥan kanton, kiel denuncos lin pri tio liaj malamikoj. Kanton pri Kristo, kiel alie. Li kantis, kaj post la fermetitaj okuloj li povis troviĝi kun Kristo hejme. Hejme? En Betlehemo? Sub la tilio? Ĉe la sinjorino reĝino? Ĉe la universitato? Li hejmas eble ie en la ĉielo, la menso strange disfendiĝis: la ekzistantan mondon li volas krei kiel bonan; kaj ĉar la mondo estas malbona, saturita de malico, li sopiras samtempe pri la ĉiela ripozo. Aŭ en la psalmaro, kiun ili ne forprenis de li, estis kelkaj neskribitaj paĝoj, aŭ oni donis al li plumon, inkon kaj kelkajn paperfoliojn, kiam rekomenciĝis la enketadoj, li verkis kaj kaŝis sur la korpo du leterojn. „Se ni estos kunuloj de Kristo en afliktoj,“ li skribis en letero al siaj adeptoj en Prago, Louny, Žatec kaj Pilzeno, „ni ĝojos kune kun Kristo; sed ni ne suferas pro niaj agoj kiel murdistoj kaj rabistoj, ni suferas kun Kristo senkulpe, por akiri la vivon eternan.“ En alia letero li komponis kanton por sinjoro Henriko Ŝkopek el Dubé kaj la surskribitajn foliojn li kontrabandis reen al Konstanco. Sed tio estas ankoraŭ malproksima. Nun li kantas kaj subiĝas al la Diaj decidoj. Kiu kantas, nutras la spiriton per espero. Kiu kantas, esprimas infanan purecon. Kiu kantas, malfermas la koron al la afableco.

Certe li ankaŭ longe preĝis. Li surgenuiĝis ĉe la ŝtona kuŝejo kaj vorton post vorto kortuŝe kaj pli kompreneme perceptis la enhavon de la preĝoj. Tuj antaŭ la fortreno al Gottlieboj li skribis al siaj ĉeĥaj amikoj en Konstanco: „Nur nun mi lernas kompreni la psalmaron, ĝustamaniere preĝi, mediti pri la humiligo de Kristo kaj suferoj de martiroj, ĉar diras Jesaja: ‚Sufero donas komprenon‘. Kaj aliloke li diras: ‚Kion scias tiu, kiu ne estis ekzamenata per sufero.‘ “ Kaj lasita al si mem, en

katenoj, malproksimigita de la proksimuloj, de kiuj li rajtis ricevi eĉ ne minimuman sciigon aŭ papereton, malsana, sur ŝtona kuŝejo, ĉe malbona manĝo, turmentata de disenterio, tremfebros kaj dentdoloro, li sendube rifuĝadis al rememoroj.

Kaj rakontanto povas pentri, kion Hus plej verŝajne rememorus, se li motivite vicigus la eventojn de sia vivo, certe laŭ la vero kaj sen unu sola elpensajo, sed tamen limigita de tio, kio pruvita konserviĝis al ni el tiu dista pasinteco. Ekzistas multaj periodoj, tre signifaj, pri kiuj ni havas eĉ ne unu ateston, ekzistas aliaj, kiujn konfuzas nekompletaj indikoj. Tamen eĉ tiamaniere konserviĝis sufiĉe, por ke la rakontanto povu kun bona konscienco skribi, ke kion li nun intencas rakonti, estas la plej granda homa travivaĵo de la ĉeĥa historio.

Trad. M. Malovec

## Ĉapitro dekonua: LA KAVALIRO DE KRISTO

La historion de Hus de si nedisigeble kaj neforigeble formas du agadfontetoj, la eventoj hejme kaj la evoluo de lia proceso ĉe la kurio, unu influas la alian. Kiam jam ŝajnis, ke li akiros la justecon ĉe kardinalo Francesco Zabarella, la papo, pli frue ol Zabarella povis eldiri la verdikton, transdonis la proceson al la kardinalo Rainaldo de Brancacis, supozeble sia parenco. Páleĉ tiun ĉi turnon poste en *Antihus* sufiĉe kalumnie klarigos tiel, ke post kiam Hus ne sukcesis aĉeti al si ĉe la papo favoran verdikton, li ŝanĝis sian opinion pri la papo, kaj prezentos altan sumon de 1 100 oraj florenoj, kiujn la proceso al Hus kostis. Temas pri tiu mono, pri kiu Hus parolis en la Betlehema kapelo kaj por kiu li al ĉiuj donacintoj laŭnome dankis, kaj kiu ne estis destinita por korupti la papon, sed por kovri la certe multekostan restadon de la tri advokatoj de Hus unue en Bolonjo kaj poste en Romo. La nova juĝisto sendube faris nenion kontraŭ Hus, sed ankaŭ nenion por li, nur dum duono de jaro li prokrastis kian ajn traktadon kaj ankaŭ decidon kaj la reprezentantoj de Hus insistis pri fino de la proceso, ĉar super Hus plue dominis persekuto kaj anatemo de Collon.

En la jurista konflikto pri tio, ĉu Hus, alvokitan al tribunalo, rajtas iu reprezenti, la eksperto pri la juro Zabarella pravigis Hus; post la decido de Collon li deklaris la kazon kontraŭleĝa, ĉar ne estis aŭskultitaj la reprezentantoj de Hus, kaj li fiksas novan proceson, en kiu ili povus opinion esprimi. Sed ĝi estis decido nur laŭprocedura, tamen eĉ per ĝi magistro Jan de Jesenice, magistro Marek de Hradec kaj magistro Mikuláš de Stojčín fariĝis danĝeraj al la plendantoj kontraŭ Hus; kaj nome tiom pli, ke Jan de Jesenice estis senkondiĉe lojala al Hus kaj plie li estis sagaca kaj kapabla juristo. Tial Michal de Causis komencis la proceson ankaŭ kontraŭ Jan de Jesenice; li komencis ĝin jam en la jaro dekonua kaj en la jaro dekdua li sukcese finis ĝin. Unue li mem plendis kontraŭ Jesenice pro iaj ofendoj kaj poste li aliĝis al la plendo de la samlandano Ŝimon Burda. La plendo de Burda, kiun en Bohemio esploris la ĉefdiakono de Žatec Zdeněk Dlouhý de Chrast, tiu, kiu ekflamigis la ŝtiparon kun la verkoj de Wicleff en la ĉefepiskopa korto, koncernis iun perforiton aŭ vundon en la maltrankvilaĵoj dum la interdikto de Zbyněk. Ĉe la kurio la afero estis komisiita al la aŭditoro Johano Belli, sed kiu la akuzon redonis; de Causis postulis alian juĝiston, kaj la aŭditoro Bernald de Wildungen poste la proceson efektive komencis. Jan de Jesenice defendis sin per plendo kontraŭ la neobjektiveco de Michal, kiu la akuzon jure senvalorigis: Michal lin januare en Bolonjo kaj junio en Romo, sur Campo dei Fiori kaj en la preĝejo de S-ta Petro, nomis viklefano kaj herezulo, kiu rilatas kun la plej malbona herezula sekto; Michal tiujn ĉi ofendajn deklarojn simple neis. Li neis ilin, kaj jam fine de la dekonua jaro li akuzos Janon de Jesenice – pro viklefa herezo.

Ankaŭ por ni la akuzo estas interesa. En junio de la dekonua jaro laŭdire Jesenice en la palaco de la hospitalo de Rožmberk deklaris, ke „iuj diras pri Hus kaj pri mi, ke ni estas herezuloj, sed laŭte ili tion ne kuraĝus diri, eble nur sekrete, kaj eĉ se ili dirus, ni volas kun ili procesi ĝis la fajropuno.“ Michal Jan de Jesenice kulpigis, ke li nomis Hus amiko, kiun li volas necedeme defendi kaj ke li minacis, ke iuj el la akuzantoj de Hus ne rajtos reveni en Bohemion. Sed tion Jesenice prognozis ĝuste: eĉ tia Ŝimon Burda, viro alie nesignifa, pro la partopreno en la kondamno de Hus troviĝis eĉ tuj sur la dua loko de la tiel nomata husana pilorio, listo de personoj, kiujn la husana Bohemio punus per morto; sed en la turbulentaj tempoj eĉ Jesenice, pro kiu estos post la morto de Hus proklamita interdikto super Prago, sed kiu post eksplodo de la revolucio enviciĝos en la universitato al la modera alo, komplezema interkonsenti kun la nova papo, ne finiĝis bone: jam en la dekdua jaro li pereis en la malsatmortigejo de Oldřich de Rožmberk, de tiu, al kiu apartenis la hospitalo, kie Jesenice paroladis tiom memkonscie.

Michal la Jan de Jesenice akuzis ankaŭ pro liaj disputeldiroj ĉe lia promocio en la sepa jaro kaj atribuis al li ankaŭ ĉiujn artikolojn el la akuzoj kontraŭ Hus kaj atingis, ke la advokato de Hus estis ĉe la kurio retenita. Kiam kun Marek kaj Mikuláš ili urĝis Brancas-n, ke li jam fine decidu en la afero de Hus, la kardinalo malpermesis al ili plu Hus reprezenti; li instigis ilin, ke ili ne plu venadu al li, „li ne volas ilin aŭdi, kiel estas ordonite de la papo“. La reprezentantoj de Hus elektis la plej lastan pruvon, ili proponis, ke ili estas komplezaj submeti sin al la morto per fajro, se oni pruvos al ili la herezon, kaj la papo igis Jan de Jesenice anstataŭ aŭskultado en marto 1412 aresti kaj

enkarcerigi. Jesenice sukcesis fuĝi el la arestejo kaj el Romo, li fuĝis al Bolonjo, kie en la universitato li komencis prepari sin por doktora ekzameno pri juro. La magistro Marek de Hradec revenis en Pragon, kie li estis elektita universitata rektoro kaj li kondutis kuraĝe en la urbodomo, kaj en Romo restis jam nur Stojčín.

Iam antaŭ la somero de 1412 al la kurio venis pluaj akuzoj de la pragaj kanonikoj kaj Michal surbaze de ili prilaboris novan prezentaĵon al la papo: li memorigis en ĝi la proceson de Hus, li petis, ke la decidoj de Zbyněk estu aprobitaj kaj Wicleff kaj Hus estu sen nova traktado, por kiu decidiĝis Zabarella, kondamnitaj. La prezentaĵon oni opinias kontraŭjura, ĉar ĝi ne respektas la decidon de Zabarella denove komenci la esploradon, la decido, per kiu post la anatemo de Collon la proceso eniris en novan fazon, kiun eĉ Brancas ne abolis. La papo en junio komisiis la proceson al kardinalo Petro degli Stephaneschi, tiu tute malatentis la decidon de Zabarella, postsekvis la decidon de Collon kaj jam en julio, monaton post sia komisiigo, trafis Hus pro neĉeesto per malfaciligita anatemo. „La pragaj kanonikoj instalas Michal paroĥestro ĉe la S-ta Adalberto... kaj tiel pritraktis por mi anatemon,“ skribos Hus. Samtempe estis la 29-an de julio proklamita anatemo ankaŭ super Jesenice en Bolonjo, Mikuláš de Stojčín provis la kondamnon de Petro kontraŭ Hus nuligi, sed oni rifuzis lin, ke li protektas herezulon, kaj tial ankaŭ li revenis en Pragon.

La pli peza puno de Hus, la pligravigo aŭ pliakrigo de la anatemo – de la origina anatemo de Collon – konsistis en tio, ke neniu rajtis interrilati kun li, sole se ree sub la puno de anatemo, kaj ke lia servistaro ne rajtis partopreni la diservojn; ekskomuniko minacis al ĉiu, kiu ĉeestus lian predikadon, lian prelegon, meson. Post la pligravigo la anatemo havis pliajn ŝtupojn, la tiel nomatan repligravigon, denovan malfaciligon: se Hus ĝis dudek tagoj post la proklamo de la pligravigo ne submetos sin al la ordono, por tri tagoj kaj ankoraŭ unu tago post lia foriro devus esti la loko, kie li restadis, subigita al interdikto; kaj se li ne pentofarus ankoraŭ ĝis la pluaj dek du tagoj, devus esti super la lokoj de lia restado proklamita interdikto ĝenerala kaj tiu devis daŭri ankoraŭ tri tagojn post la foriro de Hus. Sekve se Hus ne humiliĝos, la verdikto de Petro faris el li parion, kaj ne nur el li: la anatemo en la egala amplekso de la pligravigo kaj repligravigo koncernis ĉiun, kiu rilatus kun li aŭ defendus lin, protektus lin.

La verdikto de Petro ordonis ĉiujn fazojn de la puno, la pligravigon kaj repligravigon, proklami per solena maniero, la eklezio havis por tiuj ĉi hororigaj ceremonioj precizan direktivon. La anatemon de Hus estis decidite proklami en ĉiuj preĝejoj dum la dimanĉaj kaj festotagaj diservoj kaj lian ekskomunikon devis demonstri la perforte estingitaj kandeloj, ĵetataj sur la teron. En la fazo de repligravigo devis la abatoj, prioroj kaj paroĥestroj en plenaj ornatoj dum la meso kun levitaj krucoj kaj brulantaj kandeloj konigi kaj tiun ĉi ankoraŭ pli pezan anatemon, kaj ankaŭ la lokojn trafitajn per interdikto, kaj dum kantado de ceremoniaj kantoj kaj kiel signon de eterna malbeno ili devis en la direkto al la loĝejo de Hus ĵeti tri ŝtonojn. Se Hus en tiu ĉi anatemo estus mortinta, li ne rajtus havi eklezian sepulton, kaj se li jam estus enterigita en templo, li devus esti eltombigita kaj ĵetita ekster la konsekritan teron.

Sed per la interdikto estis punataj ĉiuj kredantoj en la afero tute indeferentaj, ĉar ne estis permesite aranĝi ekleziajn ceremoniojn, sepultojn, baptajn, nuptajn, la vespermanĝon de la Sinjoro estis permesite prezenti nur al malsanuloj kaj la mesoj povis okazi nur post fermitaj pordoj de temploj, do sen laikoj; la interdikto devis ne nur puni kaj elvoki timon, sed ankaŭ indignigi la kredantojn kontraŭ Hus. Tiaspeca peza puno kompreneble povis nur akceli la transformon de la skismo origine laŭkoncepta en la skismon faktan; la tranĉo kiel ajn akra, kondukis dume tra katedroj, sinodaj kunsidoj, universitataj kunvenoj, predikaj pupitroj; la interdikto trafis la plej fundamentan aferon en la eklezio, la ceremoni-praktikon, kaj entiris en la konflikton ĉiujn kredantojn. En Prago estis tiutempe tiom da belegaj preĝejoj, per la kolonaroj kaj pintoj de arkaĵoj kaj turoj ili per penso tuŝis Dion, kaj sube ĉe altaroj tra ili trablovis la kolerema spirito de la anatemo kaj interdikto.

En la rigida protekto de la institucia potenc-regado la roma eklezio tenis la plej terurajn inkviziciajn rimedojn tra la tuta renesanco kaj baroko, sed jam en la tempo de Hus, pensmaniere al la mezepoko ankoraŭ sufiĉe proksima, estas tiuj ĉi forpuŝaj punoj, home maldignaj kaj neniigaj, sentataj kiel malkonvenaj kaj rifuzindaj. Ne estas tute klare, kio ĉio el la preskribita puno de Hus en

Prago efektiviĝis, eble pli multe ol malmulte kaj plej multe en la unua impeto de pasioj post ĝia publikigo; ke la interdikto por Hus estis proklamita, ne estas duboj, sed ĝi estis proklamita ankaŭ por la adeptoj kaj plendantoj de Hus; samtempe la oficiala praga eklezio kuraĝis agi nur tiom, kiom permesis al ĝi la reĝo, kaj estis tutaj monatoj, kiam Hus en Prago estis kaj la interdikto ne validis. Sed pragaj paroĥestroj, abatoj kaj kanonikoj certe ne lasis pasi unusolan okazon por trafi la malamatan herezulon. Fine Hus estis sub ilia potenco! Li, kiu ilin en predikejo kaj en sinodoj kalumniis kaj mallaŭdis. Fine ili povis estingi kandelojn kaj ĵeti ŝtonojn! Sed nepre ne eblas diri, ke la fine efektivigita puno por Hus firmigus la pozicion de la oficiala eklezio; ĉefe ĝi ekscitis rankoron.

Historiistoj ree disputas pri la tempa sinsekvo de la eventoj, kiu estas ĉi-loke grava pro laŭkaŭza vicigo de la iniciato kaj de la sekvo ankaŭ pro tio, ke ĝi malkaŝas la starpunktojn de Hus kaj entute ke ĝi esprimas la dramecon de la momento. La verdikton de Petro en Pragon alportis la alta kuria rangulo kardinalo Johano nomata la Lisbona, li devis ĝin evidente helpi realigi; oni ne scias precize, kiam tio estis, sed pli vere post la 4-a de septembro, kiam Štěpán Pálež havis la kontraŭviklefan predikon en Týn kaj pri la verdikto li ne parolis. La verdikto elvokis entuziasmon ĉe malamikoj de Hus, sed ĝi ankaŭ renkontis reziston. „Voĉoj tre energiaj“ laŭdire la anatemon pri Hus proklamis nejusta, la malpermeson de kontakto kun Hus neprudenta, la plivastigon de la anatemo al favorantoj de Hus kontraŭjura kaj la ceremoniojn ĉe publikigo de la buleo ofendaj. Verŝajne protestis personoj eminentaj, ĉar la ĉefepiskopo ne publikigis la buleon, sed kunvenigis la pragan klerikaron, por ke ĝi decidu pri ties akcepto. La magistro Albík la ĉefepiskopan oficon jam forlasis, sed Konrád ĝis nun ne estis de la papo kiel ĉefepiskopo aprobata, li nur la 8-an de oktobro ekadministris la ĉefepiskopejon, kio inter aliaj signifis, ke la ĉefepiskopo kaj la reĝo por tiu ĉi tempo la papon bezonas. Ĉe tio oni rapidis ŝanĝi la ĉefepiskopon, por ke ĝi efektiviĝu en la sama jaro, en kiu Albík estis de la papo aprobata; tiam oni al la kurio por la aprobo de la nova ĉefepiskopo pagis malpli grandan depagon.

Konrád sekve kunvokis kunvenon de klerikoj kaj komentarion al la punbuleo prezentis la juristo Jiří de Bor, kiu kontraŭ ĝiaj kritikistoj argumentis, ke la procedo de la kardinalo Petro estis ĝusta kaj laŭ la kanonika juro; Hus, ĉar li asertas, ke la papo ne estas senpera anstataŭanto de Kristo, ne rajtas pardoni pekojn kaj doni indulgencojn, Bor jam opinias konviktita herezulo; ĉe la fino de sia parolado Bor avertis, ke la diskuto kun herezuloj estas danĝera kaj diris, ke la reformacia movado havas trajton de skismo.

La kunveno decidis la buleon akcepti kaj realigi. Stanislav de Znojmo al tio skribis en traktaĵo pri la eklezio: „La procesojn kontraŭ la magistro Johano Hus akceptis la pastra komunumo en Prago kaj ili vekis kverelojn.“

Historiistoj malsamopinias, ĉu tiu ĉi kunveno de klerikoj okazis eksterordinare jam iam en septembro, aŭ ĉu la buleon aprobis nur la ordinara sinodo la 18-an de oktobro, kaj ili disopinias eĉ en tio, kiam la buleo estis publikigita kaj ekde kiam oni komencis kalkuli ĝiajn tempolimigojn, aŭ ekde kiam kaj ĉu entute validis la interdikto. La historiisto Jan Sedlák, ĉefe por pruvi, ke Hus pintigis la aferon ĝis ekstremo kaj ke ĉiam nur post lia gradigita kontraŭstaro sekvis gradigita puno, asertas, ke la interdikto estis proklamita jam la 28-an de septembro; sed ĝuste tiun tagon posttagmeze Hus predikas en la Betlehema kapelo, li parolas pri la vortoj de S-ta Paŭlo, ke li estas kompleza esti katenita kaj morti kiel Kristo en Jerusalemo, kaj pri si li diras: „Kaj sekve ankaŭ mi, ĉar mi estis persone juĝe persekutita ĉe la Roma kurio pro la evangelio, kial, se tio estis volo de Dio, mi ne estus kompleza ne nur veni, sed esti katenita kaj morti kun helpo de Sinjoro Jesu-Kristo?“ Ĝi estas frazo hipoteza kaj tiom modera, ke ĝi malfacile povus esti dirita, se la interdikto estus jam valida.

Eble la buleo estis akceptita kaj proklamita fine de septembro kaj la 18-a de oktobro povis esti la templimo de la dudek tagoj, komencantaj la validon de la interdikto. La regula sinodo poste estus proklamanta la interdikton kaj la 18-a de oktobro estus efektive la noda tago, ĉar Hus kun sia sento por dramecoj de la momento kaj gesto ĝuste en la tago de la okazo de la regula sinodo la buleon de Petro publike rifuzos kaj publikigos sian apelacion for de la papo al Kristo. Li faros tion dumaniere, la apelacion li prezentos en la predikejo de la Betlehema kapelo kaj ankaŭ igos pendigi ties tekston

en pordego de la Ŝtona ponto. Kiam tie iros klerikoj trans la ponto en la ĉefepiskopan palacon por la sinodo, ili tralegu ĝin.

Alia ebleco estas, ke la buleo estis akceptita kaj proklamita nur de tiu ĉi regula sinodo kaj nur ekde la 18-a de oktobro oni povus komenci kalkuli la tempolimojn de la unuopaj fazoj de la puno; iuj historiistoj eĉ opinias, ke la apelacio de Hus al Kristo emis influi la traktadon de la sinodo, por ke ĝi la buleon ne akceptu. En tia kazo la buleo devus esti konata en kuloaroj jam pli frue, kiam Bor en la kunveno de klerikoj frontis al ĝia kritiko kaj kiam Hus kapablis prilabori la apelacion kontraŭ ĝi. En la supozon, ke en la sinodo estis proklamita la interdikto kaj la buleo mem jam validis, ĝene enfalas ankaŭ la prediko de Páleč. Li prezentis ĝin en la Gaŭla preĝejo iam en oktobro, espereble eĉ dum la festo de S-ta Gaŭlo la 17-an de oktobro, do antaŭvespere de la sinodo. Ĝi estas prediko akre kontraŭhusa, sed tiom pli konfuzas, ke Páleč ne parolas ne nur pri la interdikto, sed eĉ ne pri la valido de la buleo. Kio ĉio pruvus, ke nur en la sinodo la 18-an de oktobro estis akceptita kaj proklamita la buleo mem kun la minaco de interdikto kaj Hus, kiu povis la buleon koni, kiam pri ĝia akcepto oni tiom da semajnoj batalis kuloare, ĝin publike rifuzis.

Estu tiel aŭ alie – la leganto neniam havu iluziojn, ke el la historio oni povus ekscii, „kiel ĝi efektive okazis“ - ni, sen troa fabulado, povas imagi du virojn, kies vivoj dramoplene reciproke trapenetriĝis, kiel ili en la sama tago okazigas du profunde kontraŭajn aferojn. Hus verkas, certe kun helpo de amikoj, sian gloran apelacion al Kristo kaj transdonas ĝin al skribisto por ĝin kopii por la Pontoturo, kaj Páleč predikas ĉeĥlingve en la Gaŭla preĝejo. Ke li predikas ĉeĥlingve, montras, en kiom vastan sferon jam la konflikto enkreskas kaj ke Páleč klopodas fronti al Hus en lia propra medio; la escepteco de la ĉeĥlingva prediko de Páleč estas tia, ke iuj historiistoj el ĝi eĉ konkludas, ke la interdikto jam estis valida kaj la popola publiko de li estis timigita, kiam Páleč povis permesi al si esprimi ĉeĥlingve tion, kion li diris ĉe Gaŭlo.

Kiel pli frue latinlingve en Týn, ankaŭ ĉi tie li priskribis Wicleff kiel arogantan herezulon, kiu siajn herezaĵojn sagace kaj atenteme ĉirkaŭbaris per la Skribo, tiel ke estas necesa granda klereco kaj sagaco por malkovri liajn herezojn. Ja la ideojn de Wicleff prezentis la klerulo Páleč en tre simpligita formo, sed la atakon kontraŭ la viklefanoj li celis precize en la centron de la afero: „Liaj verkoj,“ li diris, „estas la sekretaj akvoj, kiuj al multaj tiom dolĉiĝis, ke ili ne hezitas por ili fordoni sian vivon, kiel ĉe la antaŭnelonga ekzekuto estis videble. Kaj tio estas granda signo de la herezeco, ĉar el ni neniu fordonus sin pro la kredo al morto.“ Tiun frazon ni bone ekkonsciu, ĝi estas la elirpunkta pozicio de Páleč: ne fordoni sin pro la kredo al morto; super tiu ĉi pozicio Páleč volbas la tutan sian teorion. Se la volonteco morti por la kredo estas herezo, tiam malherezo estas obeemo: kiu ne superigas la kredon super la morton, kiu subigas la kredon al obeemo, tiu ne estas herezulo. La leganto, bonvole, nun entute ne legu etikan malaprobbon, la pozicio de Páleč ne devis esprimi nur la poltronecon de la homo, timanta pri sia vivo. Decidiĝi por la disciplino de obeemo estas la decidado principa.

Sed poste Páleč, por povi ataki Hus, ke li rifuzis iri en Romon por esti juĝata kaj por malhonorigi lin, ekparolas kontraŭsence kaj nelogike. „Sed la kredo de liaj adeptoj estas plena je angoro, nenien ili kuraĝas iri kun ĝi. Ĉar se ili venus en Romon aŭ en Germanion kaj ne rezignus pri ĝi, ili estus kiel herezuloj brulmortigitaj.“ Estas do signo de herezeco ne heziti fordoni sin pro la kredo al morto, kiel tion faris tri junuloj kaj pluaj, kiuj proponis sin al la ekzekutisto, kaj samtempe la kredo de viklefanoj estas plena de angoro, ĉar ili estus pro ĝi brulmortigitaj. Por sia persono Páleč tiam proklamis: „Sed ni kun nia kredo povas sekure iri ien ajn.“ La nepran sekurecon al la kredo de Páleč garantias, ke ĝi estas kredo al decido de superuloj. Kaj per tio ambaŭ viroj ankaŭ diferencas, ĉar dum Páleč klopodas, ke li ne estu per sia kredo kaj per sia agado herezulo, Hus la veron, do la kredon, kiun li kredas, defendas, eĉ se li pro tio estus deklarita herezulo. Kaj tio estas ankaŭ la signifo de lia apelacio disde la ekskomunikiga buleo de Petro.

La invoko de Hus al Kristo estas ago surpriza, aparta, neŝablona, neatendita, nova, kuraĝa, nekutima, ŝoka, ĝi estas ago graveg-cela. Ĝi estas genia ideo, liberiga solvo. Ĝi estas la pinto de la historio de Hus, ĉio plua, pri kio Hus estos decidanta, devenos el tiu ĉi decido kaj strebos jam nur al ties plenumo. Laŭ la eklezi-jura flanko eblas diri, ke Hus rifuzis la punon kaj la juĝon de la institucio, en kiun li apartenas kaj al kiu li estas subordigita, kaj li apelaciis al ties spirita principo,



al Dio. Li estas pastro kaj en la okuloj de la institucio ĝi estas orgojlo senmezura; Hus klarigos en *Postilla* sian agon jene: „Al lia sankta graco mi fordonis mian proceson, por ke li finu ĝin, kiel li bonvolos, ĉu eĉ per mia malaprobo flanke de homoj, ĉu per morto, sed de sia vero li ne apostatigu min“. Jam sole el tiu-ĉi frazo estas evidente, ke la ekspliko koncerne la invokon de Hus al Kristo neelĉerpeblas nur pere de institucia vidmaniero.

Hus mem pri la dolorigaj kaj ankaŭ dubaj punktoj de sia agado estas konscia eble multe pli profunde, ol liaj kritikantoj, kaj al sia agadmaniero ĉe la proceso li ankaŭ senĉese revenas. En la prediko por la kvara dimanĉo fasta en *Postilla* li analizas, kial „pro la timo antaŭ malamikoj ne venis Jesuo al la ŝafidfesteno en Jerusalemon“. Unue - li kondutis laŭ la Dia volo; due - per tio, ke li evitis morton, li ne vidigis malpli grandan bravecon, ol Johano la Baptisto, kiun oni senkapigis, sed male li volis montri sian potencon, konsistantan en lia propra decido, kiam kaj kiel li mortos; kaj trie - li prezentis ekzemplon al posteuloj, „kiam ili devas atenteme foriri de siaj malamikoj“. Tiuj, skribos Hus, kontraŭ kiuj estas koncentrita la ĉefa malamikeco, estas antaŭ Dio senkulpigitaj, kiam ili ne venos por morti. „Kaj sammaniere, mi esperas je Dio, estas senkulpigita ankaŭ mi, ke estante juĝe persekutita, mi ne staris en Romo antaŭ la papo.“ Ĝi estas tute alia starpunkto, ol tiu de Páleč: por ke li „povu kien ajn“, Páleč rezignas pri kredo kaj ellaboras por si la kredon permesitan; Hus, por ke li la kredon tenu kaj povu ĝin disvastigi kaj defendi, evitos la antaŭtempnan morton; kaj li evitos ĝin per tio, ke li super la papon starigos potencon pli altan, Kriston, kaj per la invoko al Kristo li sentas sin esti malligita el la maljusta juĝo de la papo kaj ankaŭ el lia puno. Sed la vojo al morto per tio ne fermiĝas, ankaŭ la historio de Kristo finiĝas per perforta morto, tio ĉi nun estas prokrasto, forŝovo, en la fina ebla perspektivo la morto ne malaperas. Ĉe tio la decidadon de Hus potence influis ankaŭ la sperto de Páleč: li ne iris en Romon, ĉar ĉe la kazoj de Páleč kaj Stanislav li eksciis, kio tie minacas; kaj estas demando, kiel estus evoluanta la sorto de Páleč, se Páleč ne trairus Bolonjon.

Por ke ni eniĝu en la rezonadon de Hus, ni citu el *Postilla*, kiujn motivojn de sia pardonpeto antaŭ Dio Hus elnombras. U n u e - dum tri jaroj li sendadis al la kurio siajn anstataŭantojn, kaj ili ne estis aŭskultitaj, ili estis kaptitaj kaj enprizonigitaj, „ĉar la veron ili postulis“. La d u a n kaj la t r i a n motivojn li prezentas objektivaj - „pli malproksime estas el Prago en Romon, ol de la transmara Tiberiado en Jerusalemon“ kaj „ne estas en la leĝo de Dio ordono, ke tiel malproksimen en Romon ili homojn vane pelu“. La laŭvorta komparo de la realaĵo kun la Skribo povas al ni soni simplanime, sed ambaŭ motivoj apogas sin je valida kanonika preskribo, ke la plendita ago estu esplorata kaj juĝata en la loko, kie ĝi okazis, kaj je la decido de la Laterana koncilio, ke al la juĝisto ne devas esti pli ol du tagoj da vojaĝo. K v a r e - li ne iris antaŭ la papan tribunalon, ĉar „ĉe la papa kortego estas malmulte da vero“ kaj en la k v i n a kialo li tion klarigas: „...mi senigus la popolon de la vorto Dia“, li ne povus prediki kaj disvastigi la veron de Kristo, „kaj sola survoje kion bonan mi povus fari? kaj se mi al la kortego venus, kiun sanktecon mi akirus tie? nur konfliktojn kaj ĉu mi volus simonii“. En la s e s a motivo Hus pensas pri tiuj, kiuj kontribuis al li por la proceso – „multe da almozo mi vane elspezus“. S e p e - li estas senkulpigita, ĉar li konfliktas kun la papaj kutimoj kaj kun lia potenco, kiu „ne estas pruntedonita de Dio, sed de diablo elpensita“. Tiun ĉi motivon li demonstras ĉe la buleo de Aleksandro, per kiu la ĉefepiskopo Zbyněk elpostulis, „ke la Dia vorto ne estu predikata libere“, kio estas „kontraŭ la evangelio kaj kontraŭ la faroj de la Savinto Jesuo Kristo, kiu ordonis al la disĉiploj, ke ili iru tra la tuta mondo, predikante la evangelion al ĉiu kreitaĵo“. Ĉi-kaze Hus larĝmezure deflankiĝas, la *Postilla*-n li verkas en ekzilo kaj la argumentado pri la rajto prediki senpere esprimas liajn proprajn spertojn. La Savinto „predikis en la dezerto kaj alfoje sur la maro starante sur ŝipo, kaj en stratoj kaj urbetoj sen preĝejoj, en vilaĝoj; kaj li diris al siaj disĉiploj, ke ili prediku ankaŭ sur tegmentoj kaj siajn servistojn ke ili voku al vespermanĝo eterna, li sendis ankaŭ inter barilojn kaj sur disvojiĝojn“. Ĉi-loke li silente priskribas sin mem, kiu ankaŭ predikas sen preĝejoj kaj inter bariloj.

O k e - „li ne staris ĉe la papa kortego, por ke li vane la vivon ne perdu“. Do ne tial, por ke li **entute** la vivon ne perdu, sed por ke li ne perdu ĝin **vane**. Ke li ekirus por vana morto, tion li pravas ĉe multsignifaj cirkonstancoj de la proceso. Unue ĉi estas multe da malamikoj, ĉeĥoj kaj germanoj, „kiuj mian morton serĉas“; kaj malamikoj, ne objektivaj juĝistoj kiuj serĉas la veron, estas por li

ankaŭ la papo kaj la kardinaloj, kiuj sen aŭdi lin nomas lin herezulo, nome ke li tuŝas ilin, „kiam li predikas kontraŭ orgojlo, kontraŭ avareco kaj precipe kontraŭ simonio“. Kaj depozicias kontraŭ li la atestantoj falsaj, el kiuj „unu depozicias, ke mi predikas, ke kiam pastro meson servas, ne estas ĉi tie la korpo de Dio“ kaj alia depozicias, „ke mi predikas, ke kiam pastro estanta en mortopeko meson servas, li ja benas panon, sed ne estos la korpo de Dio“ kaj la tria depozicias, „ke mi predikis, ke maljunulino estas pli honorinda en ĉio ol la papo“. Kaj Michal, la paroĥestro de S-ta Adalberto, en plendumo asertis, ke Hus predikas en la Betlehema kapelo herezaĵojn, estas princo hereza kaj ĉefo de herezuloj, kaj egale tiel lin nomis la juĝisto kardinalo en la buleo. „Sed tio, mi esperas je kara Kristo, ne damaĝas min, nek ĉagrenas min; ĉar mi scias, ke al la sankta graco pastroj la samon faris kaj fine lin per abomena kaj kruela morto pereigis“, „kiel deloginton kaj herezulon per brutala kaj monstra morto murdis“.

En iom pli ŝovita vidmaniero priskribas Hus la evoluon de la proceso en la libro *Kontraŭ kuirmajstro*, verkita post *Postilla*. Li komencas per la buleo de Aleksandro, kontraŭ kiu li apelaciis kiel kontraŭ hereza, la Skribon ne estimanta, kaj antaŭ ol lia apelacio al la papo venis, tiu „sian animon eligis“. „Kaj jam li trovis, ĉu bone li ordonis“, Aleksandro estas antaŭ la Dia tribunalo kaj jam li scias, kiel lian decidon prijuĝis Dio. „Poste mi sendis bonmemoran pastron Zbyněk, la ĉefepiskopon, antaŭ la papon, antaŭ kiu staris magistroj, miaj senditoj, kiuj procesis; kaj ili volis min kaj sin sub fajro devoligi, ke iu rezignu: kaj neniu kontraŭstariĝis“. La papo ne aŭskultis la anstataŭantojn de Hus, kvankam ili en la juĝejo al li vokis „aŭskultu nin, kiel vi devas fari ankaŭ al pagano, al judo, al herezulo, eĉ se diablo al vi venus kaj petus aŭskulton“. La papo „ĉiam la kapon forturnis kaj ordonis ĉiam al kardinaloj“. „Kaj ili preninte ĉevalojn belajn, tasetojn arĝentajn kaj ringojn multekostajn de miaj kontraŭuloj, evitis la juĝadon.“ Poste la papo mem la proceson „al alprenis“, dirante al si, ke „jam ĉiu el la proceso profitis, kaj mi neniom“; kaj denove la anstataŭantoj de Hus urĝis lin, ke li donu al ili aŭdiencon, „kaj li ne volis: ĉar li serĉis flavajn kavalirojn, kaj ansero ne havis ilin, eĉ ne volis sendi ilin. Kaj volante havi la kavalirojn, li kaptis miajn senditojn kaj metis ilin en prizanon“. Al la papo kaj kardinaloj la proceso servis por akirado de koruptaĵoj, ne por serĉado de justeco. „Kaj kiam denove post morto de la pastro Zbyněk, el la insido de miaj malamikoj, malamikoj aliaj pritraktadis por mi la malbenon de la kardinalo Petro, vidante, ke la Dia vero ne havas lokon ĉe la papo, mi apelaciis al Di-Sinjoro.“ „Kaj tial mi ne staris antaŭ la papo, ĉar li ne aŭdas la veron, ke senditojn li enprizonigas, ke la magistron Stanislao kaj magistron Stefanon li prirabis, preninte de ili ducent florenojn kaj sep, kaj ĉevalojn. Mi ne staris ankaŭ pro tio, ke la Dian proceson mi havas kontraŭ la papo kaj mi scias, ke la papo sin mem ne kondamnos,“ kaj nome tiom pli, ke li, Hus, kontraŭstaris la vendistojn de indulgencoj, „kiuj kun buleoj venis, por la popolon prirabi“. „Kaj tial havante la dian proceson kiel ĉefaĵon, kaj ne volante la vivon perdi kaj la popolon de la Dia vorto senigi, vane elspezi homan monon, kaj petante, se estos la Dia volo, plu per la vero de diablo kaj antikristo timigi, ekstermi kaj masakri, havante la sanktan Skribon kaj la rajtojn spiritajn kaj papajn, kiuj malhelpas al oni iri antaŭ juĝiston, kiam oni estas sur la vojo en vivodanĝero, kiam la malamikoj de oni estas kaj la juĝisto, kaj la atestantoj, kaj la parolistoj“, li ne iris por la juĝo al la papo. „Ĉar diras la papaj rajtoj, ke frenezulo estus tiu, kaj ankaŭ kontraŭ la prudento kaj kontraŭ la natureco agus, kiu al tia juĝo sin subigus.“

Hus en la tekstoj miksas motivojn trispecajn, unuflanke ĝi estas la koruptebleco kaj maljusteco de la papa tribunalo, aliflanke eksteraj cirkonstancoj, tio, ke dum la vojaĝo al Romo li perdis la vivon, ke li ĉesus prediki la Dian vorton al la popolo kaj „ekstermi per vero la diablon kaj antikriston“, ke li vane disipus la monon, akiritan de kredantoj ktp., kaj trie kaj ĉefe – ke „estas malmulte da Dia vero ĉe la papo“. Sed ni legu la tekstojn ankoraŭ pli atenteme! Ili rakontas ankaŭ pri tio, kiel ŝtupon post ŝtupo proksimiĝis la kontinuo-rompiĝo, kiam Hus decidiĝos eldevontiĝi el la papa jurisdikcio kaj apelacios de li al Kristo. Ankoraŭ kontraŭ la buleo de Aleksandro „kiel hereza“, kaj kontraŭ Zbyněk, Hus apelacios al la papo, li eĉ skribos al li personan leteron; kaj sendinte siajn anstataŭantojn al la papa kortego, tiam li ankaŭ respektis la jurisdikcion de la papo; sed li havis, kaj ankaŭ liaj anstataŭantoj, sufiĉe alian imagon pri tio, kiel devus aspekti justa juĝado.

Al la papa maljusteco Hus riproĉas, ke ĝi estas koruptebla kaj ke liaj anstataŭantoj ne ricevis aŭdiencon. Sed kion en la imago de Hus signifis, havi aŭdiencon! Se la anstataŭantoj de Hus volis

kaj proponis devoligi sin kaj ankaŭ lin sub la puno de fajro, tiam ili intencis havi la proceson pri kerna enhavo de la konflikto; sub la aŭdienco antaŭ la papa tribunalo Hus kaj liaj anstataŭantoj imagis malfermitan opini-polemikon kun la kontraŭulo, ĝis la fajropuno, do ĉe la plej ekstrema limo de la respondeco. La esenco de la polemiko kaj la pruva opini-polemiko tamen neniam okazis, eĉ en Konstanco ne, kaj eĉ ne povis okazi, la postulo mem malbonodoris per hereza malobeemo; kaj tial, kiam la anstataŭantoj de Hus renkontiĝis kun la praktikoj de la kurio de Johano XXIII-a, kiam Hus mem malfermite konfliktis kun la indulgenca buleo de Johano, kiam li akiris la sperton, ke ĉe la papo li la justecon, tiel kiel komprenis ĝin li, ne ĝisatendos, kiam do li elprovis ĉiujn rimedojn kaj gradojn de la eklezia jurisdikcio, kaj la veron li ne atingis, li decidis malligi sin el sub la jurisdikcio de la kurio per apelacio al la juĝisto la plej alta. Ĉiu sorto estas konkreta kaj tiun de Hus forte influas la krima persono de Baltazaro Cossa. La konflikto kun la papo kaj pri la papeco estas en la ĉeĥa reforma movado fakte specifajo de Hus, en literaturo oni klarigas tion per la transprenita opinio de Wicleff, sed malmulte oni emfazas, ke Hus ne transprenas aŭtomate la teorion de Wicleff pri la papeco, sed sub la simileco de situacio. En la puriga strebado levi la eklezion al la ekzemplo de Kristo li koliziis kun la eble plej malbona el romaj papoj, kiuj iam fuĝis la eklezian historion, kun la viro, kiun la oficiala katolika historiografio el la listo de papoj entute forstrekis. Kaj ni ne devas preni tion kiel historian hazardon, sed tiel, ke la tiama krizo de eklezio trovis en ili du la personigojn de siaj plej malproksimaj pozicioj: la absolutigon de reforma ideo kaj la mirindan malmoralecon de agoj.

Sed la vigla menso de la leganto jam certe rimarkis la insidon, ke Hus apelacias disde la juĝisto en la donitaj rilatoj valida al la juĝisto imaga. Tion sagace rimarkis Štěpán Pálež kaj la citaĵo de lia opinio ree evidentigos kiel diference ambaŭ viroj rezonis. Štěpán tion kompreneble diras en sia *Antihus* maldelikate kaj kalumnie. Hus „rifuzas la papon, la roman eklezion kaj kiun ajn kompetentan juĝiston“ kaj volas havi kiel juĝiston sole la Skribon. „Kaj se li iam volis havi la papon kiel juĝiston, tio estis tiam, ĝis kiam li esperis partianigi lin al si per mono. Post kiam li ne sukcesis, li rifuzas ĉiun juĝiston kaj nur por ne embarasiĝi antaŭ la laikoj, ke li volas al neniuj juĝisto subigi sin, li diras, ke li volas havi kiel juĝiston la Skribon sanktan, li proklamas la papon, la prelatojn kaj la tutan kristanaron siaj malamikoj, ĉar li bone scias, ke li estus de ili kondamnita.“

Pri Štěpán Pálež multaj diras kaj skribas, ke li havis spritan teologian senton; se ni preterlasos la kalumnion, ke Hus volis la papon subaĉeti kaj kiam ni malatentos la krudan misprezenton de la deklaroj de Hus, tiam ni tamen ne povas preteratenti, kiel Pálež sen teologia sagaceco identigas kaj anstataŭigas la neidentigeblan kaj la neanstataŭigeblan: la papan tribunalon kaj la Skribon. Do la eklezian oficon kaj la veron Dian, por ke ni parolu per la lingvaĵo de Hus. La vera senso de la apelacio de Hus al Kristo, la imaga juĝisto, ne troviĝas en tio, ke li decidiĝis malligi sin el la ŝpinaĵo de kuriaj malpermesoj, ordonoj kaj punoj, el la jurisdikcio de la papo; tiam li vere estus nura malobeemulo sen pli profunda senkulpiĝo, sen la „pardonpeto antaŭ Dio“, kiel li skribas pri ĝi; kaj precize tiel lin konstante priskribas Pálež. Sed Hus estas certa, ke lia proceso ne estas lia proceso persona, ĝi estas la proceso Dia, la proceso pro Dio, pro Kristo, „mia Dia proceso antaŭ ĉio“, kiel li esprimis sin per la tiam ankoraŭ mallerta ĉeĥa lingvo.

Jam per tio, ke la kulpigo pro herezeco lin „ne ĉagrenas“, ĉar simile kulpigis la jerusalemaj pastroj Kriston, kaj li mem faras nenion alian, ol ke li interpretas la postlasaĵon de Kristo, Hus malligas sin el la ŝpinaĵoj de malpermesoj, ordonoj kaj punoj pli profunde, ol nur tiel, ke li ne venis al la papa tribunalo; per la rifuzo de punbuleoj, ĉefe de la lasta, Hus ne nur ĉesas daŭrigi sian proceson, kiun li opinias proceso Dia, interne de la instituciaj retoj, sed li malligas sin el ili tiel, ke ankaŭ sur ilin retroen falos la akra lumo de la „vero de Dio“. Per la apelacio disde la papo al Kristo, la sola justa juĝisto, kiu estis ekzekutita post simila maljustaĵo, kiu persekutas lin, Hus per ununura eksvingo, per ununura multenhava ago esprimis la staton de la eklezio, en kiu la papo rompas ankaŭ la homajn leĝojn, ĉar li ne estimas la leĝojn Diajn, ĉar „la vero Dia ne havas lokon ĉe la papo“.

Certe pro la elstariĝo de sia pozicio, sed ankaŭ pro la genieco faris Hus „ion“, kio poste aspektas tre simple, sed kio en la homa historio apartenas inter la plej grandajn spiritajn farojn, i n t e r n e kaj ankaŭ f a k t e li eldividis sin el la validaj instituciaj ligoj. Kaj ĉe tio li scias, ke se li diros Kristo, kaj ne papo, li allasas en tiuj ĉi ligoj sian morton, ĉar ili validi ne ĉesos. Laŭ la klarigo de

Páleč per tio Hus falas en la herezecon, sed Hus super tiu ĉi rezono staras grandioze pli alte: li scias ion, kio estas super la kapablo de Páleč kompreni: ke eĉ submeti sin al herezo povas esti pia malherezo. Štěpán Páleč en *Antihus* ironie skribos, ke per la apelacio al Kristo Hus sian juĝon propre formetis ĝis la valo Josafata, do al la fino de epokoj al la lasta juĝo; sed ĝi estas ankaŭ nur la nekapablo de Páleč kompreni Hus, se ne rekte la paleĉ-stila demagogio. Hus faris ion multe pli signifan, ol ke li ne subigis sin al la papa juĝado: per la apelacio al Kristo li kondamnis la situacion en la eklezio. Kaj li faris tion ne en la valo Josafat, sed kiel viva homo. Kaj tiun ĉi spegulon li antaŭmetos al la estroj de la eklezio denove, kiam ili brulekzekutos lin, kaj en tiu ĉi spegulo de Hus la roma eklezio ne ĉesis rigardi sin ĝis nun. Kaj ĉar ĝi estis la spegulo de la evangelio, la agado de Hus ne estis aplomba nek orgojla, Hus elglitis el la regado de la institucio en la plej profunda pieco kaj ekzaltiĝo por Kristo; kaj certe tiu ĉi ekzalto en lian agadon enverŝas forton, kiun li ne havus, se li defendus kontraŭ la papo nur sin, mem, sian personon.

Por ni estas tre malfacile plene kompreni la eksterordinairecon de la ago de Hus, ni estas homoj de malintegriĝinta mondo kaj ni havas eblecon elekti inter dekoj da filozofioj, socialaj programoj, religioj kaj eklezioj. La tiama socio ja estis firme diferencigita sociale, sed spirite ĝi estis unuigita en la kristanismo organizita en unusolan eklezion. Kiam la ideojn de Hus, elirantajn el la Skribo, do el la fundamentoj de la kristanismo, rajtas juĝi la sola institucio, kiu laŭ li estas koruptebla kaj ne juĝas laŭ la „vero Dia“, el tiuj ĉi eklezie juraj ordoj li ne havas kien turni sin, kien rifuĝi. Malantaŭ la limo de la eklezio jam estas „nur“ judo, pagano, mahometano, homoj malestimataj, kaj kompreneble herezuloj, homoj el la eklezio elpelitaj. Ankaŭ Hus komprenas la eklezion tiele monolite kaj al la cetera nekristana mondo superrange, nur la signon de herezo li metas aliloken, ol kien ĝin metas liaj kontraŭuloj. Kaj ĉar li povas rifuĝi nek al judoj, nek al paganoj aŭ mahometanoj, restas al li nur la herezula morto. Ĝi estas lia „situacio de ekzistado“, ni dirus nuntempe. Kiam Páleč diras, ke la elekto de morto estas herezo, li estas preciza kaj ankaŭ nepreciza. Nepreciza li estas en tio, ke elekto ĉi-kaze estas neniu, se ni ne opinias ĝin la rezigno pri la vero; kaj preciza li estas en tio, ke li esprimis la faktan situacion.

Ĉe la rifuzo de punoj kaj juĝistoj Hus ne intencas rifuzi la maljustecon, ĉar ĝi estas turnita kontraŭ li, ke per punoj ĝi trafis lin persone, tiel kiel tion riproĉas al li Páleč; kaj samtempe li ne intencas identigi sian personon kun la vero, kiun li defendas, ke li sentus sin ties sola portanto, kiel lin ankaŭ kulpigas Páleč; Hus sentas sin esti peranto de la Dia vero kaj senĉese li nur esperas, ke ankaŭ antaŭ Dio kaj Kristo li ilian leĝon bone klarigas kaj bone ĝin defendas; kaj eĉ se la papa tribunalo ne ebligas al li defendi ĝin, tio estas kiam ĝi „ne donos aŭdiencon“, li apelacios al la instanco Dia. Li apelacios propre al tio, kion li esperas defendi. La homoj, kiuj penson, ideon, „veron“ superrangigas al la mondo, se ili ne povas tion realigi, nepre enfermas sin en tion kiel en rondon. Páleč tiun ĉi rondon dishakis per alia vero, li humiligis sin antaŭ institucio; por Hus el tiu ĉi rondo ne estis alia elirejo, nur la martira morto. El la rondo la penson de Hus liberigos nur pli evoluinta situacio, kiu ĝin sentos kiel aktuala, agkapabla, realigebla; sur ĝia bazo estiĝos nova eklezio, sed pri kiu Hus ankoraŭ ne pensis.

Kontraŭuloj de Hus la reforman movadon komprenas kiel skismon, Páleč en *Antihus*, talentita per akra observokapablo, eĉ rimarkas, ke Hus, dissendante „tra urboj kaj vilaĝoj siajn apostolojn“ propre „metas fundamentojn de nova eklezio“, sed tiam li scias pri Hus pli multe ol Hus scias pri si mem. Hus sendube sian partion nomas partio de evangeliaj pastroj kaj distanciĝas disde la malmorala hierarkio, sed ne pro tio, ke li pensus fondi eklezion a l i a n , sed ĉar li kredas, ke akceptigo de principoj de la Skribo estas esprimo de aparteneco al la eklezio de Kristo kaj ke li zorgas pri la eklezio aŭtentika. Dum la interdikto, profunde ekscitita, li koncedas, ke laikoj povas bapti infanojn mem kaj mem enterigi siajn mortintojn, en ekzilo, kiam loka paroĥestro rifuzis prunti al li preĝejon, li servos la meson en garbejo aŭ sub libera ĉielo, sed li faras tion pro neevitebleco, ne pro sopiro la eklezion fendi. Cetere la kompreno de eklezio laŭ Hus, kiel ni vidos, ion similan kiel fendadon eĉ ne koncedas.

Hus estas kun eklezio, kompreneble kun la eklezio laŭ sia interpreto, ligita kun nerompeblaj katenoj, per pia kredo kaj respekto, ĝuste la zorgo pri eklezio ĉirkaŭas kaj modelas lian sentadon, pensadon, rezonadon. Al homo konformiĝema, kiel homoj plejparte estas, estas plej proksima

decido la maljustaĵon superi, akordiĝi kun ĝi, akcepti ĝin, envicigi ĝin en la mondregulojn, kiuj influas nian vivon; homoj sagacaj kaj ambiciaj, kia estis Páleč, elformas pri tio kompletan teorion. Akcepti la donitaĵon estas ankaŭ en la tempo de Hus flegata kiel virto, la virto de disciplino, valida en la eklezio precipe por pastroj; sed Hus ne lasas sin senmoraligi per tio, pri kio li estas konvinkita, ke en la eklezio ĝi ne estas de Dio, sed en la miriga premo de la situacio li plie serĉas liberigan solvon, elirejon el morala krizo, en kiu la eklezio troviĝas. Li troviĝis en la plej ĉagrenega situacio, en kiu oni povas esti: li, la pastro ĝis pintoj de siaj fingroj konvinkita, ke li faras nenion alian, ol ke li sincere kaj pie strebas revenigi la eklezion en la pratempan sinon de Dio, en la originan aspekton de la eklezio de Kristo, per alta eklezia decido fariĝos elpelita proskribito ne nur en la eklezio, sed en la tuta Dia mondo, se li ne rezignos pri tio, kion li opinias la plej sankta devo de sia vivo. Tial do li la internekleziajn ordojn-malordojn neglektos, li evitos ilin kiel ŝtonegojn kuŝantajn sur lia vojo, kaj ĉirkaŭiros ilin tie kaj tiel, kiel kaj per kio li estas por tio spirite ekipita; kaj per la apelacio al Kristo li malligis sin el la maljustaj retoj kaj katenoj, s e n simpligi sian rilaton al la eklezio, s e n malpurigi la rilaton kaj la eklezion, s e n elturni sin pri io ajn, s e n peki kontraŭ ĝi.

La historiisto Jan Sedlák skribis, ke en la proceso de Hus la apelacio al Kristo havis neniun juran valoron, kio estas aserto vera, sed ankaŭ tiun ĉi profundpensan viron ĝi konvinkitas pri la prijuĝo tre simpligita. En siaj apologioj Hus al kanonika juro apelacias kaj respektas ĝin, mag. J. Jesenice estis eminenta ĝuste per tio, kiel li kapablis en la eklezileĝa juro serĉi manierojn de la defendo kaj ankaŭ de la atako kaj male ĉe la historia literaturo estas perpleksige, kiel sen envicigo kaj klarigo ĝi ignoras ilian ĉefan procedur-rimedon, la punon de venĝo per fajro. Hus eĉ sian apelacion al Kristo apogas je precedencoj kaj je eklezia literaturo, li invokas Alvares Pelay, la eklezian aŭtoron el la unua duono de la 14-a jarcento, kiu en la verko *De planctu ecclesie*, en kiu li laŭdire „nepenseble arogante kaj bombaste formulis la ideon pri la edifeco papa“, la apelacion al Kristo „li ne nur koncedas, sed rekte postulas“. Sed juraj reglamentoj estas por Hus reguloj helpaj, sekundaraj, prefere ol la eksterajn reglamentojn li atentis la sencon, pri kiu en la konflikto temas kaj per la konstanta atentigado pri la „Dia vero“ li deglitas de la jura kaj juĝa meĥanismoj, ellaboritaj ankaŭ por tio, ke ili venku kian ajn por la eklezio maloportunan ideon.

La teksto de la apelacio de Hus al Kristo estas preciza, unusola vorto ne superfluas, la formuloj estas cizelitaj, klaraj; ĝi estis multe kopiata, konserviĝis al ni dek du manuskriptoj, ĉiuj latinlingvaj. Sian agon Hus motivigas en la antaŭparolo per citaĵoj el psalmoj kaj el la evangelio laŭ Mateo: Dio estas la unua kaj lasta rifuĝejo de subprematoj kaj Jesuo Kristo „postlasis por memoro al siaj postsekvantoj la plej altvaloran ekzemplon, por ke ili sian konflikton donu sub la kuratorecon de la plej potenca Sinjoro“. „Apogante sin je tiu ĉi plej sankta kaj plej fekunda ekzemplo de la Redemptoro“, Hus apelacias „disde la erara anatemo de episkopoj, magistroj kaj leĝistoj kaj ankaŭ juĝistoj“ al Dio. Koscia pri apelacieblo de sia faro, li trovis en la historio de la eklezio tri precedencojn: „false premata“, apelaciis de du sinodoj al Dio la konstantinopola patriarko Johano Krizostomo, kaj de la papo apelaciis al Dio la praga episkopo Ondřej kaj la linkolna episkopo Roberto. La konstantinopolaj sinodoj estas historiaj, ili okazis en la jaroj 403 kaj 404; pri Ondřej oni skribas en Malnovaj Analoj kaj la eventon ili prezentas ĉe la jaro 1207: „Kiam neniun rajton pri la justeco li povis ricevi de la papo, tiam li apelaciis al la plej alta episkopo Sinjoro Kristo.“ La rakontaĵo, en la tempo de Hus opiniata aŭtentika, estas legendo; dum la filozofo Roberto Grosseteste, la linkolna episkopo, efektive antaŭ sia morto en la jaro 1253 apelaciis al Dio kontraŭ la papo Inocenco IV.

Poste Hus priskribas sian konflikton, „kiun kaŭzis ĉefe mia kalumnianta kaj rivalo Michal de Causis kun la konsento kaj subteno de la kanonikoj de la Praga preĝejo“, por ke ĝin konu „ĉiuj fideluloj de Kristo, precipe la princoj, nobeloj, kavaliroj, paĝioj kaj la ceteraj loĝantoj de nia Ĉeĥa reĝlando kaj kompatu min, tiom peze premitan per la erara anatemo“ de la kardinalo Petro. Pri Johano XXIII. Hus sciigos, ke tiu ne volis ebligi al liaj plendantoj preskaŭ dum du jaroj aŭdinecon kaj ne volis allasi iun ajn prudentan senkulpigon de la persona neĉeesto de Hus, kaj li eĉ ne akceptis la depozicion de la praga universitato kun la pendanta sigelo kaj kun la konfirmo de publikaj notarioj. Hus klarigas, kial li ne venis al la kurio por juĝado, ĝi ne okazis pro malobeemo aŭ pro malestimo, sed pro prudentaj motivoj: dumvoje estus kontraŭ li preparitaj insidoj; li estis avertita

per spertoj de Stanislav kaj Štěpán, kiuj volis veni laŭ la juĝa alvoko, sed en Bolonjo ili estis prirabitaj kaj enkarcerigitaj kaj estis traktataj kiel krimuloj; la anstataŭantoj de Hus estis komplezaj devoligi sin ĉe la roma kurio al puno de fajro kun ĉiu, kiu volus akuzi Hus; la anstataŭanton de Hus ĉe la kurio oni maljuste enkarcerigis; Hus estis „per la graco de la moŝta reĝo pacigita kun la praga ĉefepiskopo sanktmemora sinjoro Zbyněk“, kiu estis skribonta al la papo, ke li trovis en la reĝlando neniun herezon kaj neniun estis pro ĝi konviktita; kaj ankaŭ li estis postulonta, ke Hus estu senigita de la persekuto kaj anatemo.

En plua alineo Hus invokas la kanonikajn ordonojn: juĝistoj devas viziti la lokon, kie okazis la kulpo, kaj devas esplordemandi atestantojn, kiuj la akuziton konas; de la atestantoj ili devas demandi ne malbonvolajn rivalojn aŭ malamikojn de la akuzito, sed honestulojn kaj fervorajn amatojn de la leĝo de Kristo; kaj la juĝoto devas ricevi konvenan kaj sekuran aliron al la tribunalo kaj nek por juĝisto nek por atestanto devas esti elektita iu el liaj malamikoj. „Estas evidente, ke kiam ne estis al mi garantiitaj tiuj ĉi kondiĉoj por la proceso, mi estis por savo de mia vivo pro malobeemo kaj el la erara kaj nekonvena anatemo pardonita en la juĝo Dia.“ „Mi,“ li skribis konklude, „Jan Hus el Husinec, la magistro de liberaj artoj kaj de sankta teologio bakalaŭro konfirmita en la alta lernejo de Prago, la pastro kaj predikisto agnoskita en la kapelo Betlehema, oferas tiun ĉi apelacion al Jesuo Kristo, la juĝisto la plej justa, kiu ĉe ĉiu homo konas, gardas kaj juĝas, klarigas kaj sen manko rekompencas lian proceson justan.“

Kompreneble la apelacio al Kristo okazis ankaŭ en Konstanco. Hus aliĝas al ĝi kun memkompreno kaj memkonscio. En la marto 1415 li skribas el prizono, ke al la esplordemandantaj komisaraj li „eksplicite diris“, „mia defendanto kaj reprezentanto estu Sinjoro Jesuo, kiu nin ĉiujn baldaŭ juĝos“. En publika aŭskultado ili traktis pri la apelacio al Kristo dufoje, la 7-an kaj la 8-an de junio. La sepa de junio estis vendrede kaj tiun tagon okazis preskaŭ plena eklipso de suno. En la refektorion, kie li estis esplordemandata, oni alkondukis Hus unu horon post la menciita naturfenomeno, kaj Mladoňovic ĝin notis kiel simbolan.

La refektorion ĉirkaŭis multnombraj dungosoldatoj kun glavoj, pafarkoj, hakiloj kaj lancoj, eble por ke neniun Hus forkaptu. Post vana provo pruvi al li remanencan kaj post skoldoj, ke li ne kondamnis la elektitajn artikolojn de Wicleff, Hus prirakontis, kiel li transdonis al la praga ĉefepiskopo siajn ekzemplerojn de libroj de Wicleff kaj petis Zbyněk, se li trovos en ili herezon, ke li ordonu signi ĝin, kaj ke li, Hus, ĝin antaŭ la komunumo kiel herezon deklaras. Sed la ĉefepiskopo ordonis la librojn bruligi, al kio lin ne rajtigis la papa letero; ekde tiu ĉi bruligo li do apelaciis al Aleksandro V-a, kaj post kiam tiu ĉi mortis, al Johano XXIII-a, kaj ĉar al liaj reprezentantoj ne estis dum preskaŭ du jaroj permesita aŭdienco, li apelaciis al Kristo.

Ili demandis lin, ĉu Johano XXIII-a donis al li absolvon; li diris, ke ne.

Ili demandis lin, „ĉu estas permesite apelacii ankaŭ al Kristo“.

„Mi ĉi tie publike konfesas,“ diris Hus, „ke ne ekzistas pli justa kaj pli efika apelacio, ol al Kristo.“

„Kaj ili tre eksplodis per rido pro tiu deklaro,“ notis Mladoňovic.

Sed Hus eĉ post tio objetis, ke „apelacii“, kiel diras la juroj, signifas en plendo de malpli supera juĝisto peti aŭ apelacii al juĝisto pli supera, kaj kiu estas pli efika kaj pli justa juĝisto, kiu povus la malhelpatajn kaj subprematajn pli bone suprenlevi kaj helpi al ili, ol Kristo, kiu nek trompas, nek povas esti trompata?“

Dum la sekvanta tago, la 8-an de junio, ili pritraktis la tezojn elektitajn de Páleč el la traktaĵo de Hus *Pri la eklezio*; la tezon pri la apelacio al Kristo Páleč formulis sufiĉe tendence, kvazaŭ ĝi estus en la libro proklamita kiel ĝenerale valida, dum Hus priskribis la apelacion al Kristo kiel sian unikan kazon: „Kiam do la apelacio disde unu papo al lia posteulo ne utilis al mi kaj apelacii disde la papo al la koncilio signifas por longa tempo kaj malcerte en la malfacilaĵo peti helpon, tial mi fine apelaciis al la kapo de la eklezio: al Sinjoro Jesuo Kristo.“

„Mi apelaciis al Kristo,“ klarigis Hus, „kiam miajn reprezentantojn dum du jaroj, eĉ pli longe ili ne allasis al aŭdienco,“ kaj li klarigis tion ankaŭ antaŭ la ĉeestanta kardinalo Zabarella, kiu ja decidis, ke la reprezentantoj de Hus devas esti aŭskultitaj.

Al tio oponis la kardinalo de Cambrai d’Ailly: „Kaj ĉu vi volas esti super la sankta Paŭlo, kiu

estante premata en Jerusalemo, ne apelaciis al Kristo, sed al la imperiestro?“

„Tre bone,“ akceptis Hus la argumenton de la kardinalo kaj tuj ĝin turnis kontraŭ li. „Kaj se iu la samon farus, al herezulo li estus kondamnita.“ Kaj la argumentadon li gradigas: „Kaj tamen la sankta Paŭlo apelaciis al la imperiestro ne pro propra iniciato, sed pro la volo de Kristo, kiam Kristo aperis kaj diris al li ‚estu persistema, ĉar vi devas iri en Romon‘...“ En la fina premo, fermis Hus, ne estas pli efika apelacio ol al Kristo“.

Kaj Mladoňovic povas denove noti: „Kaj ili mokis lin.“

Jes, kiel ja perceptis la koncilio, tiuj tre belege vestitaj viroj, delikataj kaj edukitaj, konsciaj pri siaj dignoj kaj sia potenco, viroj ĝuste kreantaj la koncilian deviacion disde la dogmo pri la monarkisma posteno de papo en la eklezio, tiun ĉi predikiston el Bohemio, kiu parolas pri Kristo, pri tiu imagina nocio el mesoj kaj preĝoj, maksimume laŭstile bildigita sur bildoj kaj en statuoj, kvazaŭ li sidus viva apud li? Ĉu efikis Hus ekstaze? nedece? naive? ridinde?

Sed tiu ĉi esplordemandado malkaŝis ankaŭ la alian aspekton de tiu ĉi insido, ke Hus apelaciis al la imagina juĝisto. „Kaj kiam ili riproĉis al li,“ skribis Mladoňovic, „ke li faris di-servojn kaj servis mesojn, estante anatemita, li konfesis, ke li faris la di-servojn, sed sub la apelacio. Kaj kiam ili demandis lin, ĉu li havis absolvon de la papo, li respondis, ke ne. Kaj la florenca kardinalo Francesco Zabarella ordonis tion noti al la skribisto, kiu sidis ĉe liaj piedoj...“ Tio estis la tre praktika flanko de la apelacio de Hus al la imagina juĝisto: sub la apelacio al Kristo li plu servis mesojn kaj faris di-servojn, malgraŭ ke li estis en la plej peza papa anatemo.

Por iu per sia apelacio al la spirita principo de eklezio Hus povis ŝajni simplulo, kiu pro la teologia amatoreco enplantas en la vivon ideon kvazaŭ jure validan. „Li jam orakolas!“ kriadis prelatoj, kiam Hus ĉe la eksigita papo pruvadis, ke la kapo de eklezio estas Kristo. Sed Francesco Zabarella sciis, kion li faras, kiam li igis noti la respondon, ke Hus sentis sin liberigita el la papa anatemo per la apelacio al Kristo kaj plu li servis mesojn, al la skribisto por la fina verdikto. La libereco en Kristo disfalis la hierarkie konstruitan eklezion. La koncilio en la fina verdikto al Hus riproĉis la apelacion al Kristo kiel agon precipe herezan.

Informoj ne konserviĝis multaj, sed tamen kelkaj signifaj konfirmas, ke la minaco de interdikto kaj poste la interdikto mem ne timigis Pragon komplete kaj ke entute la situacio ne estis unusignifa, kvankam la interdikto en la manoj de prelatoj estis armilo terura; sed la socio post tiaj perfortaj intervenoj pli vere ankoraŭ plu kaj pli profunde disfendiĝis. Páleč en *Antihus* skribis, li kompreneble tion atribuis sole al Hus, ke la disiĝo penetris eĉ en familiojn, ĝi neniigis ligojn parencajn kaj sociajn, filo kontraŭstaris patron, edzino edzon, najbaro najbaron, subulo mastron; en siaj predikoj pri tio detale parolis ankaŭ Jakoubek de Střibro.

En sendube malbrua, sed efika kontraŭstaro rezistis la universitato. Ĉirkaŭ la 17-a de oktobro, do en la sentivaj tagoj de kunsido de la oktobra sinodo, okazis elekto de universitata rektoro kaj doktoroj de teologio provis penetrigi en tiun ĉi signifoplenan rangon la magistron Mikuláš Cacabus, (tio estas Poto). Antaŭ tio, kiel ni memoras, estis la rektoro Štěpán Páleč kaj post li Stanislav de Znojmo. Malfacile diri, kial la partio de teologoj ne elektis iun pli signifan; la magistro Cacabus estis bakalaŭro de juro, en fontoj li aperas en kunligo kun la konsistorio, ankaŭ li estis ties kuratoro, interpaciganta procesantojn kaj je la sesa jaro li eĉ ĉeestis la konflikton de Michal de Causis kun la monaĥejo de Zderaz. Sed en la universitato li neniam instruis kaj Stanislav de Znojmo sufiĉe nekonvinke lian kandidatecon motivis per „la zorgado pri la universitato“.

La konsistorio kaj teologoj en la magistro Cacabus trovis homon, kiu subigus la universitaton al ili, sed la universitata majoritato la kandidatecon de Mikuláš malaprobis kaj la teologoj protestante kontraŭ tio forlasis la elektokunvenon; poste ili eble en malpublikejo la magistron Cacabus elektis, sed valide per majoritata elekto la rektoro fariĝis magistro Křišťan de Prachatice. Kiom partumis en lia elekto Jan Hus, estas malfacile juĝi, sed la elekto estis kaj bonega kaj taktika. Kiel la kortega astronomo Křišťan havis alireblon al Venceslao, en procesoj, kiuj sekvas, li en posteno de la rektoro fariĝos apoganto de husanoj, sed apoganto prudenta, ĉar li estas majstro de kompromisoj kaj koncedoj. Lian elekton akceptis fine ankaŭ la teologoj, Křišťan ja en la urbodomo voĉdonis kontraŭ Wicleff kaj Stanislav de Znojmo povas ekregi sin tiom, ke la en solena kunveno li enfunkciigos lin per gloriga parolado. Sed en ĝi li admonas al Křišťan, „ke li bone estru la universitaton en la

malfacilaj tempoj, kiam en ĝi regas tia malobeemo kaj ribelo, pri kia neniam estis aŭdate“. Simptoma por la situacio en la universitato estos la fakto, bedaŭrinde pli proksime nevicigita, ke ĝuste Křišť'an, kiu foje reprezentante la ĉeĥan eklezion estos en akordo eĉ kun la reĝo Sigismondo, estis devigita en la funkcio de rektoro la netoleremajn kaj diktatoremajn teologojn anatemi.

Pro la anatemo kaj interdikto el Prago fariĝis kaldrono de malamo. La popolo laŭdire dum ilia proklamo en preĝejoj laŭte grumblis, en la strato Na Poříčí en la preĝejo se Sankta Petro okazis granda eksceso, eble la kredantoj eĉ parodiis la anatem-ceremonion kaj turnis ĝin kontraŭ la propra paroĥestro. En Nova Urbo kelkaj homoj estis arestitaj kaj la novurbaj skabenoj kelkfoje vizitis la reĝon, kiun ili koruptis per luksnutraĵoj kaj propetis la arestitojn, al kiuj ili laŭdire la malliberigon diversmaniere faciligis; historiistoj el tio konjektas, ke la aresto okazis pro malinklino al la interdikto. El la paroĥo Na Poříčí ankaŭ konserviĝis informo, ke iu virino ĵetadis ŝtonojn direkten al la paroĥa domo.

Kaj tiam post la buleo de Petro ankoraŭ venis plua buleo, laŭ iuj esploristoj ankaŭ de Petro, laŭ aliaj Michal de Causis akiris ĝin nur de iu papa kontrolisto. En aŭgusto nome la praga klerikaro sendis en Romon pluan plendon kontraŭ Hus pro lia pledo de Wicleff kaj pro lia rifuzo de la indulgenca buleo. La prelatoj postulis de la papo, ke li igu aresti Hus kaj la Betleheman kapelon li ordonu detruu kaj ke, se ili ne revokos la herezojn, li juĝe persekutu antaŭ la kurio ankaŭ la adeptojn kaj protektantojn de Hus, nome Zdislav de Zvířetice, Jakoubek de Stříbro, Marek de Hradec kaj Prokop de Plzeň, sed ankaŭ la nobelojn kaj favoratojn de la kortego de Venceslao, kiel sinjorojn Jindřich Lefl de Lažany, Jan Sádlo, Jan Řitka kaj aliajn. Michal de Causis atingis, ke en tiu ĉi nova kuria ordono estis pri Hus ordonite, ke li estu de kredantoj kaptita kaj transdonita al la ĉefepiskopo aŭ al la episkopo de Litomyšl Jan Železný, aŭ ke ili mem brulmortigu lin kaj la Betleheman kapelon ili ruinigu kaj detruu ĝin ĝis la ternivelo.

Do la ĉefa atako koncentriĝis al la Betlehema kapelo, la centro de la movado, kaj super Hus komencis ŝvebi la vizio de perforta morto. Ĉar pro la apelacio al Kristo Hus sentas sin malligita el la anatemo, li plu en la Betlehema kapelo predikas kaj servas mesojn, kaj la riĉa malnovurba patricio Bernhard Chotek, unu el la patronoj de la preĝejo de Sanktaj Filipo kaj Jakobo, sur kies paroĥa teritorio la Betlehema kapelo staris, dum la prediko de Hus la kapelon surprize atakis. Chotek atakis frunte de armita homamaso kaj oni supozas, ke li faris tion kun konsento de parto da membroj de la malnovurba konsilio. Tio okazis dum kermeso, origine historiistoj prezentis la daton de la 1-a de oktobro, sed tiutage ne estis dimanĉo, sed sabato, pli verŝajna estas la dato la 30-a de oktobro, kiam la Betlehema kapelo povis havi propran konsekran solenon; se la buleo de Petro estis proklamita en la sinodo la 18-an de oktobro, tiam super Hus validis pligravigo, la peza anatemo kun minaco de interdikto, sed dume ne la interdikto; sed povis jam esti konata la nova kuria pun-buleo. Pri la atako oni scias nenion pli certan kaj konserviĝis pri ĝi jena kanto:

„Germanoj malesperis,  
al Betlehero kuris  
dimanĉe dum kermeso  
estante armitaj  
kiel kontraŭ la Jesuo.“

Hus priskribis la atakon en *Postilla* „al posteuloj por averto“ kaj la priskribon li prezentas en interrilato kun sia decidado, ĉu meti sin aŭ ne meti sin al la morto renkonte. „Ili diras: li submetu sin al la morto kaj iru en Romon, kiel Kristo iris en Jerusalemon.“ Iru en Romon!, predikis kaj skribis tiutempe ĉefe Páleč. „Mi respondos,“ skribas Hus, „se mi scius, ke tio estas Dia volo, ke mi mortu en Romo, tiam mi irus; kaj se mi scius, ke mi ian utilon farus...“ Kaj poste ĝuste ĉe la kermesa evento li montras, ke la tempo de lia morto ankoraŭ ne venis. Li ne defendas sin kontraŭ la morto pro Kristo, sed li ne disponigos sin al ĝi libervole: episkopoj igu lin veni samkiel oni igis veni Jesuon. Provis tion jam germanoj, „kiam armitaj per pafarkoj, halebaroj kaj glavoj ili alkuris kontraŭ la Betlehema kapelo, kiam mi predikis: sed Di-sinjoro erarigis ilin, tial ili ne sciis, kion fari, kiel al multaj homoj estas konate: ili venis malkonvene.“



Sed kion signifas, ke ili „venis malkonvene“? En literaturo oni kutime prezentas, ke la kredantoj de Hus forpuŝis la surprizatakon kaj la armitajn germanojn ili forkurigis. Sekve ke ĉe la Betlehema kapelo aŭ eĉ en la kapelo mem okazis bataleto, en kiu la armitaj germanoj malvenkis. Tio ŝajnas fidinda, dum la konsekra soleno povis esti en la kapelo centoj se ne miloj da homoj. Sed ni atentosekvu, kion skribis Hus: „Ankaŭ kontraŭ Jesuo Kristo episkopoj sendis kiam li predikis; sed ke la horo ankoraŭ ne venis, ĉar la servistoj de la episkopoj prefere lin aŭskultis, ol kaptis; ankaŭ la horo de mia morto ankoraŭ ne venis, tial ili lasis min ĝis la Dia volo.“ Kion signifas „ili lasis min“? Ke ili estis – kun glavoj kaj halebaroj – forkurintaj? Kaj kion signifas, ke „ili ne sciis, kion fari“? Ĉu ili restis senkonsile starantaj antaŭ la Betlehema kapelo? Kiamaniere Di-Sinjoro malordigis ilian vojon? Ĉu povas la „malordigo de vojo“ signifi, ke la kredantoj forpuŝis la atakon kaj la magistron ili protektis? Nuraj neresponditaj demandoj.

Hus en la *Postilla* rakontas, kiel surbaze de la kuria dekreto la germana parto de la malnovurba urbodomo decidis la Betleheman kapelon malkonstrui. La skabenoj evidente kunvokis grandan komunumon: „Germanoj, la konsilion preninte, volis la Betleheman kapelon detrui, unuiĝinte en la urbodomo.“ Ĉeĥoj plej supozeble traktis aparte, ĉar poste „parolis la ĉeĥo Holubář al ĉeĥoj, ĉu ili volas permesi, kiel germanoj permesis, ke la Betlehema kapelo estu detrui.“ Holubář nomiĝis Johano kaj loĝis en Celetná-strato. Kaj „tiam la fidelaj ĉeĥoj, ekkoninte, ke tio celas kontraŭ Dio kaj kontraŭ Lia vorto, kontraŭ la homa savo, kaj ke tio estas por ĉeĥoj hontiga, kaj ke ili ne havas la potencon por en tia urbo la Dian templon utilan malkonstrui, ili ne volis permesi.“ „Rigardu la germanan aŭdacon,“ skribos Hus, „ili ne aŭdacus sen la reĝa volo al najbaro detrui fornon aŭ staleton, kaj tiam ili aŭdacis provi ataki la Dian templon!“ Simile li tion skribis ankaŭ en la *Ekspliko de la kredo*: „Kien ili metis la penskapablon? Forno ili ne rajtus malkonstrui al najbaro, kaj tamen templon ili volas sen kulpo ruinigi al Dio.“

La rekta interligo inter la supozo de ĉeĥoj, „ke ili ne havas la potencon“, kaj la impeta atako de Hus, ke „sen la reĝa volo germanoj ne aŭdacus al najbaro fornon detrui“ kaj jen ili aŭdacus detrui preĝejon, aludas, ke pri tio ĉu detrui aŭ ne detrui la Betleheman kapelon ne estis decidate nur laŭ la deziro de la kontraŭhusa partio kaj laŭ la batalemo de la subtenantoj de Hus. En literaturo tradiciigis, ke Hus forlasis Pragon ĝuste post tiuj ĉi atakoj kaj ke li foriris laŭ la ordono de la reĝo, kiam lia ĉeesto kondukis al tiom grandaj konfliktoj; sed ke li ne estis kaptita kaj ke la Betlehema kapelo ne estis almenaŭ elrabita, se oni jam ne kuraĝis detrui ĝin, pravas pli fortan protekton, ol nur la popolan.

Ni povas imagi, ke kiam la kontraŭhusa movado organiziĝas por armitaj atakoj kaj plenkunsidoj en la urbodomo, kiom firme la fideluloj de Hus amasiĝas ĉirkaŭ li; kiu volus fantazii, tiu povas kompletigi la malbenadon de Hus en temploj per interbatiĝoj sur stratoj, per kvereloj en familioj, per malkonvenaĵoj en preĝejoj kaj ekzemple ankaŭ per patroloj ĉe la Betlehema kapelo; sed ankaŭ per serĉado de protekto ĉe la kortego, ĉe la reĝino, ĉe la reĝo. Se skabenoj koruptis Venceslaon per luksnutraĵoj, por ŝirmi malmultsignifajn prizonulojn, kiel eble devis insisti la amikoj de Hus, por ke la reĝo ne permesu mortigi lin. Kiam precize Hus foriris el Prago, ne estas komplete klare, sed la anatemo validis jam plenforte, konfirmas tion frazo el lia *Ekspliko de la kredo (Výklad víry)*: „Ĉar ili malbenas min... kaj la popolon ili malbenas, por ke ĝi ne akceptu la panon de mi.“ Pri la *Ekspliko* oni scias certe, ke li finverkis ĝin la 11-an de novembro kaj se li finverkis ĝin en Prago, tiam jam pasis eĉ la plej lasta ebla limtempo por la proklamo de la interdikto kaj kun certeco Hus ĉi tie kaptus ankaŭ la dua buleo de Petro, ordonanta lin mortigi, kaj li tie persone travivus la duan provon detrui la Betleheman kapelon. Sed post tio supozi, ke li foriris el Prago laŭ ordono de la reĝo, por eviti konfliktojn, tio ne prezentas trafe la tutan sencon de la evento.

Reĝo Venceslao faris nenion kontraŭ tio, ke estu en Prago akceptita kaj proklamita la buleo de Petro pri la interdikto. Historiistoj en ĉi-rilaton metas la leteron, kiun Venceslao ricevis de iu el la kurio, leteron priskribantan la kondamnon de pragaj viklefanoj fare de la kurio, kaj la suspekton, kiu tie regas, ke Venceslao la herezecon subtenas. Kaj la reĝo ĝuste la papon bezonas, kiam li ŝanĝas la ĉefepiskopon, kaj ankaŭ li entute ne aspiras tion, ke pri li kresku la famo de protektanto de herezuloj. Sed aliflanke Venceslao faris nenion kontraŭ Hus, kiam tiu plu predikis kaj servis mesojn, kaj li entreprenis nenion eĉ laŭ la rekta alvoko Hus ekstradicii. La dua buleo de Petro male

devis la reĝon forte inciti, ĉar ĝi nomis herezulojn indajn je juĝa persekuto kaj anatemo la superajn rangulojn de reĝa kortego. Tial nur ĝis la situacio fariĝas neelteneble akra, li forsendas Hus el Prago, sed per tio li samtempe permesas, ke Hus rifuĝu en sekuran lokon por eviti la rezultojn de ambaŭ buleoj. En Prago ankaŭ neniu sciis, escepte de kelkaj plej proksimaj amikoj, kie Hus kaŝas sin, certe tio estis en burgo de iu nobelo kaj certe proksima al la reĝa kortego, neniu alia kuraĝus tion; kaj la rakontanto opinias nepravigebla ankaŭ la alian kutiman aserton en la literaturo, ke Hus post la indulgencaj tumultoj, kiam li kontraŭstariĝis al la reĝo, tute perdis la favoron de la reĝo kaj ke la reĝo ekmalamis lin kaj ĝis la fino de la historio li ne movos eĉ unu fingron helpe al li.

La unuflanka ekspliko ne prezentas trafe eĉ la propran decidon de Hus. La reĝo povis maksimume solvi, ĉu Hus ekstradicii aŭ ne ekstradicii; sed eĉ kiam la reĝo ne ekstradicis lin, tion, ĉu lasi sin aŭ ne lasi sin mortigi, tion Hus jam devas decidi mem. Dum la valida interdikto kaj post la rekomendo de la dua buleo de Petro la morto evidente minacis al li senpere: kiam li predikos, li provokos kontraŭstaron kaj oni mortigos lin. Kaj ankaŭ, kvazaŭ tio okazus al kiu ajn el ni, en la unua momento li subiĝos al la ordinara homa timo. Plie estas kun li endanĝerigitaj liaj plej proksimaj amikoj, ankaŭ dependaj de tio, kion li faros. Li skribas pri tio en tiuj varmegaj tagoj el la fino de oktobro kaj komenco de novembro tre sincere en la *Ekspliko*. „Kaj en tiu ordono estas multaj princoj, multaj pastroj, magistroj kaj predikantoj, kaj mi bedaŭrinde ne rajtis kontraŭ la evidenta kolero paroli, timante nesaĝe persekutojn, damnojn, kondamnojn kaj je la morto timiĝante.“ Verŝajne laŭ la ordono de la reĝo, „nesaĝe je la morto timiĝante“, sed ankaŭ sentante la respondecon por la persekutoj minacantaj al liaj amikoj, Hus por tempo ĉesis en la Betlehema kapelo prediki. Sed tuj per la sekvanta frazo li certigas, ke la kompatema Savinto al li „donas la kuraĝon, ke mi ne plu timu, sed jam la veron diru kontraŭ ĉiu, kiu estus kontraŭ la leĝo de Jesuo Kristo.“ Se li finverkis la *Eksplikon* en Prago, li renovigis la predikojn ankoraŭ en la Betlehema kapelo kaj eble per tio li kontraŭ si elvokis la indignon de la germana parto de malnovurba urbodomo; la reĝo ne permesis malkonstrui la Betleheman kapelon, sed al Hus li malpermesis estadon en Prago.

En la libro *Pri la simonio (O svatokupectví)*, verkita dum la ŝanĝo de la jaro, Hus priskribis, ke li ricevadis tiutempe duspecajn konsilojn. „... unuj konsilis al mi, ke mi prediku, kiam la plago estis por fratoj kaj damnoj kaj servoj de l' domo; kaj la aliaj konsilis, ke mi ne prediku. Kaj tamen mi komprenis, ke ambaŭ bonintence konsilis al mi: kaj tamen el ambaŭ specoj de konsiloj mi ne estis certa, kiu estus akorda kun Dia volo.“ Ke li prediku plu certe konsilis Jakoubek de Stříbro, ke li retiriĝu konsilis Marek de Hradec, eble la magistro Křišťan, eble de la buleo trafita amikoj de la reĝa kortego. En la propra rezono de Hus konstante trapenetriĝas du ebenoj: la morto-minaco pro la predikoj kaj lia rilato al ĝi, kaj lia devo prediki. Do kiam li venkis la timon kaj predikas plu, estiĝas antaŭ li problemoj, ĉu li orgojle ne provokas la sorton. Štěpán Pálec lin en *Antihus* akuzas, ke „ol vi rezignus pri la fiero kaj pentofarus, eble vi prefere estas preta subiĝi al la morto en fajro“ – sed Hus pensas tute alimaniere. En la *Ekspliko de Patronia (Výklad Otčenáše)*, do en la teksto, kiun li verŝajne verkis ankoraŭ en Prago, li prezentas ekzemplon: iun oni volas mortigi, kaj li povas fuĝi; sed li diras al si: Dio estas potenca kaj povas min defendi kaj ankaŭ konservi; mi do provos, kiu estas la Dia volo; kaj Dio ankaŭ promesis la siajn defendi, mi do elprovos, ĉu li plenumos tion. „Tiu tion farinte,“ konkludas Hus, „Dion li tentus.“

Do por ke li per ekscesa riskado ne tentu Dion, li forlasos Pragon; sed ĉiam restas ĉi tie la tro peza decidado, ke li forlasas la Betleheman kapelon. La Betleheman kapelon! La domon de Dia pano. Kion ĝi por li signifis, per kiaj grandaj respondeco kaj amo li estis ligita al la Betlehema kapelo, ni povas legi ankaŭ en liaj leteroj el Konstanco. Li skribis bele, ke en la Betlehema kapelo li „deseignis per vorto en la koroj de homoj la vivon de Kristo“. Kaj en la marto de la jaro 1415, en la dominikana Arizono, li bildigis en sekreta letero al sinjoro Jan de Chlum la sonĝon: „En la Betlehema kapelo prelatoj volis neniigi ĉiujn bildojn de Kristo kaj efektive ili neniigis ilin. La sekvantan tagon mi leviĝis kaj ekvidis multajn pentristojn, kiuj pretigis bildojn pli belajn kaj pli multnombrajn. Ĝojplene mi rigardis ilin kaj la pentristoj kun multaj homoj diris: Nur venu episkopoj kaj pastroj kaj neniigu ilin de ni! Multe da popolo ĝojis en la Betlehema kapelo kaj mi kun ili. Kaj vekiĝinte mi rimarkis, ke mi ridetas.“ Jan de Chlum interpretis al li la sonĝon tiel, kiel li plej verŝajne deziris: ke anstataŭ li estas en la Betlehema kapelo aliaj predikistoj kaj per vorto ili plu

desegnas en la koroj de homoj la vivon de Kristo, kaj por multe ĝojigi Hus, li esprimis la esperon, ke ankaŭ li eble ankoraŭ en la Betlehemana kapelon revenos.

Štěpán Páleč, kiu ankaŭ bone scias pri la ĉefa motivo de Hus ne iri en Romon kaj kial li prefere restus en Prago, pri tiu pasio „plue per la vero la diablon kaj antikriston timigi, haki kaj ekstermi“, krude Hus en *Antihus* kulpigos pri memŝato. „Kvazaŭ neniu krom vi ion scius, kvazaŭ nur vi bone gvidus la popolon kaj kvazaŭ de via prediko dependus la savo de la tuta regno!“ Sed Hus male kondukas la rezonadon alivoje. Sian dilemon li priskribas al predikantoj kaj fratoj en la Betlehema kapelo en letero skribita jam en ekzilo. „Havante fervoran strebadon prediki la Dian vorton, mi estas plena de nostalgio, ĉar mi ne scias, kion mi faru.“ La paradokson de sia situacio li bildigas per du citaĵoj el evangelio. „Bona paŝtisto donas sian animon por siaj ŝafoj,“ dum luanto, al kiu la ŝafoj ne apartenas, „vidas lupon irantan, do li forlasas la ŝafojn kaj fuĝas, kaj la lupo ilin kaptas kaj dispelas.“ Aliflanke li citas Mateon, „se ili persekutos vin en unu urbo, fuĝu en alian.“ „Inter la du antitezoj,“ li skribos, „mi ne scias, kion mi faru.“

Por la solvo li turnis sin al S-ta Aŭgusteno, kiu jene konsilis al la episkopo Honorato: „Kiu fuĝas tiamaniere, ke pro lia fuĝo ne mankas al la eklezio la nepre necesa servo, faras tion, kion la Sinjoro ordonis aŭ permesis.“ Sed kiu fuĝas, „ke de la grego de Kristo forpreniĝas la vivtenaĵoj, el kiuj ĝi estas spirite viva, estas kiel la luanto, kiu vidas lupon irantan kaj fuĝas, ĉar li ne havas zorgojn pri la ŝafoj“. Laŭ S-ta Aŭgusteno „eblas permesite fuĝi, kiam iu estas laŭnome elserĉata,“ kaj Hus siajn anstataŭantojn en la Betlehema kapelo demandos, ĉu ankaŭ ili rekonos tiujn ĉi konsilojn, aŭ ĉu ili donos al la popolo bezonatajn „spiritajn vivtenaĵojn“ kaj al li ili faciligos la restadon ekster Prago.

Forirante, li komisiis la Betlehemana kapelon al magistro Mikuláš de Miličín, al magistro Martin de Vodňany kaj al predikisto Havlík. En la letero al Praganoj, skribitan el ekzilo ĉeĥlingve anstataŭ prediko, li kun kontento sciigas, ke por „unu ansero neadekvata“ la vero, kiun ili juĝis kaj batmortigis, sed kiu denove levigis kaj venkos ilin ĉiujn, „ĝi donis al Prago multajn aglojn kaj falkojn, kiuj havas bonajn okulojn, alte pro graco ili flugas kaj bone al Sinjoro Jesuo birdojn ĉasas“. En *Postilla* li resumis sian decidon en lakonan konstaton: „Kaj mi fidis la gracon de Dio kaj la konsilon de multaj homoj, al kiuj mi ne estas inda la kalkanojn kisi, kaj la paroladon de S-ta Aŭgusteno, vidante, ke la popolo havas sufiĉe da vorto de Dio kaj ankaŭ da aliaj spiritaj bezonaĵoj, kaj kiam ili serĉis mian senvivigon, mi cedis.“

Li cedis, sed trankvila li ne estas. Dum la ekzila aŭtuno li skribos kelkajn leterojn, li instigas en ili Praganojn, ordinarajn homojn, sinjorojn kaj magistrojn, ke ili persistu en la ekkonita vero kaj „ĉion, kion ili faras, ili faru kiel la filoj de Dio“, damnojn kaj persekutojn ili ne timu kaj la akuzitojn de la dua buleo de Petro li avertas, ke ili ne revoku, ĉar tiel ili nur konfesus la herezon – kaj pri si mem li skribos, kiel lin turmentas la konscienco: kiam li instigas ilin al persistemo, kvankam li havas por si en la Betlehema kapelo anstataŭon, lin turmentas, „ke li pro sia forestado ne kaŭzu indignon“. Ĝi estas denove alia kontraŭdiro: li ne volas indigni per fuĝo, sed „aliflanke min atakas timo, por ke mia ĉeesto – pro la malpermeso malbeninde inventita – ne estu okazo por forpreno de vivtenaĵoj, tio estas komunio de eŭkaristio kaj aliaj agoj destinitaj por la savo“. Li havas malbonan konsciencon, ke li foriris kaj per la fuĝo li povis doni malbonan ekzemplon, kaj li ne povas reveni, por ke oni ne efektivigu la interdikton. En la rezonado absolute nepersona kaj kun la plej forte ebla kristana persistemo li pensas apud la fideluloj ankaŭ pri la malamikoj: „Mi certe timas, por ke oni ne faru al vi multon malbonan“, por ke „la fideluloj ne suferu kaj la maljustuloj spirite ne pereu.“ La fideluloj ne suferu pro la interdikto kaj la maljustuloj ne pereu spirite, ĉar ili plenumas ĝin. Tiuj maljustuloj, „kiuj nun jubilas kaj postulas, ke ne nur la vorto de Dio estu en mi silentigita, sed ankaŭ la loko de la vorto de Dio, la Betlehema kapelo, estu fermita per bartrabo“.

Konsolan leteron sendis al Hus en la ekzilon Křišťan de Prachatice, li deziris al li, ke lin „la ofta turmentiĝo kaj izoleco de kunuloj ne fleksu, ne humiligu, ne afliktu, sed firmigu, edifu kaj ĝojigu“. „Honorinda sinjoro rektoro, majstro kaj patro afabla,“ reskribis al li Hus, „dankeme mi akceptas la konsolon“ kaj „mi certigas vin, honorinda sinjoro rektoro, ke la persekutado neniam plenigas min per ĉagreno, se ne plenigus min per ĝi miaj pekoj kaj la malvirteco de la kristana popolo“. Kiel ĉe letero al universitata rektoro decas, Hus skribis ĝin en bibliaj parafrazoj. „Ĉar kion malfacilan povas kaŭzi al mi la perdo de la sekulara riĉaĵo, kiu estas nur fekaĵo? Kion la perdo de la sekulara favoro,

kiu scipovas deĵeti de sur la vojo de Kristo? Kion la senhonorigo al mi farita, kiu, se vi toleras ĝin humile, purigas kaj heligas la filojn de Dio, por ke ili brilu kiel la suno en la regno de sia Patro? Kion fine, se estus de mi forprenita la kompatinda vivo, kiu estas morto, kiun kiu ĉi tie perdas, tiu senigas sin de morto kaj trovas la veran vivon?“

En la letero, plena de kaŝita streĉiteco, Hus ne kapablas prisilenti la amarecon pro Stanislav kaj Páleč. „Sed tion ne komprenas la homoj blindigitaj de orgojlo, gloramo, ambicio kaj avareco kaj iuj, kiuj disde la vero igis sin forturni pro timo.“ Ili ne komprenas, ke kiu volas vivi „pie en Kristo“, devas en la nomo de Kristo toleri eĉ persekutadon. „Tiu, estante senigitaj de pacienco kaj per tio ankaŭ de amo kaj de la tuta virto, kadukiĝas, strange estante konfuzitaj en la koro, ĉar ilin premas de unu flanko la ekkono de la vero kaj de alia flanko la aflikto, per kiu ili timas perdi la gloron kaj disponigi sian mizeran korpon al la morto.“ Sed li, skribas melankolie, sian mizeran korpon al la morto disponigos, „ĉar mi ne deziras vivi en tiu ĉi fia mondo, sole se mi povus instigi min kaj aliajn al pentado laŭ la Dia plaĉo“.

La ideo, ke li prefere mortus, sed li havas en la mondo devon, ripetigas ankaŭ en la leteroj al Praganoj. „Mi elektus por mi morti por Kristo kaj esti kun li, sed kun vi mi deziras labori por via savo.“ Kaj aliloke: „Ĉar tion sci, ke mi ne evitas disponigi por la Dia vero mian mizeran korpon al danĝereco aŭ morto, ĉar mi scias, ke al vi nenio mankas en la vorto de Dio, sed ke de tago al tago la vero de la evangelio pli multe disvastiĝas. Sed mi deziras vivi por tiuj, kiuj suferas perforton kaj bezonas la vorton de Dio... Tial mi aliloke predikas kaj al aliaj kiel pastro mi servas, sciante, ke en mi plenumiĝas la volo de Dio, por ke mi preventu la morton aŭ malsanon kaŭzitan de Antikristo.“

Al Kriŝt'an li skribos: „... kaj mi instigas vin en Kristo Jesuo kaj ankaŭ ĉiujn viajn kunloĝantojn, ke vi estu preparitaj al batalo, ĉar unue komenciĝis la antaŭludoj de Antikristo kaj post ili jam sekvas batalo.“ „Kaj estas necese, ke la ansero movu la flugilojn kontraŭ la flugiloj de Vehemonto kaj kontraŭ la vosto, kiu ĉiam kovras la abomenecon de la besto Antikristo.“ Per la vosto li do opinias „profetojn papojn, magistrojn, doktorojn kaj juristojn“, do siajn kontraŭulojn en la universitato. Kaj pasie li vortatakis la papon. Ankoraŭ pli granda, ol la abomeneco de publikulino malsupre tute nudigita kaj publike por kiu ajn preparita, estas la abomeno de „la besto, kiu estas preta esti honorata de ĉiu, sidante sur la seĝo de digneco, kvazaŭ ĝi estus Dio, kaj estante preta vendi, kion ajn kiu volus aĉeti en la aferoj spiritaj, eĉ ĝi vendas, kion ĝi ne havas.“ „Do ve al mi, se mi ne predikos kontraŭ tiu ĉi abomeno, se mi ne ploros pro ĝi kaj ne skribos pri ĝi.“ Kaj konklude li citas la Apokalipson: „Krias la aglo flugante: „Ho ve, ho ve, ho ve al homoj loĝantaj sur la tero.“

La leganto nun pardonos, ke antaŭ ol ni daŭrigos la rakontadon, ni almenaŭ mallonge mencios la *Eksplikon de la kredo*, laŭdire la plej bonan ĉeĥan verkon de Hus. Dum oni ĵetadis ŝtonojn direkten al la Betlehema kapelo kaj rompadis super li kandelojn en temploj, li en la Betlehema kapelo inter predikoj aŭ anstataŭ ili, kiam la reĝo malpermesis al li prediki, kolorplene, vive, alloge, kun helpo de proverboj, popoldiroj kaj nacia poezio „al simplaj homoj“ klarigis, kiel ili kredu, plenumu la Diajn ordonojn kaj preĝu al Dio. En la libro estas inkludita la kristana etiko de tiu tempo, kiel li konceptis ĝin kaj proksimigita al la popola komprenado; por sia eduka misio la teksto estas plenigita per multaj tiamaj detaloj. En la *Ekspliko* ni ankaŭ trovus la faman citaĵon, per kiu estas ornamita la statuo de Hus sur la Malnovurba placo en Prago. „Tial fidela kristano, serĉu la veron, aŭdu la veron, lernu la veron, amu la veron, tenu la veron, defendu la veron ĝis la morto, ĉar la vero liberigos vin...“ La faman citaĵon „*La vero venkas*“ ni eksplikas nur monde-potence, dum Hus per la vero opiniis sole la veron de la evangelioj kaj per la liberigo la postmortan gloron en ĉielo.

Ke la evangeliismo estis de la oficiala eklezio perceptata kiel herezo, priskribas Hus jene: kiam iu komencas „paroli el la Skribo Dia“, „tuj hundoj mordemaj diras: Li estas ankaŭ herezulo! Kaj estas herezuloj ĉiuj, kiuj skribas Diajn ordonojn en sia domoj.“ Tiutempe estis ĉe reformistoj, per nuntempa esprimo, se tio konvenus, ni diru preskaŭ modo, skribi sur vandojn de domoj kaj ĉambroj piajn versojn kaj citaĵojn el la Skribo. Hus verŝajne havis sur la vando de la betlehema ĉambreto bildon de Kristo, unu manuskripto de kortega biblioteko enhavas enskribon: „Sur la domo de M. Kriŝt'an sur la supersojlo estas skribitaj jenaj versoj: „ Se Kristo povis eliri el fermita tombo, tiujn ĉi piajn dezirojn enportas, kiu sopiras sekvi lin.“ Ankaŭ diversaj plendoj atestas, ke tiu ŝatokupo estis sufiĉe disvastigita. Páleč en *Antihus* riproĉas: „La Dian ordonon vi pentras“ kaj en la verko *Pri*

*eklezio (O cirkvi)* li skribis: „Viaj ideoj laŭ via stimulo tiun leĝon sur muroj pentras kaj en gastejoj ebriaj kaj ĉe kubludo kantas.“ Simile tion al Hus riproĉas Ondřej de Brod: „Murojn vi surpentras per ordonoj“ aŭ: „Iam sur muroj ili skribis kaj la Dekalagon en teatroj kantis.“ Piajn tekstojn oni verŝajne kantis ankaŭ en laborejoj kaj en publikaj ejoj, Hus mem prilaboris la dekalogon kiel ĉeĥan kanzonon kaj al la riproĉoj en la *Ekspliko* li respondas polemike: „Sed kiuj skribas obscenajn aferojn kaj abomenajn, kiuj al peko la menson incitas, tiujn ili nomas bonaj homoj; ĉar eĉ ili mem skribas, por delicon korpan havi...“

En la rezisto kontraŭ „korpa delico“ la pieco de Hus atakas ankaŭ la profanajn temojn en la arto. „Sed bedaŭrinde jam homoj anstataŭ la martirigo de Kristo pentras la trojan bataladon, kaj anstataŭ apostoloj ili ŝmiras rajdantojn, kaj anstataŭ la aktivado de Kristo ili pentras la vivon de Najtharto, kaj anstataŭ martirigo de virgulinoj ili pentras amindumadon de frenezaj junulinoj kaj nudulojn nehonestaĵojn kaj virojn strange kaj monstre aranĝitajn.“ Ankaŭ ĉe klerikoj, pastroj kaj monaĥoj, eblas vidi „antaŭ la tablo“ bildon de „virgulino belega kun pufaj mamoj“. Sed ni legas tie nenion, kio anticipus la estontan husanan ikonoklasmon.

La kristanismo devas ekbrili en sincereco kaj precipe oni devas bone kompreni la preĝon kaj la riton. Hus admonas sekularajn sinjorojn, ke ili surmetas en preĝejon belegajn festajn vestojn, „por ke ili renkontiĝu amindumante, „kaj ankaŭ ili ridas en preĝejo kaj virinoj kverelas kaj kalumnias, puŝas unu alian de sur seĝo. Fraŭloj rigardas, kie ŝi estas bela, kien ŝi turnas sin, tien ili post ŝin, unue ili riverencas al ŝi prefere ol al la Dia korpo sur altaro; kiel mi vidis, li la postaĵon turnis al altaro kaj la vizaĝon al ŝi... Kampuloj, tiuj ne preĝas, nur staras kiel cervoj kaj rigardaĉas, kien iu turniĝas. Kaj urbanoj, tiuj nostalgias timante ne trafi modestan bazaron...“ Ankaŭ tial estas gravaj la preĝoj en la ĉeĥa lingvo, por ke la kredanto sciu, kial, al kiu kaj por kio li preĝas. „Ĉar kvankam pigo aŭ alia birdo diras vortojn preĝajn, envere ĝi ne preĝas, kaj orgeno, eĉ se ĝi sonas, ĝi ne preĝas, ankaŭ monaĥinoj, kiuj biletas kaj ne scias pri kio, estas kiel la pigoj.“ „Haha, kie estas la kalumniuloj kaj ofendantoj, kiuj per la ĉeĥa aŭ alia voĉsonado malhelpas preĝadon? Ili devas la preĝon „Patro nia“, kiun jude Kristo diris kaj la sankta Mateo jude skribis, ĉeĥlingve lerni, ĉar ili volas esti savitaj.“ Hus laŭdas Karolon IV., ke li ordonis al Praganoj instrui infanojn ĉeĥlingve kaj en la urbdomo trakti ĉeĥlingve.

Sed ankaŭ la nacia lingvo kaj la tradukoj de preĝoj kaj de la Skribo servas al nenio pli, ol al pieco kaj Hus skribis jenajn belajn vortojn: „Tial mi diras laŭ mia konscienco, se mi konus fremdlandanon de kie ajn en lia virto, kiu pli multe amas Dion kaj pri bono li strebas pli ol mia propra frato, li estus pli kara por mi ol la frato. Kaj tial bonaj anglaj pastroj estas por mi pli karaj, ol nehonestaĵoj pastroj ĉeĥaj, kaj germano bona estas pli kara, ol frato malbona...“

Post la foriro de Hus el Prago, el Bolonjo revenis hejmen la magistro Jan de Jesenice, „ornamita per doktoreco de juro“; Hus la magistron de Jesenice nomas bolonja doktoro, la rangon de Jesenice tuŝas en *Antihus* ankaŭ enviema Páleč: „Se nome tiu doktoro kun sia konkludo ekirus en Bolonjon, kie laŭ sia aserto li akiris la doktorecon...“ La historio de tio, kiel Jesenice akiris la plej altan eblan klerecgradon de sia fako, nota bene en la fama universitato, estas karakteriza ankaŭ por nia rakontado. Kiam Michal de Causis fine de julio elpostulis de la kurio la anatemon al Jesenice pro lia fuĝo el roma prizono, la bolonjaj profesoroj lin spite al tio lasis studi en sia instituto; kaj kiam Jesenice estis laŭ la rekta ordono de la papo en Bolonjo arestita, la universitato liberigis lin el la arestejo kaj lasis lin defendi la doktorecon; kaj la universitato ne estis hereza kaj ĝi eĉ ne estis esprimo de spitemo kontraŭ Baltazaro Cossa, kiun el la tempo de lia aktivado en Bolonjo ĝi bone konis; la lernejo simple utiligis la universitatan rajton kaj ties jura pensado sugestis al Jesenice defendi ankaŭ Hus per tio, per kio ĝi defendis lin: per la privilegio de la universitata sendependeco.

Ĉar Jesenice, tuj kiam li revenis en Pragon, konsilis al Hus tre efikan defendopaŝon kaj mem li ellaboris unu el la plej gloraj juraj defendoj, kiu laŭdire estis en la universitato esprimita. Li konsilis al Hus, ke li turnu sin al sekulara reg-organo, la landa tribunalo de la nobelaro, kiu estis kunvenonta je sekaj tagoj antaŭkristnaskaj de la 14-a ĝis la 17-a de decembro; kaj por la 18-a de decembro li anoncis sian publikan defendon, al kiu evidente konsentis la rektoro Křišťan de Prachatice. Ŝajnas, ke la perforta supereco, kiun la praga hierarkio atingis kaj kiu esprimiĝas per la nostalgio ankaŭ en la leteroj de Hus, turnis sin kontraŭ ĝi, la fervore aplikata interdikto, proklamata eĉ post la foriro

de Hus super liaj adeptoj, vekis fortan indignon. Fermi aŭ eĉ detrui la Betlehemman kapelon la prelatoj nek post la foriro de Hus el Prago sukcesis, eĉ se ili pri tio, kiel evidentiĝas el leteroj de Hus, ne ĉesis strebi, kaj male ili per la forto de sia puno troviĝis en izoliteco disde la reĝo kaj ankaŭ disde la nobelaro. Kaj do en la atmosfero, turniĝanta al lia prospero, skribis Hus - *ĉ e ĥ l i n g v e !* - petskribon „al la nobelaj sinjoroj kaj oficistoj de la reĝlando Ĉeĥa kaj al aliaj sinjoroj, kiuj nun estas en Prago“ ; Hus alparolas la landan deputitaron „sinjoroj karaj, heredantoj de la sankta reĝlando Ĉeĥa“ kaj kiel motivon de konflikto kun prelatoj li prezentas sian predikadon de la Dia vorto. Taktike li rimarkigas, ke la reĝo kaj lia konsilantaro pacigis lin kun la ĉefepiskopo Zbyněk kaj la tekston de tiu ĉi interkonsento li almetas kiel aldonaĵon de la petskribo. Sed la pragaj kanonikoj tiun ĉi interkonsenton ne atentis kaj „influis Mikaelon, la paroĥestron de sankta Adalberto, ke li procesu kontraŭ mi. Kaj tial ili aranĝis por mi anatemon, pro kiu la animdamaĝon mi ne timas, sed agrable kaj ĝoje mi suferas.“ Sed ĉagrenas lin, ke li ne predikas la vorton de Dio, por ke pro li „oni la diservojn ne haltigu kaj la popolon ne emociu“ – kio en la malnovĉeĥa lingvo signifis aflikti, sed ankaŭ *i n c i t i*.

Prijuĝu, karaj sinjoroj, petas Hus la deputitaron, se mi estas tiom multe kulpa, ke devas esti de Dio la diservoj ŝtele forprenitaj kaj la popolo de Dio afliktita (aŭ incitita) per damnoj kaj malpermeso de diservoj, kiam ajn tion la pragaj kanonikoj ekintencas, „ne havante tion en la sankta Skribo“. Kaj Hus vastigas la argumentadon kontraŭ la prelatoj per motivo, kiu al la nobelaro estas vere komprenebla: „Ili premas kaj devigas princojn, sinjorojn, kavalirojn, varletojn kaj ankaŭ la malriĉan komunumon kaj pelas ilin for el ilia tero,“ kio estas „kontraŭ la Dia leĝo, kontraŭ la reguloj de spiritaĵaj rajtoj kaj ankaŭ kontraŭ la imperiestraj rajtoj.“ Hus de „karaj sinjoroj kaj heredantoj de la Ĉeĥa reĝlando“ postulas, ke ili strebu, „ke ankaŭ incidentoj (t. e. maljustaĵoj) ĉesu kaj la vorto de Dio havu liberecon inter la dia popolo“.

Li mem volas starigi sin antaŭ la magistrojn, prelatojn kaj ankaŭ antaŭ la landan deputitaron, samkiel li staradis antaŭ la karmemora pastro Zbyněk kaj ankaŭ antaŭ liaj oficistoj, „ĝis kiam li – sugestita de pragaj prelatoj kaj paroĥestroj – stariĝis kontraŭ mi kaj en Romon min persekutis“. „Kaj mi volonte volas aŭdi akuzon kontraŭ mi kaj respondi kaj juĝadon toleri, kiel decas al malriĉa pastro“, sed samtempe kontraŭstariĝu ankaŭ tiu, kiu lin kulpigas. Tion li ĉiam postulis kaj pri tio konsentiĝis ankaŭ la reĝo, „kaj neniam iu kulpigis min, sole dirante, ke mi ne obeas“. Kaj tion li konfesas, ke nek la papon, nek la ĉefepiskopon li obeos en tio, ke li ne predikus, ĉar tio estas „kontraŭ Dio kaj kontraŭ mia savo“. Kaj la argumentadon li ree fortigas per jena taktika frazo: „Mi scias tion, karaj sinjoroj, ke la vortojn de tiu ĉi ordono ankaŭ vi ne obeas... – ĉar mi scias, ke multaj el vi havas kapelojn, en kiuj oni predikas al vi, kaj iam ankaŭ en domoj.“

Fine Hus klarigas al la deputitaro, ke al la papa kortumo li ne venis pro du kialoj: „Ĉar mi havis anstataŭantojn, kiujn oni senkulpajn en prizanon metis“ kaj „kiuj volis sin ĝis en fajron enskribiĝi kontraŭ ĉiu, kiu volus ĉe mi herezojn vidi“, kaj due „ĉar oni al mi ĉie kaptilojn metis, por ke mi en Bohemion ne revenu“. „Kaj mi esperas, Viaj Moŝtoj, ke kun la Reĝa Moŝto kaj kun la Reĝino vi kontribuos al tio, kion vin la ĉiopova Dio por la prospero de via lando bonvolas instrui.“ Subskribita „Magistro Johano Hus, pastro nesufiĉa“, kio signifas malforta, kaj ankaŭ neutila.

La landa deputitaro, kvankam en ĝi sidis ankaŭ la plej granda malamiko de Hus, la litomiŝla episkopo Jan Železný, decidis kaj petis la reĝon, ke estu la konflikto de Hus kun la prelatoj kaj paroĥestroj denove traktata en la pastra sinodo. Jan de Jesenice tuj poste la 18-an de decembro prezentis en la universitato la gloran „Defensio cause M. Johanis Hus“, la publikan plendon pri kontraŭleĝeco de la anatemo de Hus. Surbaze de la kanonika juro li prezentis kvar kazojn de nevalideco de la verdikto pri la anatemo: se ĝi estas proklamita post laŭleĝa apelacio, se ĝi enhavas nepermeseblan eraron, se ĝi estis esprimita de neallasebla juĝisto kaj se ĝi estis esprimita ja de laŭleĝa juĝisto, sed kontraŭ la intenco de tiu, kiu lin nomumis. Jesenice prezentis pruvojn, ke la fundamento de la proceso mem estas nevalida, ĝi estis la anatemo de Zbyněk, sed Zbyněk ne havis rajton procesi kontraŭ universitatoj el lia jurpovo elprenitaj – kaj li repuŝas la objeton, ke ne temis pri nura escepto, sed pri vera privilegio. La decido de Petro estas jure nevalida ankaŭ alimaniere: kiel kaŭzon de la anatemo li prezentas evidentan malveron, la netraktadon de Hus, sed Hus tamen kelkfoje pere de siaj anstataŭantoj proponis senkulpigon, kiel tion rekonis ankaŭ la kardinalo

Zabarella. Plue la kardinalo juĝisto havis devontigon nur malfaciligi kaj denove malfaciligi la ekskomunikon de Hus, kaj kial li do povis aŭdaci anatemi la homojn, kiuj interrilatis kun Hus, sen eksplicite nomi ilin laŭ juraj reguloj? Ankaŭ la templimo de la decido pri la anatemo kaj interdikto, difinita en leteroj, estis tro mallonga, ne estis eble plenumi ties postulojn; samokaze Jesenice rifuzis ankaŭ la monstrecon de la ekskomunika ceremoniaro. Li dokumentis, ke eĉ la enlandaj prelatoj ne rajtis post la unua proklamo de la pligravigo proklami pluan plimalfaciligon sen juĝisto kaj sen la konvikto de Hus. Hus tiam estis perfortita en si mem kaj ankaŭ en siaj anstataŭantoj, kiam li ne estis allasita al juraj protestoj, „kiujn eĉ al diablo ne estas permesite rifuzi kaj kiujn nek la imperiestro nek la papo povas malvalidigi“, kaj kiam ne estis al li disponigita sekura alveno kaj restado ĉe la juĝado.

Pro ĉiuj ĉi motivoj Jesenice indikis la juĝan persekuton kaj ĉion, kio rezultis de ĝi, jure maljusta kaj nevalida. Ne estas verŝajne, diris Jesenice, ke la buleoj de Petro estiĝus el klara scio de la kardinalo, kiam ili estis eldonitaj kontraŭ lia rajtigo kaj kontraŭ la rajto; kaj li eldiras suspekton, ke ili estis pli vere kompilitaj kaj faritaj „pro instigado fare de senvirta instiganto pere de mallerta skribisto, delogita, kiel oni diras, kaj subaĉetita per donacoj kaj per plenaj bursoj de grasoplenaj kaj ŝvelformaj porkinoj el la Ĉeĥa reĝlando“. Kaj Jesenice deduktas, ke tiaspecajn nevalidajn dokumentojn la enlanda episkopo rajtas rifuzi kaj se ili jam estis konceditaj, li rajtas ilin nuligi.

Kontraŭ la apologio de Jesenice doktoroj de teologio aperigis publikan proklamon, kies aŭtoro supozeble estis Pálež. Estas tie denove citita Deŭteronomio, kiel ĝin citis Pálež en la urbodomo, kaj la proklamo pruvas, ke la ekskomuniko, eĉ se malfaciligita per interdikto, estas malpli granda puno ol la morto, kaj pro tio verdiktoj, intencitaj prefere kiel medikamentoj, ne povas esti kritikataj. En simplan lingvaĵon transigite, laŭ la Malnova Testamento ili havis rajton Hus mortigi, sed ili lin nur kuracis per la ekskomuniko kaj interdikto. Hus, asertas la proklamo, multon malbonigis per la obstineco, kiun multaj aprobas kaj provas renversi la staton de la eklezio: la papon ili ne atentis, la ĉefepiskopon ili malestimas, la reĝon ili kalumnias, la aĝulojn ili ne obeas. Post la interveno de Zbyněk ili apelaciis al la papo kaj kiam ili ne sukcesis, ili serĉis helpon ĉe mastroj sekularaj; kaj kiam ili tie ne trovis trankvilon, ili ekuzis insultojn. „Tiuj estas la veraj luciferoj“, diras la proklamo, „kiuj volas esti super ĉiuj kaj al neniu subigitaj.“ Poste neanonime Pálež skribis, ke la aserto, ke la verdikto estis publikigita kontraŭ la rajtigo de la papo, devus esti pruvita, sed la prokuroro de Hus tion pervorte ne pruvos, ĉar li estas suspektinda kaj ligita kun la sama kateno de l' anatemo. Pálež mokis pri Jesenice, kial do, estinte ĉe la kurio, li ne elpostulis apelacion de la verdikto pri Hus, kaj kulpigis lin, ke li tiel kondutas pro kolero kaj furiozo, ĉar li ne sukcesis. Stanislav de Znojmo pli poste polemikante skribos, ke estas necese pli fidi al leteroj de la kardinalo, ol al aserto de Jesenice, kiu estante la kontraŭpartiano de la kardinalo kaj estante engaĝita per favoro aŭ per mono, ne ĝenas sin pri la teksto de la dokumentoj al ekleziuloj kaj al la popolo mensogi, por mistifiki ilin.

Jesenice transdonis la defendon al Konrád de Vechta, kiu tamen ĝis tiam ne estis konfirmita en la ĉefepiskopa ofico, sed estas altranga oficisto de la reĝo; kaj la reĝo Venceslao la konsilon de la landa deputitaro denove inaŭguri la traktadon pri la afero de Hus akceptis kaj la 3-an de januaro pretigis specialajn mandatojn, kiuj enhavis ankaŭ sekurigajn protektleterojn, kaj ordonis al la klerikaro, ke ĝi kunvenu la 2-an de februaro en Český Brod. La direktoroj de la traktado li nomumis Konradon de Vechta kaj Johanon episkopon de Litomyšl, kaj historiistoj la nomumon de la du kunven-gvidantoj interpretas kiel koncesion al la partio de Hus: Konrád povus gvidi la kunvenon sola, sed se gvidas ĝin du, tio estas nereakta rekono, ke temas pri du partioj, kiuj havas taskon kune trakti; ĝis tiam la kuriaj decidoj pri Hus estis komprenataj unupartie, nun la reĝa oficisto kaj estonta ĉefepiskopo propre reprezentis husanojn. La elekton de Jan Železný kiel reprezentanton de la dua partio ĉe lia konata malamikeco al Hus oni komprenas kiel koncesion al prelatoj. La reĝo mem nenium traktadon ĉeestis, li kondutas aŭtokrate; tio, ke li kunvokis la kunvenon, allasas la supozon, ke kvankam li ne identiĝas kun la starpunktoj de la partio de Hus, li konstante parte favoras ĝin; laŭ aliaj historiistoj Venceslao simple strebis pri la ordo en la lando; eble plej proksime al vero estas tio, ke la absolutisme agordita reĝo kompleze regas la eklezion.

Hus skribas al Praganoj ankoraŭ antaŭ la Kristnasko: „Pli frue ili vin el la Betlehema kapelo forpeladis pro mi, nun ili ne plu havas motivojn, sed male ili asertas, ke mi estas fuĝanta“. Li citas kelkajn lokojn el la Skribo pri tio, kiel Jesuo fuĝis antaŭ persekutantoj, kaj li do fuĝis laŭ lia ekzemplo, kaj „pastroj kaj simile aliaj demandas, kie mi estas“. Ree li klarigas per sia nesimpligita maniero, ke li fuĝis „por ne esti al neindaj homoj okazo por eterna damno“ kaj „al indaj homoj kaŭzo de turmento kaj sufero“. Se temas pri kalumnio, „ke mi estus fuĝinta de la vero, mi fidus je la Sinjoro, ke li ebligos al mi en la sama vero pere!“ Sed tio, ĉu li finiĝos per morto, aŭ ĉu li plu predikos al sia popolo, estas en la manoj de Dio. „Tiuj, kiujn pikas la sankta predikado pro avareco, amorado kaj fiero, verŝajne ŝatus vidi min en la urbo Prago por ke ili horloĝojn, mesojn kaj ceterajn servojn haltigu; sed vi, fervoraj ŝatantoj de la Dia vorto, volonte kaj kun amo vidus min pro la bono, kiel sian proksimulon. Same ankaŭ mi volonte ekvidus vin kaj la Dian vorton predikus al vi.“

Kristnaskon li pasigis ekster Prago, sed jam la 6-an de januaro, tri tagojn post tio, kiam la reĝo pretigis la mandatojn por la kunveno de la klerikaro, Hus revenis; li do povis esti ekster Prago en distanco de unutaga vojaĝo. Estas Epifanio kaj la skribisto de la betlehemaj predikoj ĝoje notis: „Hus venis“. Kaj ni povas ekkonscii, kiel labila estis la fundamento de la kuriaj punoj, sed ankaŭ kion dubinda estis la argumentado de Páleč kaj Stanislav pri la nura obeemo al la papo; kiam la reĝo ŝanĝis sian starpunkton, la verdikton de Petro puni per la interdikto ne obeis eĉ la klerikoj mem: Hus estis en Prago kaj ili ne kuraĝis la interdikton efektivigi.

Li revenis sendube kun amo bonvenigita fare de amikoj kaj kredantoj, kaj jam dimanĉe la 8-an de januaro matene li predikas pri la dekdujara Jesuo en la templo, pri la temo, kiu esprimis al li la rilaton de Kristo al Dio, doktoroj kaj gepatroj. Laŭdire en la parolo li kvietiĝis, sed ne kapablis ne diri: „Kristo-Dio humiliĝis, fariĝis homo por instrui nin; kaj tiel malhonorigas la fiero de prelatoj, kiuj ne nur mem ne instruas, sed timegas instrui kaj aliajn senhonorigas kaj ilin ĝenas, pelante ilin pli ol 200 mejlojn malproksimen.“ Kaj ankaŭ li diris: „Kristo venis en humileco kaj en malriĉeco kaj en pureco, kaj ĉar egalulo egalulon serĉas, li aperis pli frue al simplaj homoj, ol al fieraj prelatoj. Kion ankaŭ hodiaŭ li faras, li aperas pli frue kaj multe al malriĉuloj, ol al riĉuloj.“ Sub la senpera sperto el ekzilo kelkfoje li tiel dankeme parolas pri la fidelaj malriĉuloj; sed dedukti el tio lian socialan aŭ eĉ „objektive kontraŭfeŭdan“ programon, estus la plej grava eraro; Hus konvinkiĝis, kion farus eble ĉiu eklezia reformisto proklamanta la ideon de la malriĉeco de Kristo: ke ĝi plej multe altiras la malriĉulojn; sed kion tiu ĉi sperto efektive povus influi – firmiĝis lia imago de la reformo de malsupre kaj ĉe la formulado de tio, kio estas la eklezio, la fideleco kaj pieco de simplaj homoj povis helpi al li enteni la tutan tiaman sociale diferencigitan kristanan mondon.

En la prediko li ankaŭ pli vaste parolis pri obeemo. La ĝusta estas en la aferoj permesitaj, sed Antikristo la obeemon – en sia propra kompreno – faris rimedo por subigo al si de la mondo. Kaj sian potencon li jam tiom pliampleksigis, ke pro siaj ordonoj li malhelpas la ordonojn Diajn. Simoniuloj, avaruloj, uzuristoj kaj amoruloj devus esti damnitaj, sed ili ne estas, male ili estas gloraltigataj, dum tiun, kiu predikas kaj la popolon instruas, Antikristo en tio malhelpas. Kaj se li ne obeos lian ordonon, tiam lin „antikristoj malbenas, li estas elpelata kaj la di-servojn ili malhelpas. Kaj tio estas kaptilo kaj reto de Antikristo, en kiun li preskaŭ tutan mondon kaptis kaj preskaŭ ĉion bonan de Jesuo Kristo elimini li provis.“ Tiuj ĉi ordonoj suprenlevas Antikriston super Dion. Ĉar ĉu ne estas diablo, kiu pro unusola homo – kaj ni supozu, ke li estus vere malbona – volis malpermesi la servon de Kristo kaj sepultadon de mortintoj kaj la mizerikordon Dian? „La peko malebligis di-servojn malhelpas la radikon de generado de posteularo de la Dia filo, kio estas pli peza peko, ol ĉe la semo korpa,“ diris Hus.

Dimanĉe posttagmeze li preparolis la temon de Paŭlo „Mi do vin petas, fratoj, pro la kompatado de Dio, ke vi prezentu viajn korpojn kiel vivantan oferon“ (Rom. 12, 1). Kaj lunde la 9-an de januaro matene li predikis je la epistolo laŭ Jesaja „Leviĝu kaj ekstremu Jerusalemo, ĉar venis via lumo“. Dum la ĝenerala fremdiĝo al la fido je Kristo, li diris, estas necese al li reveni kaj li admonis al rompo kaj rifuzo de la interdikto; posttagmeze li predikas laŭ la temo de Paŭlo pri kvieteco. Prudenta servo – laŭ Paŭlo – signifas, ke la homo, kiu volas fasti, ne devas transpaŝi limon; sed eĉ pensi oni ne devas pli, ol decas. La prudenton oni devus uzi konsidereme, per troa inklino al ĝi oni povus peki dumaniere: unuflanke elserĉadi al si scivoleme, kio ne decas, nome tion, kio ne utilas al



savo, kiel tio okazas al oni en la filozofio, astronomio kaj similaj fakoj, kaj aliflanke oni ne devas helpe de la troa prudento forlasi kio estas por la bonfarto de la animo nepra. Ankaŭ klerikoj elserĉadas „malbonajn saĝojn“, kaj en tiu ĉi tempo estas la malbona saĝo, kiun ili ne havas de Dio, sed de la papo, tio, ke li ne servas. „Pensi en sobreco!“ estas la slogano de Hus, rezoni sindetene. Kaj ke estas eble la sobrecon de pensado efektiviĝi, li montras ĉe tio, „kiel kanonikoj, prelatoj kaj iliaj disĉiploj kontraŭ mi malbone pensis kaj preskaŭ pri ĉio malbona ili konspiris kontraŭ mi, sed fari tion ili ne povis“, kvankam ili havis de la papo buleojn aĉetitajn, falsajn, herezajn, „por ke en kapeloj ne estu predikate“. Kaj kia estis el tio profito, ke la papo donis al ili permeson, „ĉu li per tio malgrandigis la koleron“? Ne, male li ankoraŭ malbonaĵojn plimultigis. Plej multe da malbono en pastraro devenas de tio, ke „de la plej alta ĝis la plej malalta ili volas pensi pli multe, ol decas... Tiel ili ankaŭ pensis, ke por malbenita homo devas esti la di-servo forigita, sed tion pensi ne decas...“

Sed la praga prelatoj sobre ne pensis kaj tuj post tiuj ĉi unuaj predikoj ili denove enkondukis interdikon. Tiutempa skribinto de la universitata manuskripto pri la jaŭdo post la konvertiĝo de S-ta Paŭlo, tio estas pri la 26-a de januaro 1413 notis, ke tiam „en la ĉeĥa reĝlando okazis kverelo, kiun ekigis Hus“. Hus poste en *Postilla*, en la prediko laŭ S-ta Johano je la temo „Ili forigos vin el lernejoj, jes venos la tempo, ke ĉiu kiu murdos vin, opinios, ke per tio li servas Dion“, en fragmento pri falsaj damnoj li memorigis, ke „sciante bone, ke mi estis en Prago ekde Kristnasko ĝis Pasko, ili servis, kaj kiam mi nur predikis, tiam tuj haltigis servadon tiuj, por kiuj estas malfacile aŭdi la vorton de Dio“.

Je Kandelfesto, la 2-an de februaro, simbole en la tago, kiam estis kunvenonta la sinodo, Hus finis la ĉeĥan traktaton *Pri la simonio*. La eltrovema zorgemo de Hus pri legantoj kaj la pedagogia inventemo influis ankaŭ la formon de la traktato: ĝi estas disdividita en laŭtemajn ĉapitrojn, kiuj estas plu dispartigitaj laŭ ideoj en alineojn, la ĉapitroj kaj alineoj estas markitaj laŭalfabete kaj laŭnumere, por ke li povu la libron ekipi per laŭtema registro. Tiu ĉi „montrilo“ al la leganto laŭ literoj kaj numeroj konsilas, kie trovi ekzemple: **Almozojn** kiuj malbone disdonas. **Buleoj** multekostaj estas. **Elekti** devus la komunumo episkopon. **Episkopo** per tri manieroj simonias. **Helpoj** estas tri por nuligo de simonio. **Herezeco** estas trispeca. **Juĝisto** devas havi kvar aferojn por si. **Kiu** al Kristo estas proksima. **Leĝdonantoj** kiamaniere fariĝas simoniantoj. **Leĝdonantoj** festenas kaj ĝuegas. **Lerni** kial devas infano. **Magistra** fiero grandas. **Malriĉulojn** murdas, rabas kaj priŝtelas tiuj, kiuj iliajn almozojn retenas. **Obei** ne en ĉio la papon. **Papo** povas esti simonianto. **Pastro** malbona ne estas inda servi. **Postsekvi** Kriston plej bone. **Puni** kiel la komunumajn paroĥestrojn. **Rabas** strange la popolon pastroj. **Reĝo** havas la povon malbonajn pastrojn riproĉi. **Simonio** kiam malbonan tradicion havas, kiel kontraŭ ĝi ekleziaj patroj batalis. **Simonio** kio ĝi estas. **Simoniantoj** multaj. **Vendado** de simonioj. **Venĝo** de simoniantoj. Entute en la registro estas 130 kapvortoj.

Laŭ iuj historiistoj la libro estas nur Wicleff tradukita en la ĉeĥan, aliaj asertas, ke ĝi estas origina de sep okonoj, Hus la Wicleff nur citas kaj kritike lin prilaboras. Sed precipe Hus en la libro donis propran sperton pri la simonio kaj la teorion klarigon, priskribantan la originon de la simonio, la delongan batalon kun ĝi en la eklezio kaj ankaŭ ties diversajn formojn, li intermetas per vivaj ekzemploj. Skribante pri la simonio de magistroj, kiuj „ŝatas la unuajn benkojn en la kunsidoj kaj traskuetas siajn franĝojn de jupoj, de manteloj, de tabardoj kaj de kapuĉoj“, li skribas ankaŭ: „Bedaŭrinde! Ankaŭ mi havis tabardojn, jupojn kun flankaĵoj kaj kapuĉojn kun blankaj peltoj; ĉar tiel ili ĉirkaŭbaris la magistrecon, ke ne povas al ĝi veni, kiu tiujn vestojn ne havos!“ Sed esti nomata magistro neniu devas postuli pro orgojlo, pri la magistra rango, por esti inda je ĝi, oni devas klopodi, „por ke oni sole por instruado de Dia vero pli frue la lokon havu kaj la veron pli kuraĝe diru kaj pli kuraĝe ĝin defendu.“ „Sed nun mi trovis,“ li skribas, „ke simplaj pastroj, malriĉaj, kaj malriĉaj laikoj, kaj ankaŭ virinoj pli sentime la veron defendas, ol doktoroj de la sankta Skribo, kiuj pro timo disde la vero forkuras kaj ne rajtas ĝin paroli. Eĉ mi mem, bedaŭrinde!, estis tiu, ke mi la veron sincere kaj evidente prediki ne rajtis. Kaj kial ni estas tiaj? Sole, ke ni estas nekuraĝaj, timante la laŭdon sekularan perdi, kaj la favoron, kaj aliaj la prebendon; kaj entute pro la vero timante mallaŭdon de homoj kaj suferon korpan.“

„Tiun ĉi libron mi verkis, sciante, ke nek laŭdon, nek gracon, nek utilon korpan de pastroj avaraj kaj de aliaj profanaj mi ricevos: ĉar tiujn aferojn de ili mi ne postulas, sed de Dio rekompencan kaj ilian savon. Kaj se renkontos min ilia mallaŭdo aŭ turmento, tion mi antaŭmetis, ke pli bone estas pro la vero la morton suferi, ol por flatado fruan rekompencan preni.“ La frazo tekstas tiom pli signifoplene, ke ĝin Hus skribis antaŭ la sinoda rivalado. Kaj la tute lasta frazo de la eble plej akra kritiko de Hus pri la eklezia praktiko jene kristane objektivigas la vidmanieron de la leganto: „Kiu legos, ekvidos, ke mia intenco ne estas, ke la bonaj estu malhonorigitaj aŭ afliktitaj, sed ke ili estu de la malbono garditaj kaj la malbonaj pentu. Amen.“

## Ĉapitro dekdua: LA CERTECO DE LA OBEEMO KAJ LA NEOBEEMO DE LA KONSCIENCO

La sinodo kunvenis nur la 6-an de februaro, je la tago de Sankta Dorotea, kaj ĝi ne kunvenis en Český Brod, kien ĝi estis origine kunvokita, sed en Prago; la kialoj de tio estas neklaraj. Ankaŭ ne ĉeestis tie Jan Železný. La episkopo de Litomyšl Jan estas figuro karakteriza kaj interesa; nur en la germana sekcio de la konstanca koncilio li kulpigos Hus kaj ĉeĥojn, ke en Bohemio oni proponas el kaliko, al malsanuloj oni portas la sangon de la Sinjoro en boteloj kaj ŝuriparistoj tie plenumas la pastrajn taskojn, la ĉeĥaj sinjoroj ĉeestantaj en la koncilio lian kulpigon senvalorigos per publika deklaro, en kiu ili senkaŝe esprimas la dubon pri lia deveno. Iliaj prauloj, ili skribos, ĉiam pledis por elradikigo de herezoj, „sed pri liaj prauloj kaj onkloj ili nenie aŭdis tiaĵon“. Ili estas pretaj disponigi al la koncilio siajn nomojn, „sed de li ili tion ne postulas, sciante bone, kiu kaj kio li estas kaj kiuj estis liaj prauloj“. Historiistoj klarigas la profundan ofendon diversmaniere, iuj priskribas la supozojn pri la nelegitima origino de Jan, sed pli vere ŝajnas esti pli probable, ke Jan estis de nenobela origino, ke li devenis de malnovurba patricia familio. Jan Železný jam de la unuaj bataloj por la luksemburga trono reprezentas en Bohemio la partion de Sigismondo kaj tial do, malgraŭ ke li estis de la papo aprobita kiel episkopo de Olomouc, li elpostulis sian enfunkciigon nur nelonge antaŭ la morto de Venceslao.

Ke la sinodo kunvenis, estis la esprimo de firma potencvolo de Venceslao, sed ankaŭ de la taktika antaŭvidemo de prelatoj, kiuj la traktadon bone preparis. Oni ne scias, kiomnombra estis la sinodo, kaj historiistoj disputas, ĉu en ĝi ĉeestis ankaŭ la reprezentantoj de la partio de Hus. Kiel sanktmikaela paroĥestro kaj rektoro de la universitato la traktadon sendube ĉeestis Křišťan de Prachatice, pri la partio de Hus estas certa nur tio, ke ĝia starpunkto estis tie tralegita. Hus, kiu estas anatemitita, kompreneble en la sinodo ne ĉeestis. Kaj li estas tiom objektiva, ke post kiam li unue en la universitato pritraktas la tekston de la propono de sia partio, en la Betlehema kapelo li poste petas permeson de la kredantoj, ĉu li rajtas, kiel tion deziras la reĝo, por la tempo de okazigo de la sinodo, foriri el Prago kaj kun ilia konsento li foriras. „...kaj denove,“ li priskribas tion en la *Postilla*, „kiam estis okazonta la traktado pri la kontrakto, laŭ la postulo de la reĝo kaj laŭ la konsento dum prediko al la popolo mi retiriĝis.“

Kiel la bataloj kreskas, Hus el la predikanto en la Betlehema kapelo kaj instruisto en la universitato fariĝas la gvida opozicia personulo. Lia propono por la sinodo, aprobita de la universitata plimulto, havas du partojn, la antaŭparolo enhavas ĝeneralajn programerojn: „Por la honoro de Dio kaj libera predikado de lia Vorto, por la savo de popolo, por rebonigo de malbona kaj mensoga famo de la reĝlando Bohemia, markgraflando Moravia, urbo Praga kaj de ties universitato, por interkonsento de paco inter la pastraro kaj laikoj...“ Tiuj ĉi kvin punktoj por la koncerna situacio optimume elektitaj kaj precize formulitaj, estas tio, pri kio al la reforma partio iras: pri la honoro de Dio, libero de predikado, savo de popolo, rebonigo de famo de la reĝlando kaj de la universitato, pri paco en la eklezio.

Kiel eminenta cerbo estis Hus aŭ eble ankaŭ: kiel eminentajn cerbojn li koncentris ĉirkaŭ si, ni povas ekkonscii per komparo de tiu ĉi programo kun la proponoj de Jakoubek, kiujn Jakoubek, ŝajnas, prezentis en la sama universitata kunveno, sed kiujn ĝi kiel nesufiĉajn ne akceptis. Jakoubek distingis duspecan pacon, la paganan, kiu baziĝas en la sekulara bonstato, kaj la kristanan, kiu estas

la harmonio de kredantoj kun la leĝo de Kristo. Tiu ĉi dua paco estas damaĝita de simonio, amoraĵo, riĉeco kaj sekulara regado de klerikaro. La reĝo renovigu la pacon per tio, ke li reformos la klerikaron laŭ reguloj de la evangelio kaj elsarkos ĉiujn kutimojn enkondukitajn kontraŭ la leĝo de Kristo; pri tio ĉiam strebis Hus kaj per tio li incitis kontraŭ si la prelatojn; estu al li fiksita la tempolimo por purigi sin de la malbona famo. Kaj se ne estos eble atingi la pacon korpan kaj bonfamon sekularan, sufiĉos la paco spirita, kondamnado kaj mensoga malbonfamo ne povas al ĉeĥoj damaĝi. La abstrakta rezonado de Jakoubek estas ne nur nepraktika, ĝi nebuligas la problemon kaj unuflanke trafas nur ĝian parton tie, kie Hus rimarkas en la radiuso de la Dia honoro la tutan eklezion kaj la tutan socion.

Ankaŭ la manierojn, kiel la kvin optimumajn celojn de la programo akiri, proponas Hus kun batalema penetremo. Antaŭ ĉio li antaŭmetas du postulojn de ĝenerala karaktero, unue ke por la fundamento de akordiĝo estu akceptita la iama interkonsento inter la ĉefepiskopo Zbyněk kaj la universitato, aprobitaj de la reĝo, kaj plue ke la reĝlando Ĉeĥa „restu ĉe ĉiuj siaj rajtoj, liberoj kaj kutimoj, kiajn havas ankaŭ aliaj reĝlandoj ĉe aprobad, kondamnado kaj aliaj traktadoj koncernantaj la eklezion“, do ke ĝi estu eĉ en aferoj internekleziaj sendependa de la kurio. La konkretaj proponoj koncernas jam nur lin kaj lian kulpigon. Li proponas esti invitita „en kunvenon de la klerikaro, kaj tie kiu ajn volos tiu skoldu al li eraran ideon aŭ herezon, sed revenĝe (ad penam talionis), se tiu ne pruvos“. La reĝo poste tra la tuta lando diskonigu, ke en la kancelario de la ĉefepiskopejo pernome anoncu sin, kiu ajn volus kulpigi lin pri herezo; kaj publike li tion antaŭ ambaŭ partioj pruvu. Kaj se troviĝos neniu, kiu kun li tiel publike procesus revenĝe, estu alvokitaj tiuj, kiuj denuncis ĉe la papo, ke en Bohemio estas multaj infektitaj de herezo, kaj tiuj pruvu, kiu estas tiuj „multaj“; kaj se ili ne pruvos tion, ili estu punitaj. Kaj doktoroj de teologio, juro kaj ankaŭ kanonikoj estu ĉiu aparte admonitaj nomi, kiujn herezulojn ili konas; se ili diros, ke ili ne konas, ili tion deklaru antaŭ publikaj notarioj kaj la reĝo kaj la ĉefepiskopo poste ordonu, ke neniu nenium kulpigu herezulo, se li ne volas tion pruvi.

La ferma propono poste tre sagace engaĝis en la aferon la reĝon: se nek Hus nek iun alian hejme neniu pri herezo tiele publike kaj sub minaco de punpago konviktos, tiam la reĝo akorde kun nobeloj kolektu kontribuadojn de pastraro kaj forsendu per ĝi mision al la kurio. Kaj jam preskaŭ malice tekstas la finfrazo, ke per propraj elspezoj povas la mision partopreni ankaŭ tiuj, kiuj ĉe la kurio la reĝlandon malvere kaj grave kalumniis. Se temas pri la interdikto, Hus proponis, ke, antaŭ ol lia afero kun la kurio solviĝos, ĝi ne estu pro lia ĉeesto kaj predikado deklarata, „kiel antaŭ nelonge okazis kontraŭ la dispozicioj ekleziaj“.

La proparolanto de la kontraŭhusana partio en la sinodo estis Štěpán Pálež, la konvertiĝinto el la plej batalemaj. Li kondukis tre atakeme, atakeme en la propran centron de la problemo, kaj atestas pri la elstaraj kapabloj kaj kuraĝo de Pálež, ke li la pensnodon dishakis. Ankaŭ la propono de Hus havas atakdoron, sed ĝi estas atakemo defenda, Hus klopodas forigi la konflikton de sur la scenejo kun ebla certeco, ke neniu publike kontraŭstaros lin, kaj se kontraŭstaros, ke li estas en tiu ĉi malfermita konflikto hejme nevenkebla. Kaj eble ĝuste la aplombo de la pozicio de Hus devigos Pálež formuli ne plu nur taktikan pozicion de disciplino kontraŭ malobeemo, kiel li faris tion en la konflikto pri la indulgenca buleo, sed rekte teologian teorion platformon, akre diferencan de tiu de Hus kaj ĝin tre efike venkantan; tiel efike, ke ĝia rifuzo kostos la vivon de Hus.

Pálež formulis en la teorion ĝeneraligon tion, kion ebligis al li formuli pri la eklezio kiel ties praktiko kaj la samtempa stato kaj la formoj de la interna regado, tiel la dissemataj kanonikaj ediktoj; en la potencokonflikto pri tio, kia devas esti la eklezio, la partio de prelatoj akiris ion, kio ĝis nun mankis al ĝi, la teorion fundamenton de la konflikto. La elpaŝo de Pálež en la sankta-dorotea sinodo, liaj tiel nomataj „tri veroj“, kiel li siajn proponojn iom fierece nomos, signifas ŝanĝon ankaŭ en la konflikto kun Hus: ekstaros ĉi tie reciproke kontraŭ si du teorioj, du principaj konceptoj de tio, kio estas la eklezio, la konflikto ricevos profundon, sed ankaŭ fortiĝos la akreco de la kontraŭhusa frapo. Pálež la konflikton pri la idealo de evangelioj, kien lin senĉese levas Hus, transigis sur la malmolan teron de la realeco kaj de tiu tempo ne plu Hus, sed Pálež ĉiam estos tiu, kiu ĉiun pluan ŝakmovon faras kiel la unua kaj kiu kondamnos Hus al movoj klarigaj. En Bohemio Pálež ja ne superos Hus, sed kiel strategiisto de la malvenko de Hus antaŭ la kurio li estas

kontraŭulo preskaŭ genia.

La traktadon de la sinodo malfermis unu el ok doktoroj de teologio, la aŭgustena monaĥo Heřman, per la prediko „Elŝiru unue la agrostemon kaj ligu en garbetojn por forbruligo“. Kiun li opiniis per la agrostemo, kvankam li neniun nomis, facile divenos eĉ ni. En la tekston de la edikto pri misio de la sinodo Heřman ensmuglis esprimon, kvazaŭ la reĝo dezirus, ke la konfliktoj estu *esplortaj*, ne superitaj, kaj teologoj ankaŭ formulis siajn proponojn por la sinodo nur kiel akuzon koncerne la kontraŭan partion.

Kion do enhavis la „tri veroj“ de Pálež? Ĝi estas prezento de tri fundamentaj kialoj de la malkonkordo kaj el tio rezultantaj proponoj, kiel ĝin solvi.

**L a u n u a:** „La komunumo de lernantaro en la Reĝlando ĉeĥa“, do la universitato, en la koncepto pri sep sakramentoj, ŝlosiloj de la eklezia potenco, oficoj, anatemoj, moroj kaj ritoj, pri la adorado de relikvoj kaj indulgencoj, pri la ordenoj kaj kongregacioj akordiĝas kun ĉiuj universitatoj en la mondo kaj ankaŭ kun la komunumo de la tuta kristanaro kaj opinias pri ili fidele kiel la roma eklezio; sed iuj el la lernantaro en Bohemio, asertante, ke la kondamno de la 45 artikoloj de Wicleff estas falsa kaj maljusta, oponas tion kaj rifuzas kredi, ke la opinio de Wicleff pri la sakramentoj, ŝlosiloj ktp. estas malĝusta. Tiuj konstatoj estas kaj neprecizaj, kaj banalaj; tiu teoria novaĵo troviĝas en la preciza limigo de la roma eklezio fare de Pálež: ĝia kapo estas la papo kaj ĝia korpo estas la kolegio de kardinaloj, „kiuj estante la veraj kaj evidentaj posteuloj de Petro kaj de la apostolaro, havas rajton en la eklezia ofico ekkoni kaj decidi pri ĉiuj kozo(k)j katolikaj kaj ekleziaj, korekti kaj purigi herezojn kaj en tiuj aferoj zorgi pri ĉiuj preĝejoj kaj ĉiuj kredantoj, ĉar estas necese, ke la veraj kaj evidentaj posteuloj estu tiaj, kaj ne eblas trovi aliajn“.

**L a d u a** vero la samon diras pri la komunumo de la ĉeĥa klerikaro, kiu kredas kun la tuta mondo, ke „en ĉiuj kozo(k)j de la kredo necesas subteni la kredon, decidon kaj difinon de la kurio apostola, ĉar la papo kiel kapo kaj la kardinaloj kiel korpo de la eklezio roma estas en la esplorado kaj decidado de aferoj de la kredo veraj posteuloj de Petro kaj de apostoloj“; sed male iuj el la ĉeĥa lernantaro, „malmulte estimante la papon kaj la kardinalojn kun tio ne konsentas kaj volas en tiuj ĉi aferoj havi kiel arbitracianton sole la Skribon, kiun ili eksplikas laŭ siaj vortoj, neglektante la eksplikon akceptitan en la eklezio“.

**Kaj l a t r i a** vero, la tria kaŭzo de la skismo estas, ke la komunumo lernantara kredas, „ke la malpli altrangaj devas esti obeemaj al la kurio apostola, al la roma eklezio kaj al la prelatoj en ĉio, kie oni ne malpermesas la solan bonan kaj ne ordonas la solan malbonan, sed la mezan; sed iuj strebas instigi la kredantojn al malobeemo al la prelatoj kaj al senrespekteco al la dignoj papa, episkopa kaj pastra“.

Štěpán Pálež kaptis virbovon je la kornoj, la roma eklezio estas por li papo kaj kardinaloj; kaj ĉar li estas ankaŭ sufiĉe inteligenta kaj sufiĉe antaŭvidema por rekoni la ĉefajn mankojn de sia ekspliko, nome tion, ke kontraŭ la decidoj de tiu ĉi eklezio eblas prezenti multajn pruvojn pri malĝusta decidado, li elektos la glitformulon, ke obei oni devas, kie oni ne malpermesas la solan bonan kaj ne ordonas la solan malbonan, kaj kontraŭe, ke laŭ cirkonstancoj la meza evidentiĝas iam kiel malbona kaj iam kiel bona, li malligas sin el la suspekto, ke li allasus la obeadon de la malbona. Cetere pri tio, kio estas bona kaj kio malbona, tamen decidos la eklezio, do papo kaj kardinaloj; en pli postaj tekstoj tion Pálež disvolvos per aserto, ke papo kaj kardinaloj simple erari ne povas, havante sian altan mision kiel la posteuloj de Petro.

La maniero, per kiu Pálež proponas solvi la skismon, estas jena: estas honoro kaj gloro de ĉiuj kristanoj, timegantaj la nomon herezulo, akordiĝi en la aferoj de kredo en ĉio kun la roma eklezio; por ke do neniuj tiuj ĉi gloron makulu kaj por ke la malbona famo de la reĝlando estu malfortigita, estu sub la plej pezaj profanaj kaj ekleziaj punoj sekurigite, ke neniuj en la disputeblaj aferoj pensos alimaniere ol la roma eklezio, ke tiu akordiĝos kun ĝi kaj rekonos, ke estas necese submeti sin al ĝia decido kaj en ĉio la prelatojn obei. La konkordon oni atingos kaj la malkonkordon oni forigos, se la unuopuloj de la komunumo deviantaj deklaras, ke pri la dubaj aferoj ili opinias samkiel la roma eklezio; kaj kiu opinius alimaniere aŭ favorus al malsamaj opinioj, tiu estu konsiderata malhonoriganto de la eklezio kaj malamiko de la reĝo kaj de la reĝlando, kaj kiel tia li estu ĝustigita de eklezia disciplino, kaj se li ne pliboniĝus, li estu transdonita al la potenco sekulara. Tiel Pálež per

simpła movo „knokaŭtas“ ambaŭŝultre la tutan reformacian movadon: ĉar la eklezio estas la papo kaj la kardinaloj, kiu ne obeos ilin, estu brulmortigita. La doktoroj de teologio al la propono almetis ankaŭ la liston de 45 artikoloj de Wicleff kaj por iliaj eblaj probatalantoj ili rekomendis la punon proklamitan jam en la urbodomo – ekzilo el Bohemio. Pri la punoj ordonitaj al Hus Páleč deklaris, ke ĉar ili estis akceptitaj pro la volo de la reĝo kaj de la administranto Konrád, ĉar per ili oni ne ordonas la solan malbonan kaj ne malpermesas la solan bonan kaj ĉar ne estas la afero de la praga pastraro decidi, ĉu la anatemo kaj pligravigo proklamita de la kurio estas justa aŭ ne, devas Hus subiĝi al ili.

La akreco de la pun-logiko de Páleč estas miriga: ĉar li ne sukcesus atingi la kondamnon de Wicleff pere de la kontraŭviklefa argumentado kaj precipe ne per la argumentado el la Skribo, li kunligas la rifuzon de Wicleff kun batalo kaj celtrafe formulita teorio de la eklezio; kaj kiam li kiel eklezion rekonos la papon kaj la kardinalojn, liaj teologiaj zorgoj malaperis, ĉar kion ili decidis, tion eblas nur obei, ĉar tio estas ilia misio, la sindefendo de Páleč antaŭ herezo kaj la gloro kaj honoro de la kristano. Kaj la kruda ideon de Páleč identigantan kapon kaj korpon de eklezio kun nura superordigita ofico akompanas la same kruda kaj dura postulo kontraŭ Hus: se li ne submetiĝos, li estu brulmortigita. La Husa malfermiteco, memstareco, sed ankaŭ seriozececo estas subigata de la aŭtoritata malpermeso kaj blinda obeemo. Josef Pekař, havanta grandan senton por la historio kaj al homaj sortoj en ĝi, pri Hus kaj Páleč skribis, ke en ilian lukton, „kiel ajn malserenigitan de personaj koleraj, estis ja enkorpigita peco de la eterna konflikto inter la principo de libereco kaj la principo de aŭtoritato, kiu trairas la historion“.

Post la parolo de Páleč estis legata konsilo de la universitato, do la teksto de Hus, kaj la sinodo – nature – decidiĝis sendi al la neĉeestanta reĝo la proponon de doktoroj; ambaŭ tekstojn, de Páleč kaj de Hus, ĝi sendis al la episkopo de Litomyšl Jan Železný kaj tiu jam la 10-an de februaro skribis al la ĉefepiskopo Konrád. Historiistoj koncedas, ke la tekston ne skribis Železný mem, pretigis ĝin por li plej verŝajne doktoro Jiří de Bor, la ĉefa iniciatanto de la kapitulita politiko. La proponon de teologoj Železný aprobis kaj kompletigis konsidere al la postuloj de Hus. Li rekomendis, ke en la universitato estu elektita vickanceliero kun disciplina povo; sed ĉe tio, skribas Jan Železný, lernejoj mem ne kaŭzis la malbonan famon de Bohemio, kaŭzis ĝin la predikoj de Hus. Estu do al Hus kaj al liaj adeptoj malpermesite prediki, kaj oni malebligos la malkonkordojn. Precipe estu al Hus malebligite prediki en la Betlehema kapelo, „kie li predikis kiel lupu ne amon, sed malpacon“. La ordonoj de la papo pri la kondamno de Hus kaj la kondamno de liaj kunuloj estu laŭ la ordono de obeemo akceptitaj kaj plenumitaj kaj al la kondamnitaj „estu malebligita kontakto kun la popolo“. La ĉeĥaj libroj de Hus, proklamantaj herezojn, estu al la popolo anoncitaj kaj „eĉ kun siaj vendistoj trafitaj de anatemo“.

Železný tute rifuzas, ke la repaciĝo kun Zbyněk estu prenita kiel fundamento de traktado; kontraŭ la opinio de la kurio ili tute ne devis trakti; kaj la postulo, ke Bohemio restu ĉe siaj rajtoj, rezistas al la eklezi-obeemo kaj estas rekte diablo-tenaĝo. Hus, kiu unue apelaciis ĉe la kurio, strebas nun rifuĝi per tio, ke li postulas, ke lian proceson decidu la pli malsupraj, la hejmaj. Cetere Hus estas hereza jam per tio, ke li malestimas la potencon de la eklezio. Kaj kiam li postulas, ke episkopoj anoncu lian senkulpecon, „li iru al la kurio mem, ne ni anstataŭ li“. La propono, ke kanonikoj kaj doktoroj estu unuope instigitaj al agnosko kaj konfirmo de la vero, „celas al ilia pereco“; la malpermeso de herezulproklamo devas prosperi nur al li, por ke li ŝajnu esti senkulpa. Precipe estas la elturniĝo, kiam, volante inter senkulpuloj ŝajni esti senkulpa, li postulas, ke la senkulpuloj kompromitu sin, konfirmante sian senkulpecon per lia senkulpigo. La frazo kaj la ideo estas tiom komplika, ke apenaŭ povis skribi ĝin la simpla Železný. Kaj kiel komplete abomeninda indikas Železný la postulon, ke la reĝo „per kvesto inter la pastraro ebligu senkulpigon de la malboneco de Hus ĉe la kurio“. Železný skribas al Konrád eĉ apartan leteron, en kiu li insiste petas lin, ke „estu malebligita la kvesto inter la pastraro kaj la al ĉiu minacata ĝenado de tiuj, kiuj jam estis prirabitaj, aparte la paroĥestro ĉe la sankta Nikolao en la Malnova Urbo, kiu en la tempo de interdikto suferis rimarkindajn damaĝojn“. Železný ĉi-kaze pensas pri ekspropriigo de rentumo fare de la reĝo en la tempo de la interdikto de Zbyněk. Kaj fine „la venenon de sia malboneco Hus elverŝas postulante, ke li rajtu prediki kaj la interdikto estu haltigita“. Ĉe tio li mensoge apelacias al la ekleziaj ordonoj,

ĉar la predikado ne estis malpermesita por malutilo de la dia vorto, sed „por silentigo de bojado de vulpoj kaj hurlado de lupoj, kiuj mensoge prezentis sin kiel la voĉoj evangeliaj...“.

Tiel do en la sinodo anstataŭ la konsilo al la reĝo, kiel la situacion pace solvi, malfermiĝis la malakordo en ĝia tuta abismeco: ĉesis temi pri detaloj, pri la kondamno de Wicleff, pri la indulgencaj buleoj, kaj la konflikto superkreskis en tion, kion ĝi de la komenco esprimis, en la konflikton pri la koncepto de la eklezio mem. Bedaŭrinde ni denove scias sufiĉe malmulte, por ke ni povu pri la eventoj de la dektria jaro, kiun Hus nomis tempesta, fari reliefan bildon; la informoj ne estas malmultaj, sed ili estas stumpaj kaj neprecizaj kaj unuopaj historiistoj vicigas ilin laŭtempe tiel, kiel tio taŭgas por ilia interpreto. La rakontanto provos ne preni mezon el tiuj ĉi rakontoj, sed envicigi unuopajn faktojn en la monatojn de la printempo kaj somero de la jaro 1413 laŭ ilia interna enhavo.

Por tiu ĉi momento, la unua duono de februaro, estas klare, ke la reĝo ne akceptis la rekomendon de la sinodo nek de Jan Železný preni por la fundamento de la konflikto la „tri verojn“ de Páleč. Laŭ tio, kio okazos, la reĝo estis pli proksime al la proponoj de Hus; en la reĝaj decidoj aplikiĝas la spirito de ilia malfermiteco, sed efikas tie ankaŭ la necesa diplomatio de la kortego neelvoki rektan konflikton kun la kurio; kaj plej multe eble al la reĝo, en la ekleziaj konfliktoj malsevera, zorganta pri la trankvileco en la lando, sed ankaŭ avida je mono, efikis la ideo forpreni de la pastraro la printempan elpagon por la ekspedo de senditaro al la kurio. Ien en tiun ĉi tempon historiistoj metas la eldiron de Venceslao pri la „ansero (Hus), kiu demetas orajn ovojn“.

La reĝo eble tuj post la sinodo nomumis repacigan komisionon, kiu devis provi ordigi la konflikton en la universitato. Estas en ĝi la magistro Albík, ĝis tiam ne eksigita ĉefepiskopo de Prago, la reĝa sekretario Jakub de Dubá, eklezi-funkcie la dekanato de Vyšehrad kaj paroĥestro en Beroun, la magistro Zdeněk de Labouň, reĝa favorato kaj amiko de Hus, al ni bone konata el la tempo de bataloj pri la Dekreto de Kutná Hora, kaj la rektoro de la universitato magistro Křišť'an de Prachatice; la du reĝaj plenrajtigitoj estas amikoj de Hus kaj la magistro Albík kaj ankaŭ Jakub de Dubá povis esti laŭkoncepte pli proksime al la teologoj, sed en la komisiono ili prefere defendos la interesojn reĝajn ol ekleziajn. La animo de la pacigaj provoj estis verŝajne Křišť'an de Prachatice, la estra personulo de la komisiono estis sendube Zdeněk de Labouň; al Hus, kiu tuj post la sinodo ne revenis en Pragon, sendos Křišť'an leteron, en kiu li aludos la „venkon“ kaj li povas per tio pensi nenion alian ol ĝuste tiun ĉi reĝan komisionan proceduron.

Ke la reĝo komisiis al la komisiono trakti kun du partioj, aludas, ke Venceslao pasintjare ja koncedis akcepti la buleon pri la kondamno de Hus, sed nun, eble post sperto kun la interdikto, li absolute ne akceptas la kurian pritakson de Hus kaj de liaj adeptoj: ili estas por li unu partio en la proceso, ne herezuloj destinitaj al forbruligo. Kiam ni pripensas, ke Hus troviĝas en la plej peza anatemo kaj de la kurio estas ordonite lin eĉ mortigi, tiam la politiko de la reĝo rilate al Romo akiras nuancon eĉ de ribelema sendependeco. Ankaŭ la cirkonstanco, ke la konflikto estu venkata kiel skismo interne de la universitata nacio, do kiel konflikto inter teologoj kaj la cetera universitato, kaj ne kiel konflikto de la herezulo Hus kaj de la cetera eklezio, atestas nepre alian opinion pri Hus, ol kian prezentis Páleč kaj akceptis la sinodo. Verdire tiu ĉi ŝanĝo de starpunkto de la reĝo, apogita ankaŭ per opinio de la nobelaro, nepre malvarmigis la varmegajn kapojn, certajn jam pri la venko super Hus. Ja ankaŭ la saĝa kaj la taktikajn fajnecojn atentema Páleč en la traktado de la komisiono protestos kontraŭ tio, esti nomata unu el la partioj de la proceso; li sentas sin esti reprezentanto de la eklezio, la minoritata partio, la skismulo por li estas Hus.

La reĝa komisiono kunvenis kun la reprezentantoj de ambaŭ partioj en la sanktmikaela paroĥa domo de Křišť'an iun vendredon, iuj historiistoj prezentas la 17-an de februaro, aliaj la traktadon metas nur en majon, sed tion pro evidenta eraro, ĉar por Křišť'an finiĝis la rektora periodo jam la 25-an de aprilo. La priskribon de tiuj ĉi traktadoj postlasis en letero al amikoj Štěpán Páleč, la leteron li skribis nur iam en junio, senpere antaŭ sia fuĝo el Prago pro la reĝa kolero; estas paradokse, ke la raporton pri la traktado ni havas ĝuste el la dokumento, en kiu Páleč siajn adeptojn avertas, ke ili neniam plu lasu sin implikiĝi en similajn traktadojn pri interpaciĝo. En tiun ĉi kunvenon Páleč kompreneble venos, li ne povas ne veni, ĉar la komisiono reprezentas la reĝon. Krom li estis por teologoj invititaj ambaŭ Znojmoj, Stanislav kaj Petr, kaj Jan Eliáš; por la partio de Hus oni invitis la

magistrojn Jan de Jesenice, Jakoubek de Střibro kaj Simon de Tišnov. Jeroným Pražský, kiu certe volonte intervenus en la eventon, estas tiutempe misie en Pollando.

La traktadon verŝajne gvidis Zdeněk de Labouň kaj la komisiono estis solvanta du kontraŭajn plendojn de doktoroj, ke la partio de Hus ne volas submetiĝi al la roma eklezio en la konceptoj pri sakramentoj ktp., kaj de la husanoj, ke teologoj akre kondamnas ilin kaj nomas ilin „clerus pestifer“, pastraro pestoporta. La unuan diskutendan demandon Zdeněk de Labouň formulis tiom ambigue kaj vaste, por ke povu jesi ambaŭ partioj: ĉu ili volas submeti sin al la decido de la sankta roma kaj univversa la eklezio pri la doktrino pri sakramentoj, ŝlosiloj ktp.; la diferencigon je la roma kaj universala eklezioj en literaturo oni opinias la konsilo de Hus al Křišťan, sed eble malĝuste; sed la diferencigo sendube estis favora al alia difino de la eklezio ĉe la adeptoj de Hus. Kiel la unuaj respondis teologoj: al la demando ili jesis, cetere ĝi estis ilia propono al la sinodo, sed la ambiguan formulon de la eklezio fare de Zdeněk ili limigis tiel, ke per la eklezio ili opinias la papon kaj la kardinalojn, kiuj solaj estas kompetentaj decidi pri aferoj de la kredo. Post tio la komisiono demandis la doktorojn, ĉu ili volas devontigi sin, ke ili detenos sin de ofendoj al la alia partio, kaj la teologoj denove jesis, nur Páleč protestis, ke ili estas indikataj „partio“.

Por la husanoj parolis Jan de Jesenice. Li insistis pri la interkonsento farita kun Zbyněk, li rifuzis la kondamnon de misprezentitaj 45 artikoloj de Wicleff kaj ankaŭ la kalumniajn asertojn en la nelga sinodo, ke en Bohemio estas pastraro malbone opinianta pri sakramentoj; la postulon de obeemo al la roma eklezio li formulis kun jurista lerteco: lia partio „la dispozicion kaj determinon de la sankta eklezio roma rekonas kaj en la estonteco kun la Dia helpo volas esti obeema en ĉio, en kio la fidelaj kaj piaj kristanoj obei estas devigataj“. Kaj li proponis ankoraŭ alian formulon, ke lia partio „la dispoziciojn de la sankta eklezio roma, kies kapo estas la Savinto Kristo kaj la anstataŭanto de la Savinto la papo roma, agnoskis, agnoskas kaj en la estonteco kun la Dia helpo agnoskos ĉion, kion la fidelaj kaj piaj kristanoj estas devigitaj esti obeemaj“. Kaj ankaŭ li devoligis sin, ke lia partio ĉesos ofendi la alian partion kaj volas en tio subigi sin al la opinio kaj decido de komisaraj subpunoj, kiujn ili difinus.

La traktado estis sendube longa kaj malfacila, sed la teologoj fine akceptis ambaŭ punktojn de la interkonsento, kaj nome, ke ili volas agnoski la decidojn de la roma eklezio, kiun ili determinis kiel la papon kaj la kardinalojn, kaj ke la decidojn pri personaj ofendoj ili cedas al la komisaraj, kaj al tiuj ambaŭ punktoj ili devoligis sin sub la puno de pago de mil sesdekoj da groŝoj kaj de forpelo el la reĝlando. Ke ili akceptis la devoligon sub tiom alta puno kaj ke ili rezignis pri la agresiva kritiko de Hus kaj de liaj adeptoj, ne atestas pri ilia troa aplombo. Sed ili persistis en sia formulado pri la eklezio.

La alia partio aliĝis al la devoligo, sed kun la propra silenta koncepto pri tio, kio estas la eklezio; Zdeněk de Labouň poste la traktadon en la nomo de la komisiono fermis per tio, ke ambaŭ partioj do volas subiĝi al la decido de la sankta eklezio roma fruntloke kun la papo en ĉio, kio por la fidelaj kristanoj estas deviga, kio estas formulado kompromisa por ambaŭ partioj, kaj iom antaŭtempe li deklaris, ke ili estas en tio konkordaj. Kaj ke ili tiel konfesu antaŭ la reĝo, ĉefepiskopo kaj nobeloj. Ambaŭ partiojn li admonis, ke ili sin reciproke ne senhonorigu kaj la honorofendojn, pri kiuj ili plendas, ili prezentu al la komisiono skribe, ĝi decidus pri ili – kaj la doktoroj pri teologio kontraŭ liaj konkludoj indigne protestis, leviĝis kaj laŭdire ekvokis: „En kio ni estas konkordaj!“ kaj el la traktado ili foriris.

Ili ne spitemis longe. La komisiono venigis ilin jam la sekvan tagon kaj demandis, ĉu ili persistas en la hieraŭa interkonsento. Diri, ke ili persistas, tion ili devis, post kiam ili al la interkonsento devoligis sin sub la alta monpuno kaj sub la puno de ekzilo, sed Stanislav de Znojmo oponis, ke ili devoligis sin al neniuj deklaro pri konkordo antaŭ la reĝo, ĉefepiskopo kaj nobeloj. Tiun ĉi postulon de la komisiono la teologoj male turnis kontraŭ la interkonsento, ili komencis postuli novajn formulojn de kondiĉoj, en kiuj ili estas komplezaj „esti konkordaj“ kaj la traktadojn pri la konkordo ili elprofitis al obstrukcoj, kies eblecoj estis nekalkuleblaj. Stanislav havis skribe preparitan aldonon al la interkonsento, ke la opinioj de la eklezio pri sakramentoj, ŝlosiloj ktp. estas ĝustaj, dum „la opinio de Wicleff al tio kontraŭa estas falsa kaj hereza“. Kompreneble la komisiono strebis pri formuloj akcepteblaj al ambaŭ partioj, la rektan kondamnon de Wicleff la husanoj ne akceptus, kaj

tial la komisaroj laŭdire incitiĝis kaj minacis al la teologoj per la kolero de la reĝo. Páleč, bone konsciante, ke la interkonsento estus ebla nur surbaze de formuloj kiel eble plej ĝeneralaj, kontraŭe postulis, ke oni pridiskutu detalojn, ĉar sen la interkonsento pri detaloj ne eblas paroli pri principa konkordo kaj akordo, kaj Stanislav prezentis al la hieraŭa akordiĝo ankoraŭ aldonon duan, nome ke per la roma eklezio oni pensas tiun, kies kapo estas nun la papo Johano XXIII-a kaj la korpo la kardinalaro; kiam la partio de Hus subiĝos al ties decidoj, tiam ili estas konkordaj.

Jan de Jesenice, certe al la mirego kaj malplaĉo de la teologoj, ilian ŝanĝon de la formulado akceptis; sed li postulis, ke en la frazo, ke ili estas komplezaj subiĝi al la roma eklezio, „kies kapo estas nun Johano XXIII-a kaj la korpo la kardinalaro“, estu aligita la aldono „en ĉio, en kio la kredantoj estas devigataj esti obeemaj“. Tion la teologoj rezolute rifuzis, tiuj ĉi belaj vortoj, ili diris, kaŝas venenon kaj eblas per ili defendi ĉiun neobeemon. Kiam Stanislav de Znojmo en la verko *Alma et venerabilis* defendos antaŭ la komisiono la konduton de la teologoj, li nomos la aldonon de Jesenice ruza. La interkonsento do ne estis atingita kaj la komisiono la traktadon interrompis.

Hus dume ie retirite atendas, kiel la traktadoj finiĝos, por si mem li sentas al ili skeptikemon, eble eĉ pli multe: interne li ne plu aprobas ilin. „Pri la skismo en la nacio mi ne kredas, ke ĝi estus forigebla,“ li skribas al Kriŝt’an al lia letero kun la sciigo pri la „venko“. Ankoraŭ antaŭ la sinodo li mem preferas taktikan procedon, la malakordojn li ne gradigas, li nur insistas pri sia opinio kaj proponas malfermi publikajn traktadojn pri disputeblaj demandoj; post la antaŭsinoda elpaŝo de Páleč kun la frapanta formulado de la eklezio li ekrimarkis pli frue ol ceteraj, ke la interpaciĝo estas eliminata. Kaj se li lasas Jesenice trakti pri kompromiso, li mem impresis, ke li mem opinicedojn apenaŭ akceptus. En la tempo de repacigaj provoj li skribis al Kriŝt’an el sia retiriteco du leterojn kaj el ambaŭ rekte ŝprucas, kiom li estas malproksima al la diplomaciaj manovroj, kiujn ankaŭ por li Kriŝt’an kaj Jesenice kaj Zdeněk de Labouň faras, kiel li estas eniĝinta en la propran koncepton de la eklezio, kiun li ĝuste en granda traktato prilaboras kaj kiu estas kun tiu de Páleč absolute nepacigebla.

La unuan leteron li sendis al Kriŝt’an verŝajne tuj post la sinodo aŭ almenaŭ en la komencoj de la traktado de la komisiono; devas plenumiĝi la profetaĵo de Kristo, kiu ne venis por prezenti pacon, sed glavon, li skribas, kaj citas al tio la vortojn de sankta Paŭlo, ke „ne finigos la filo malvirtecojn, ĝis venos skismo“. La akrajn formuladojn povis kaŭzi ankaŭ la profunda disreviĝo kaj vundosento de Hus pro Páleč kaj Stanislav, sed ankaŭ estas en ili entenita penetreme preciza pritakso de la situacio. Hus citas Kriston „el lernejoj oni elpelos vin kaj iujn mortigos konjektante, ke per tio oni servas al Dio, kaj vi estos malamataj de ĉiuj homoj pro mia nomo, gepatroj kaj parencoj perfidos vin“, ĉar li povas senti sin ĉirkaŭita ĝuste de tia ĉi ampleksega persekutado, kaj skribas, ke tio ĉi estas provoj pli grandaj, „ol suferi de Stanislav aŭ de Páleč“. Pri la „venko“, pri kiu informis lin Kriŝt’an, li esprimas sin: „Mi neniel aprobas la gloron profanan, ĉar mi scias, ke venkas tiu, kiun trafos la morto.“

Jam en tiu ĉi unua letero Hus indigne rifuzas la formuladon de la eklezio fare de Páleč kaj ankaŭ la maldecan parolturnon pri nedefendado de la nure bona kaj neordonado de la nure malbona. „Mi esperas je Dia graco, ke mi neniam tiom malbonajn herezojn dissemadis... Ĉu Antikristo povas levi sin pli supren super ĉion, kion oni nomas Dio... sole per la aserto, ke Dio ne povas doni al sia eklezio aliajn sekvantojn, ol estas papo kun kardinaloj?“ Kaj la dua letero estas propre malgranda kaj bone pripensita traktateto, en kiu Hus respondas la demandon, peritan al li de Kriŝt’an el la traktado de la komisiono, ĉu li „volus agnoski tion, ke papo estas kapo de la sankta roma eklezio kaj kardinaloj ties korpo kaj plue agnoski ĉiujn dispoziciojn kaj dekretojn de tiu ĉi sankta roma eklezio“.

„Serpento en herbo sin kaŝas,“ li kribas pri la formulado de la eklezio fare de Páleč kaj deduktas, se papo estas la kapo kaj kardinaloj la korpo, do tiam ili estas la tuta sankta roma eklezio, kaj se ĉio, kion ili decidis, devas esti konsiderata kredo, tiam ne nur li, sed ankaŭ la reĝo kaj kiu ajn devus subiĝi al kiaj ajn iliaj decidoj, kiujn eblas „elfosi“. Hus elnombras vicon da papaj kaj kardinalaj dispozicioj, kiujn oni ne povas opinii kredo kaj pravas per ili, ke la teorio pri la eklezio kiel papo kaj kardinaloj estas formita por tio, ke li, Wicleff, sed ankaŭ eble la reĝo, se ili ne obeos la papon, estu kondamnitaj. Kiam ili decidis, ke indulgencoj estas katolikaj, „sed ci Hus, predikis malon, kaj



sekve malkonfirmu aŭ subigu cin al ŝtiparumo“.

Hus ĉefe riproĉis al la konsilio de doktoroj, kiel oni ankaŭ nomas la „tri verojn“ de Páleč, ke en ĝi la kapo de la eklezio ne estas opiniata Kristo, kaj ke la doktoroj eĉ „entute en sia konsilio pri Kristo faras nek mencion“. Tio estas vere perpleksiga ekscio: en sia kaptiteco por obeemo, en la kontraŭstaro kontraŭ la Skribo kiel kriterio de la vero kaj en la absoluta obeemo al la eklezia ofico Páleč kun Stanislav en sia formulado de la roma eklezio evitis entute la mencion pri Kristo. Hus al Kriřt'an respondas la demandon, ke li ja aprobas tion, ke la papo estas anstataŭanto de Kristo en la roma eklezio, sed por li tio ne estas kredo; kaj se la papo estas predestinita kaj se li plenumas la oficon laŭ la ekzemplo de Kristo, tiam li estas la kapo de eklezio batalanta; sed se li vivas en kontraŭstaro al Kristo, „li estas ŝtelisto kaj kanajlo enpaŝanta alivoje“ kaj „lupo glutema“. Plue li persistas en tio, ke „kion ajn la sankta roma eklezio aŭ la papo kun la kardinaloj decidis la ŭ la le ĝ o d e K r i s t o (substrekite de Hus), li volas tion humile kiel fidela kristano teni serioze kaj respektoplene akcepti“; en mala kazo tiaspecajn decidojn li rifuzos, kiel li tion jam faris kaj estas pro tio sub anatemo.

Per la disputo pri formulado de la eklezio la pensmoviĝo en Bohemio venas en la centron de la afero mem, ĝi aspektas eĉ tiel, ke la impeta konflikto interne de la eklezio en Bohemio vekis ĝuste en la disputo pri la formulado de la nocio „eklezio“ la memstare formiĝantan kaj tuteŭrope gravan spiritan celadon. La koncepton de Hus enhavas la traktato *Pri la eklezio*, Hus komencis verki ĝin jam iam en la komenco de la dektria jaro, evidente ŝvebis en la aero la devo esprimi komplete la teorion de la eklezio. La traktato havas ĝis duono instru-teologian karakteron, Hus ĉi-loke sinoptike prilaboras la ekleziologian temon tiel, kiel li komprenas ĝin; oni kutime riproĉas al li neoriginalecon, tion, ke li sole transprenis la teorion de Wicleff, sed ĝi estas skoldo maljusta, Hus la ideojn dissemitajn en 36 diversaj libroj de Wicleff ordigas en kompletigitan doktrinon kaj apogas sin ĉe tio ankaŭ sur la Skribo, sur la sanktaj patroj, ĉefe S-ta Aŭgusteno, kaj ankaŭ sur la kanonika juro. Kaj ne eblas ne mencii tion, ke en la libro li Wicleff eĉ ne unufoje rememoras. En la origine instrua aspekto Hus la traktaton ne finverkis, ekde la 12-a ĉapitro la formo de la libro akre rompiĝas en polemikon kun la koncepto de Stanislav kaj Páleč. La traktato *Pri la eklezio* estas la plej glora verko de Hus, ĝi konserviĝis en dudek manuskriptoj kaj en la 16-a jarcento Luther trifoje presigis ĝin. Kun la traktato polemikis ĉefe Štěpán Páleč, kiu unuopajn elŝiritajn konceptojn formulis en la akuz-tezojn por la koncilio de Konstanco, kaj ankaŭ dudek jarojn pli poste la teologo Jan de Dubrovnik, unu el la organizantoj de la koncilio de Bazelo. La Konstanca koncilio kondamnis la verkon de Hus *Pri la eklezio* al forbruligo.

Iuj historiistoj supozas, ke „ĝi estis lerta ago de la teologoj, ke la konflikton ili scipovis alkonduki sur tiun ĉi kampon“, do ke ili implikis Hus en la ampleksan teologian konflikton pri la danĝera demando, sed per tiu ĉi supozo, ĉe ĉiuj simpatioj al Hus, ili fakte lin subtaksas. Unuflanke li mem komencis okupiĝi pri la teorio de la eklezio, se ne je kelkaj semajnoj pli frue, do nepre samtempe kun la teologoj, kaj ĝi atestus pri lia mensa malforteco, se li ne taskus al si la solvon de la nocio „eklezio“, aliflanke Hus ne estis simplulo, kiu kolizius kontraŭ ies sagaco. Hus ne estas de la teologoj elprovokita al iu nesingardemo, kaj la teologoj ne skribas siajn verkojn por inciti lin al nepripensita protesto, ambaŭ partioj en la bataloj serĉas kaj formulas la teorion fundamenton de la konflikto, kiu okazas sur pli alta nivelo, ol estas nuraj taktikaj mallertaĵoj aŭ rutinaj agoj. La dumaniera konceptado de la eklezio rezultas el la dumaniera kompreno de la mondo entute, estas en ili esprimitaj ankaŭ malsamaj filozofiaj elirsolvoj. Kaj ne devus nin konfuzi eĉ la enmiksaĵoj de personaj pasioj, kiuj ĉe Páleč aspektas kiel home nekvalitaj, sed kiuj tamen ne malaltigas la signifon de tio, kion la tiam ĉeĥa impeta polemiko enmetis en la teorion de la eklezio.

Esplorantoj konstatas, ke tiutempe la ekleziologio ne estas ankoraŭ prilaborita kiel kompleta teologia scienco, la ĉefa teologia manlibro de la mezepoko, per kiu la teologoj en universitato edukiĝis, la Sentencoj de Lombardo, la sciencon pri la eklezio ne havas kaj ne havas ĝin eĉ Summa de Tomaso la Akvinano; la teorio de la eklezio kiel tia en la teologia fakultato ne instruiĝis. La dogmojn pri la eklezio sinsekve kreis la eklezia praktiko, la decidoj de koncilioj kaj de papoj, kaj tiuj estis entenitaj en la kanona juro, en la Corpus iuris canonici, sed kun tiu ĉi manipulis la kanonistoj, do juristoj; la teologoj studis la kanonan juron nur en la pli alta kurso. La kanona juro

estas do ankaŭ la ĉefa fonto de Páleč kaj Stanislav ĉe formado de ilia koncepto de la eklezio kaj la konsilantoj en tio por ili plej verŝajne estis la doktoroj de juro Šimon kaj Jiří de Bor.

Konserviĝis letero de Stanislav de Znojmo al sinjorino Pumlovská, interesa ĝuste pro tio, ke en ĝi la respektinda teologo al tiu ĉi evidente influhava virino, eble por rezisti la influon de Hus, klarigas sian koncepton de eklezio kaj la letero estas verŝajne la unua skriba prezento de lia teorio. Unuafoje publike ilian koncepton de la eklezio Páleč prezentos en la sanktdorotea sinodo kaj poste ambaŭ teologoj sian koncepton plu precizigas kaj pritraktas en ekleziologiaj verkoj. En la traktato *Pri la signifo de la nocio eklezio (O významu pojmu církve)* Páleč distingas ses eblajn signifojn de tiu ĉi nocio: ĝi estas la nomo por materia templo, la socio de malbonuloj, la universala koncilio, la ekleziaj reprezentantoj, la komunumo de ĉiuj antaŭaranĝitaj kaj por ĉiuj baptitaj kristanoj unuigitaj per la kredo. La fundamenton de ilia teorio enhavas la verko de Stanislav *Pri la Roma Eklezio (O Římské Církvi)*. En la dekkvara jaro kiel polemikon kun Hus verkos Páleč propran ampleksan verkon *Pri la eklezio*.

Por plene kompreni la profundon de la konflikto kaj ankaŭ la malsamecon de la pensinspiraj procedoj kaj elirsolvoj ni devas almenaŭ mallonge priskribi, kion pri la eklezio opiniis Stanislav kun Páleč kaj kion pri ĝi pensis Hus.

La libro de Hus *Pri la eklezio* estas ekzemplo de la neta utiligo de la platonismo kaj legeblas kiel dolĉa kanto pri la elektita dia popolo. Iom ĝuste aludis Páleč skribante pri la dolĉa veneno de la viklefismo, sed en tute alia senco li tion pensis. Ĝi estas la dolĉeco de la subiĝo al la alta ideo, de la subiĝo senborda, la homo ĉi tie sur la tero estas ombra esprimo de la absoluto: Dio estas la antaŭdestinanto de ĉio homa, la homo celas aŭ al la pereco aŭ al la Dia patrujo, la eterna gloro. Hus utiligas por la eklezio la malnovegajn metaforajn paralelojn. La eklezio estas la „domo de Dio“, konstruita por ke en ĝi la popolo servu al sia Sinjoro; kaj ĝuste pro tio kristano ne devas kredi je la eklezio, ĉar ĝi ne estas Dio, sed la domo de Dio, sed li devas kredi, ke la eklezio estas la f i a n ĉ i n o d e K r i s t o , kiun Kristo pro la grandega amo elaĉetis per sia sango. En pli proksima metaforo Hus titolas la eklezion k o r p o de Kristo, dum Kristo estas ties kapo. Tiun ĉi korpon, la veran eklezion de Kristo, formas la elektitoj de Dio, la homoj de Dio destinitaj al savo, a n t a ŭ a r a n ĝ i t a j , predestinitaj. La antaŭaranĝitaj estas la veraj kaj solaj membroj de la eklezio de Kristo, pere de ili estas lia eklezio disvastigita en la tutan mondon; kie estas antaŭaranĝito, tie estas la eklezio. Pere de ili ĝi estas la ununura. La eklezio do, la korpo de Kristo, la fianĉino de Kristo, la domo de Dio estas la nombro de ĉiuj antaŭaranĝitoj ekde la komenco ĝis la fino de la mondo. Tiun ĉi antaŭdestinon al la eterna savo destinis Dio kaj li ankaŭ fiksas, kiom da homoj kaj kiuj venos en la ĉielan patrujon, kiu do kaj kiom da homoj formas la eklezion de Kristo, la misteran korpon, la domon de Dio.

La vera eklezio, la eklezio de Kristo, estas do n e v i d e b l a kaj ĝi konsistas el tri partoj – el la eklezio b a t a l a n t a , tio estas la antaŭaranĝitoj migrantaj ĉi tie sur la tero al la patrujo, en la eternan savon; el la eklezio s u f e r a n t a , tio estas la subigitoj en la purgatorio, kie ili postmorte puriĝas de la pekoj faritaj sur la tero; kaj fine el la eklezio v e n k i n t a , de sanktuloj jam ripozantaj en la patrujo. En la tago de lasta juĝo ĝi estos unu eklezio venkinta de ĉiuj justuloj, de Dio antaŭdestinitaj por la eterna savo.

La antaŭdestino de Dio estas kelkspeca, apud la antaŭaranĝitaj estas ankaŭ a n t a ŭ s c i a t a j , la homoj de Dio rifuzitaj. Tiuj al la mistika korpo de la Kristo-eklezio ne apartenas. Signifas ion alian esti *el* la eklezio kaj esti *en* la eklezio. *El* la eklezio estas nur la antaŭaranĝitaj, dum la antaŭsciataj estas *en* la eklezio samkiel ekskrecioj aŭ mukaĵoj en la korpo; ili devas esti elpelitaj el la eklezio de Kristo, ili ne atingos la eternan savon. Pro la Dia antaŭdestino ekzistas ankaŭ la eklezio de malbonaj, la eklezio de diablo, la sinagogo de Satano. La teorio pri la antaŭaranĝitaj kaj antaŭsciataj jam ekde la tempoj de sankta Aŭgusteno solvis la malfacilegan problemon de kunekzistado de kristanoj kaj paganoj, Hus helpe de ĝi solvas ankaŭ la problemon de kunekzistado de la homoj bonaj kaj malbonaj en la surtera eklezio.

La homo pri si kaj pri aliaj ne scias, ĉu oni estas antaŭaranĝitaj aŭ antaŭsciataj, la veron pri la eklezio scias nur Dio; la homo povas tion ekscii nur per revelacio aŭ nur post la morto. Kaj la eklezio ĉi tie surtere per la akto de la Dia predestino je la elektitaj aŭ kondamnitaj, je antaŭaranĝitaj

kaj antaŭsciataj kaj malbonaj, ŝajna s nur esti eklezio, ĝi estas nur la homa supozo pri ĝi. Ĝi estas eklezio nur laŭ nomo. Inter tiu ĉi eklezio supozata kaj la eklezio vera, nevidebla, mistika eklezio de Kristo, estigas la teorio de Hus komplike strukturitan interligon.

En la eklezio ĉi tie surtere, en tiu laŭnoma, laŭ la homa supozo, estas ja tramiksita kiel la antaŭaranĝitaj, tiel ankaŭ la antaŭsciataj kaj malbonaj; Hus tiujn ĉi kelkspecajn rilatojn: la nevidebla eklezio de Kristo kaj la videbla eklezio laŭnoma; la antaŭsciatoj kaj la vera eklezio de Kristo; la antaŭsciato aŭ eĉ la malbonaj kaj la eklezio laŭnoma, solvas per pripensite komponitaj figuroj. Ili estas bazitaj sur tio, ke la destineco estas en la koncepto de Hus duspeca, kaj tiu ĉi duspececo permesas inkludi en la gracon Dian la antaŭaranĝitajn kaj la antaŭsciatajn, la elektitajn kaj ankaŭ la kondamnitajn. Unuflanke ĝi estas jam la menciita antaŭaranĝiteco por la atingo de la eterna vivo, la fundamenta Dia graco, kiu koncernas nur la antaŭaranĝitajn; kaj aliflanke ĝi estas la antaŭaranĝiteco al la *ĉeestanta justeco*. Ĝi estas la Dia graco, ebliganta la absolvadon de pekoj, ĝi koncernas la antaŭaranĝitajn kaj la antaŭsciatajn, ĝi estas la graco stimulantanta la homan volon. Ĝi estas ankaŭ, malkiel la antaŭaranĝiteco al la eterna vivo, bone rekonebla. Ĝi ne koncernas la malbonajn, kiuj strebas pri neniu Dia graco.

La graco de la *ĉeestanta justeco* havas en la teorio de Hus principan distingan kaj dinamikigan rolon. La antaŭaranĝita estas sendube predestinita por la eterna gloro, sed pri tiu ĉi sia predestino li ne scias; ĉi tie surtere li pekas kaj la graco de la *ĉeestanta justeco* ebligas al li pentofari kaj peni akiri la absolvon de la peko. La antaŭaranĝita estas do en la sankta eklezio, en la vera eklezio de Kristo, dusence, laŭ la antaŭaranĝiteco por la vivo eterna kaj laŭ la *ĉeestanta justeco*; la unua elekto estas konstanta, fiksita de Dio; la utiligo de la alia dependas de la homo kaj la antaŭaranĝita en ĝi ne devas persisti ĝis la fino. Surbaze de ambaŭ gracoj la antaŭaranĝita povas esti samtempe justa kaj maljusta, justa pro Dia volo de antaŭaranĝiteco al la eterna vivo, maljusta per sia peko. En tiu rilato Hus skribas pri la *abolicebla* apartigo disde la eklezio; eĉ iuj herezuloj, apartigitaj de la Kristo-eklezio per peko, rajtas atingi la eternan gloron per la graco de antaŭaranĝiteco, eĉ se ne laŭ la *ĉeestanta justeco*. Ĝuste el tiu ĉi ideo Hus deduktas, ke pri neniu ĉi tie sur la tero oni rajtas esprimi kondamnan verdikton, kiu estas kiu antaŭ Dio scias nur Dio mem, kaj sur tiu ĉi ideo li havas bazitan ankaŭ la defendon de la persono de Wicleff.

La ideo de la *ĉeestanta justeco*, de Dia graco absolvanta pekojn, liberige ligiĝas ankaŭ al homoj antaŭsciataj. Dum la tempo, kiam ili estas en graco laŭ la *ĉeestanta justeco*, do kiam ili ne pekas aŭ la pekojn bedaŭras kaj satisfacias ilin, ili estas *en* la eklezio, en la ĝusta eklezio de Kristo; sed kiel antaŭsciataj ili estas subordigitaj al *neabolicebla* apartigo disde la Kristo-eklezio, ili troviĝas en ĝi nur kiel mukaĵoj en korpo, ili ne estas *el* ĝi, ne atendas ilin la eterna savo en la ĉielo. La teorio de la antaŭsciataj estas malforta loko de la koncepto de eklezio fare de Hus, en la kritika absorbiteco kontraŭ la malordoj en la eklezio ĉi tie surtere, en la eklezio laŭ nomo, por tiujn ĉi malordojn difini kaj ekspliki li formas en sia teorio pli grandan spacon por ebleco de kritiko, ol por ebleco de la homa savo. La diferenco inter la elektitaj kaj kondamnitaj estas ĉi tie tro rigora, la ebleco de la homo tro limigita, la rezono tro strikta.

La diferencon kaj komplikecon de la aplikado de antaŭaranĝiteco al la vivo eterna kaj al la *ĉeestanta justeco* ni povas demonstri sur tio, kiel Hus priskribas la poziciojn de sankta Paŭlo kaj de Judaso en la eklezio. Sankta Paŭlo estis sakrilegianto laŭ la *ĉeestanta justeco*, kaj samtempe li estis el la sankta eklezio kaj en la graco laŭ la antaŭaranĝiteco por la vivo eterna. Dum Judaso estis en la graco laŭ la *ĉeestanta justeco*, sed neniam li estis el la sankta eklezio laŭ la antaŭaranĝiteco por la vivo eterna. Do kvankam Judaso estis la apostolo de Kristo elektita, neniam li estis parto de la sankta eklezio universala kaj lia apostoleco estis nur nomo de la ofico; dum Paŭlo, kvankam li sakrilegiis, neniam estis membro de diablo.

Similan aktualan batalpikilon, fare de Hus, havas ankaŭ la diferencigo de la kvarspeca rilato al la eklezio: kristanoj kiel antaŭaranĝitaj katolikoj obeemaj al Kristo estas en la eklezio laŭ la nomo kaj ankaŭ en la eklezio vera; antaŭsciataj paganoj estas nek en la eklezio vera, nek en la eklezio laŭ la nomo. Kristanoj la antaŭsciataj hipokrituloj estas nur en la eklezio laŭ la nomo. Kontraŭe la antaŭaranĝitaj kristanoj povas esti ekster la eklezio laŭ la nomo, kaj nome kiam ilin la servistoj de Antikristo en ŝajna formo de eklezio kondamnas; tiel estis kiel sakrilegianto kaj herezulo fare de

fariseoj kondamnita Kristo, la antaŭaranĝita filo de Dio.

Stanislav de Znojmo riproĉas al Hus, ke per la teorio pri la vereco de la nevidebla Kristo-eklezio en la surtera eklezio nepre estiĝas konfuzo: la eklezio batalanta devas havi fiksitajn direkto-centron, kie decidiĝas, kio estas bona kaj kio malbona. Hus la objekton refutas per tio, ke ĝu s t e p r o t i o estas animzorganto ligita fari virtajn agojn, por ke lia subulo povu ekkoni, ke laŭ la ĉeestanta justeco li estas membro de la eklezio. Sed se la subulo ekkonas krimon de la superulo, tiam li devas supozi, ke tiu ne estas justa, sed ke li estas malamiko de Jesuo Kristo. Sekve ne la rango, sed la Dia graco de la ĉeestanta justeco, aŭ alimaniere dirite la virteco aŭ pekemo de kiu ajn, ebligas ekscii, kiu estas *en* la eklezio.

La ideo de graco de la ĉeestanta justeco enportas en la prijuĝadon de superuloj liberecon ĝuste revolucion, eĉ ĉiuj pastroj ne devas esti el la eklezio vera, ili estas nur en la eklezio supozata, multaj nur laŭ la homa famo nomas sin kapo kaj membroj de la eklezio, sed laŭ la predestino de Dio ili povas esti membroj de la eklezio diabla. Kaj eĉ tiuj, pri kiuj laŭ la ĉeestanta justeco eblas diri, ke ili estas el la eklezio, estas en ĝi eble ŝajne, ne en la vero laŭ la antaŭaranĝiteco por la gloro. La vero pri la homo sekvas el la antaŭaranĝiteco, la supozo rezultas el la ĉeestanta justeco, la veron pri la eklezio scias Kristo, la homo povas esprimi nur supozon surbaze de la konduto de kredanto. Inter la vero de Dio kaj la homa supozo estiĝas mirinda streĉo, kiun Hus utiligas kiel efikan ilon por sia kritiko de la surtera eklezio.

La projekcio de la nevidebla eklezio de Kristo en la eklezion laŭ nomo konstituas la rektan postulon de videbla virteco kaj dinamigas ĉiudirekten la homajn agadojn kaj rezonon. La nevidebla kaj vera eklezio de Kristo, la eklezio al la homo atingebligita per la Dia vero, evangelioj kaj biblio, projekciiĝas en la eklezion ĉi tie sur la tero, la konscio pri la eklezio de Kristo trapenetas la eklezion supozatan, la kristano, se li volas atingi la eternan savon, povas nur esperi kaj strebi al la Dia graco, estiĝas la dinamikeco de la homa agado, ligita de alta ideo. La surtera eklezio laŭnoma devas senĉese pruvadi, ke ĝi havas volon asimiliĝi kun la vera eklezio de Kristo, kaj se neniu scias, kiu li estas laŭ la Dia predestino, ne scias tion pri si eĉ papo kaj prelatoj kaj kiu ajn, kaj ĉiuj devas akiri meriton pri la Dia graco. Per la teorio pri vereco de la nevidebla eklezio de Kristo Hus kreas por si distancon kaj vastan spacon por la kritiko de la surtera eklezio, ĝislarĝe li malfermas la eblecon kaj rajton prijuĝi ĝian vivon, la devigon aŭ nedevigon de ĝiaj decidoj.

La teorio de Hus estas ravega miksaĵo de absoluta humileco kun la libereco de rezonado kaj kritiko, granda ideo jen malligas manojn al la libera pensado. En la fordoniĝo al Dio Hus gardas sin esti orgojla en supozo, sed en la direkto al homoj li antaŭmetas al si neniun barilon, nur la Dian veron. Trapenetas tie la libereco kaj la humileco, la prudento kaj la kredo, la vero kaj la ŝajno de sopirata harmonio. La hierarkian konstruon de la ekzistanta eklezio Hus rekte ne dubindigas, sed ĝi estas por li nur la eklezio supozata, li priskribas ĝian staton kaj pritaksas ĝin laŭ vereco de la eklezio de Kristo. La teorio de la eklezio fare de Hus malfermas la eblecon de senpera aplikado de la modelo de la Skribo en la eklezio laŭ nomo, ĝian devigon kaj juĝistan instancecon. La relativigo, la supozeco de la surtera eklezio ĉe Hus ja ankoraŭ ne signifas fondon de alia eklezio, sed la teorio de Hus fondas kolapson de la monarkisma hierarkia ordonstrukturo, en kiu la katolika eklezio en tiu tempo stabiliĝis. Eblas diri tiel, ke Hus ne pensas pri fondo de alia eklezio, sed en alia strukturo de eklezio li jam pensas. Ĝi estas malfermita punkto de lia teorio kaj estas malfacile diri, kien kaj kiel li finprilaborus ĝin, en kio li ĝin limigus aŭ disvolvus, se en la unua ekaperado de la ideo oni ne mortigus lin kaj se li havus tempon kaj eblecon realigi ĝin praktike.

Ĉar ideo deziras esti institucie realigita, kaj tiun ĉi alian tendencon provis en la batalo kontraŭ Hus esprimi Stanislav de Znojmo kaj poste ĉefe Štěpán Pálec. La realigado de la ideo pere de institucio estas unu el la plej komplikaj aferoj en la homa socio kaj ĝi estas por la homo same grava kiel la ideo mem. La homo havas bezonon objektivigi sin, ien aparteni, en iun komunumon, kaj tiun ĉi kunapartenon kun la parenca tuto la ideo donas al li per sia realiganto, en nia kazo per la eklezio; en institucio la homo la ideon realigas en certaj reguloj de disciplinemo kaj ceremonioj, sed ankaŭ en la rango kaj potenco.

Sed institucio havas senĉesan tendencon en sia praktika realigado disde sia origina ideo sendependiĝi, dekreĉi de ĝi, superrangiĝi al ĝi, formaligi ĝin, ĉar institucio estas ankaŭ produkto de

potencligoj de la homa socio, kaj ilin la ideo ofte ĝenas. Kaj kiel al la institucio estas propra la malobeemo rilate al la fundamento el kiu ĝi estiĝis, kiel per la formaligo ĝi kamuflas -a originan sencon de sia ekzistado, tiel ĝi estas samtempe al sia fundamento remetata de la nesilentiĝantaj opoziciaj fluoj en ĝi; kaj en tiu ĉi malfluso kaj fluso, malproksimiĝado kaj proksimiĝado al la ideo, efektiviĝas ĝia propra vivo kaj evoluo. Kaj do kiam Hus serĉas en la eklezi-teorio spacon por la kritiko kaj manieron de etikigo de la eklezio, de ĝia reveno al Kristo, Páleĉ per sia teorio formas la teologian motivigon ĝuste de ĝia potenco-institucia formo.

La fundamentan dividon komencas Páleĉ al la eklezio de *senpiloj* kaj al la eklezio de *kredantoj*. La eklezio de kredantoj estas *duspeca materia kaj spirita*. Per la materia eklezio Páleĉ opinias *templon*, lokon sanktigitan, sole kie okazas oferado kaj kie oni zorgas pri la religia edukado de kredantoj. La koncepto de la materia eklezio ebligas al Páleĉ apologii la bildojn, statuojn kaj relikvojn, kiujn herezuloj malaprobas. La eklezio spirita estas *universala kaj parta*. La universala estas trispeca: la eklezio de *antaŭaranoj*, la eklezio *batalanta* kaj la eklezio *roma*, kaj nome laŭ la trispeca graco: la graco de antaŭaranĝiteco, la graco sanktiganta kaj la graco donacita.

La *eklezion de antaŭaranoj* formas ĉiuj antaŭaranĝitaj ekde komenco ĝis fino de la mondo; ĝi estas unu pro la unueco de la *kredo*, ĉiuj estos savitaj per la kredo je Jesuo Kristo, plue per la unueco de la *bapto*, per la unueco de la *graco de la antaŭarano* kaj per la unueco de la kapo kio estas *Kristo*. Post Dio ĝi estas la plej digna, en Credo ĝi estas tuj post la Triunuo, sed ĉar ĝi estas kreita, ne decas kredi *je* ĝi, sed oni devas kredi, ke ĝi estas la sankta eklezio universala. Páleĉ do akceptas la ideon de la eklezio de antaŭaranĝitaj, sed ĝi elstaras el la totala koncepto neprilaborita kaj neenvicigebla, alidevena. La solvo de Hus estas kompakta, ĉar lian vidpunkton determinas la Dia principo; Páleĉ konstruas sian imagon de la eklezio laŭ la principo homa, li priskribas kaj pripensas ne tion, kiel en la eklezio aktivas Dio, Dion li en sian imagon de la eklezio nur instalas, li priskribas, kiel en la eklezio funkcias homoj. Eblus diri, ke la koncepto de Hus estas Dia defio, dum tiu de Páleĉ estas priskribo de la surtera eklezia praktiko, kaj la eklezio de la antaŭaranĝitaj tiam kompreneble el la tuta teorio nefinsolvite elstaras.

Páleĉ estas tiom absorbita de la eklezio videbla, ke ĝiaj atributoj projekciiĝas eĉ en la eklezion de antaŭaranĝitoj, kiu malfacile povas esti unueca pro la unueco de la bapto kaj fondita sur la unueco de la kredo je Kristo, kiam ĝia konsistaĵo estas la antaŭaranĝitoj ekde komenco de la mondo kaj ili eĉ ne devas esti en la nuntempo kristanoj. Akorde kun Hus Páleĉ skribas, ke en la eklezio de antaŭaranĝitaj neniu pereos kaj ekster ĝi neniu estos savita, ĝi estas la ŝafaro de Kristo, sed de Hus li diferencas skribante, ke estas en ĝi diversaj homoj, strebantaj tra diversaj vojoj atingi la savon, estiĝas en ĝi diverseco de sociaj tavoloj, kaj tiu ĉi diverseco apartenas al la tuteco, beleco kaj perfekteco de la mistika korpo de Kristo kaj ne rompas la unuecon de la kredo. En la eklezio de antaŭaranĝitoj estas laŭ Páleĉ bonaj kaj malbonaj, kaj ĝi tamen estas sankta, ĉar ĝuste ĝia formo estas la kredo. La platona ideo de la antaŭaranĝiteco senĉese transversiiĝas al la interpreto de Páleĉ, pri la eklezio de antaŭaranĝitoj Páleĉ simple estas senkonsila, kaj ankaŭ Jan Sedlák, kiu la verkon de Páleĉ pionire malkovris kaj eldonis, rimarkigas, ke iuj en tiu ĉi eklezio la kredon ne havas kaj ke ĝia formo ne estas la kredo, sed la graco de la antaŭaranĝiteco. Sed Páleĉ la kredon faras la fundamento de la eklezio entute, de ĉiuj ĝiaj formoj, kaj devas ĝin kiel principon interligi ankaŭ en la eklezion de antaŭaranĝitaj. La eklezio de antaŭaranĝitoj havas trispecan formon, ĝi estas la eklezio *venka*, *superanta* kaj parto de la eklezio *batalanta*. Ĝia kapo ne estas papo, sed Kristo, ĝi ne estas nomata apostola.

La ĉefa konflikto inter la konceptoj de Páleĉ kaj Hus estiĝas nur en la plua tavoligo de la ekspliko de Páleĉ. Ekster la eklezion de antaŭaranĝitaj estas necese meti la *eklezion batalantan*; ĝi ne estas identa kun la eklezio de antaŭaranĝitoj, ĝi formas nur ĝian parton, ĉar multaj el ĝiaj anoj, kiel tion konfirmas la Skribo, estos kondamnitaj. La eklezio batalanta estas komunumo de ĉiuj baptitoj, kiuj kredas je dek du artikoloj de la kredo kaj akceptas sakramentojn. Ĝi estas *unueca* pro la kredo, legoj kaj sakramentoj, kaj ĝi estas *sankta*, ĉar ĝia kredo kaj ĝiaj sakramentoj estas sanktaj. La malbonaj en la eklezio ne malhelpas ĝian sanktecon, male la eklezio ĝuste per tio, ke ĝi enhavas la bonajn kaj ankaŭ la malbonajn, la antaŭaranĝitajn kaj la antaŭsciatajn, estas *univer-*

s a l a . La eklezio batalanta estas apostola. Por nia orientiĝo – kiam Páleč parolas pri la eklezio batalanta aŭ pri la eklezio de kredantoj, li opinias tiun, kiun Hus nomas la eklezio supozata, la eklezio nur laŭnoma. Kompreneble Páleč la eklezion batalantan opinias vera.

Laŭ Páleč la radiko de la herezoj de Hus estas ĝuste tio, ke por la vera eklezio li opinias nur la eklezion de antaŭaranĝitaj; la kaŭzo de tio estas, opinias Páleč, ke por Hus la eklezio de kredantoj, do la eklezio supozata de Hus, en kiu estas la bonaj kaj la malbonaj, ne estas sankta. Tio estas la falsa supozo de Hus, ĉar, kiel Páleč objetas, ankaŭ en la eklezio de antaŭaranĝitaj estas la malbonaj.

La alia herezo de Hus estas laŭ Páleč, ke li eliminis el la eklezio la antaŭsciatajn, sed kiuj povas esti en la stato de konsekra graco; ili do ne estas en la eklezio de antaŭaranĝitaj, sed ili estas en la eklezio batalanta. Páleč havas la pozicion de antaŭsciataj en la eklezio pli konsekvence solvitan. Li argumentas per sankta Aŭgusteno, laŭ kiu estas duspeca graco, la antaŭaranĝo, kiun neniu povas meriti, kaj la graco de la konsekro, kiu faras homon la infano de Dio kaj kapabligas lin akiri la feliĉon eternan, tion al antaŭaranĝita same kiel al antaŭsciata. La antaŭsciata akiros en la eklezio batalanta eternan feliĉegon, se li en la graco konsekra restos ĝis la fino. Sed tiu ĉi aserto de Páleč estas en rekta kontraŭdiro kun lia antaŭa koncepto, ke ekster la eklezio de antaŭaranĝitaj neniu estos savita.

Páleč metas pli grandan emfazon sur la homan aktivecon kaj skribas, ke eĉ la predestino mem, la graco de antaŭaranĝo, ne faras la homon vivanta membro de la korpo de Kristo, ankaŭ la antaŭaranĝito devas strebi por la graco konsekra. Laŭ Páleč la graco konsekra, kiun en la eklezio batalanta peras pastroj, havas pli potencon validon, ol la graco de la Dia predestino. Hus - laŭ Páleč, malbone distingis la rilaton al la eklezio. La homoj estas en la eklezio batalanta aŭ nur laŭnombro, aŭ laŭnombro kaj laŭmerite; laŭnombro tiuj, kiuj havas la kredon, laŭnombro kaj laŭmerite tiuj, kiuj havas la kredon kaj ankaŭ amon aŭ la gracon konsekran; la amo aŭ la graco konsekra faras homon la viva membro de la korpo de Kristo, nur kun la kredo li estas sole seka membro de Kristo. La seka membro povas en la eklezio batalanta fariĝi ankaŭ la antaŭaranĝito, la viva ankaŭ la antaŭsciato. Páleč kun la graco konsekra laboras simile kiel Hus kun la graco de la ĉeestanta justeco, Páleč solvas la postenon de antaŭsciataj sendube pli dinamisme, sed tio, ke en la strukturojn de la eklezio li envicigas la eklezion de antaŭaranĝitaj, ekster kiu ne estas savo, malhelpas al li esti en la koncepto konsekvenca.

Por la tria aspekto de la eklezio universala kreas Páleč la strukturan pinton de la institucia piramido. En la mistika korpo de la eklezio batalanta estas entenitaj tri ordoj de s p i r i t a p o - t e n c o : la papa, la episkopa kaj la paroĥestra. Tiu ĉi ideo estas, laŭ Sedlák, pure kaj originale de Páleč. La universala kaj la plej alta potenco, fondita sur la Dia graco senmerite donita, estas en la e k l e z i o r o m a , la mistika kunmetaĵo konsistanta el papo kiel la kapo kaj el kardinaloj kiel la korpo de tiu ĉi eklezio. La papo kiel la sekvento de Petro devas ĝenerale decidi pri aferoj ekleziaj, skoldi ribelantojn, puni kaj reformi herezojn; parte tion plenumas ankaŭ la kardinaloj. En papo estas fonto kaj enhavo de ĉiu eklezia potenco, li estas la kapo de la eklezio. Estas al li subigita la spirita potenco de episkopoj kaj al tiuj la potenco de paroĥestroj. Tiel estas en la eklezio ordo en la ekleziaj oficoj.

La roma eklezio konservas kaj vastigas lumon de la kredo; l a f o n t o d e l a l u m o devas esti en la mondo videbla, la nevidebla eklezio de Kristo laŭ Hus kun la libera ekspliko de Dia vero estas al Páleč neakceptebla. El la fonto, do el la roma eklezio, la lumo de kredo disvastiĝas p e r p o t e n c o kaj p e r a ŭ t o r i t a t o ; tiel ĝi necesas, ĉar alimaniere estiĝus sennombraj herezoj. Sur la tero estas necesa ankaŭ videbla s e k u r e j o , kien la kredantoj turnus sin kun duboj kaj trovus instruon. La eklezio de antaŭaranĝitoj ne povas esti sekurejo en la aferoj de kredo, ĉar sen aparta revelacio oni ne scias, kiu estas antaŭaranĝita; eĉ la eklezio batalanta ne povas esti tiu sekurejo, ĉar ĝi ne povas esti tuta kunvenigita; sen la aŭtoritato de roma eklezio nepre estiĝas necerteco kaj haoso. Páleč eĉ skribos, ke se tiun ĉi videblan sekurejon Kristo ne postlasus, eblus diri, ke li sian eklezion nesufiĉe prizorgis. La evangelian versiklon „Ci estas Petro, kaj sur tiu roko“ Páleč eksplikas favore al Petro-roko.

La formo de la roma eklezio estas la enhavo de spirita potenco kaj ĉar ĝi estas la graco senmerite donita, ĝi restas ankaŭ en la papo antaŭsciata kaj malbona. Hus per la graco senmerite donita

argumentas kontraŭ la simonio kaj vendo de sakramentoj. Páleč utiligas ĝin en absolute alia senco: kiel komision valide decidi en la aferoj de kredo kaj de eklezio, *senmeritedonita ankau al homoj malbonaj*. Páleč diras, ke pro kolero, pekemo de akolitaj la sakramentoj ne perdas sian valoron, ne decidu la predestino, sed la kanonika dispozicio. Kiu havas ordinacion, oficon, eĉ se li vivus malbone, li ne perdas la rajtojn de sia ofico. Eĉ Hus tiun ĉi opinion ne kontestas, sed sen ĝia limigo fare de la dia juĝo kaj sen ebleco ne obei malbonan ordonon akiras en la teorio de eklezio fare de Páleč la institucio grave la superregon super la ideo.

La eklezio roma estas *dosankta*, eĉ se papo kaj kardinaloj estus makulitaj per pekoj; ĝi estas sankta, ĉar en ĝi daŭras la spirita formo ĝia plej alta kaj la spirita fontpotenco. Ĝi estas sankta pro la spirita potenco, donita al ĝi senmerite de Dio. Kontraŭ tio Hus asertas, ke la potenco de papoj devenas de la imperiestro Konstanteno, per la vera potenco regas Dio kaj ekleziuloj estas nur perantoj de lia graco, kaj ĝuste sur la historio de papeco li pravas la nuran supozeblon de la eklezio, tion, ke ĝi estas la eklezio nur laŭnome, kiam en ĝi rajtis regi ankaŭ papoj malĝustaj kaj malbonaj. Eblas diri, ke Hus trovas en la realaĵo de la ekleziaj historio kaj praktiko pruvojn pri tio, ke devas ekzisti eklezio ideala, tiu nevidebla eklezio de Kristo, dum Páleč per la ideala bildo de funkciado de la surtera eklezio ties faktajn malordojn verdire kovras. Ankaŭ tio ĉi estas la motivo, kial Hus povas kiam ajn ekvoki „Pruvon, doktoro, pruvon!“, dum Páleč konsideras la fundamenton de funkciado de la eklezio kredon, la kredon ankaŭ je papo kaj je la decidoj de papo. En la aferoj de eklezio, li skribos, por kiuj la apostola seĝo ĉefe estas instalita, ne eblas koncedi, ke ĝi deflankiĝu de Kristo. Kristo, kiu tra la apostola seĝo la eklezion administras, ne allasos, ke ĝi metu kredantojn en herezon. Kion prezentas la eklezio roma por kredado, estas vera kaj identa kun la Skribo. La roma eklezio neniam forkliniĝis de la apostola tradicio, ĉar ĝi estas estrata de Spirito sankta. Páleč la eklezian praktikon ne esploras, Páleč ĝin sanktigas.

Páleč renversos eĉ la devigan ekzemplon de la Skribo fare de Hus por pruvi la legitiman aŭtoritatan situon de papa kurio. „Kiu tion proklamus eĉ nur ebla“ – nome tion, ke la eklezio roma povus forkliniĝi de Kristo - „tiu dubigus la tutan aŭtoritaton de la roma eklezio kaj farus dubaj ankaŭ la evangeliojn kaj la unuajn ekleziajn konciliojn, kiuj de tio havas sian gravecon, ke ili estas de la roma kurio aprobitaj.“ Tio estas la pinto de argumentado de Páleč por la dogmara kaj ordona jurpovo de la roma eklezio: *ĝi aprobis la evangeliojn mem*. Ĉi tie la institucio antaŭniaj okuloj faris ĝuste spiritan transkapiĝon de sia ideo fundamento al propra senerareco: la ideo fariĝis valida per institucia komisiono. La sankteco kaj la potenceco de institucio ĉe Páleč reciproke subtenas sin, al la libero de konsidero pri la eklezio estas forigita la grundo desub la piedoj kaj Páleč gardis por si, pri kio iris al li dekomence: la certecon de obeemo. En la verko *Pri eklezio* Páleč skribos, ke se Hus *obesus*, „li ne forkliniĝus de la vero“.

Kiam do la doktoroj de teologio povis esti al la reĝo priskribitaj kiel malkomplezaj al interkonsento kaj al koncedoj kaj minacis al ili malamemo de Venceslao, kaj ankaŭ ke eble eĉ la prelatoj iom retiriĝis antaŭ la premo de la kortego, sekve do sub tiu ĉi silenta protekto de la reĝo Hus revenis en Pragon. La 19-an de februaro tion ĝojplene notis la skribisto de betlehemaj predikoj: „Hus venis en la nomo de Sinjoro.“ Li ne revenas ostente, prefere kvazaŭ sekrete, simple en Prago li estas kaj ne sciigas tion laŭte, precipe li ne predikas. Sendube tio ĉiam ankoraŭ estas cedo al la reĝo kun respektado de tio, ke la traktadoj antaŭ la komisiono daŭras; la praga klerikaro, kvankam ĝi scias pri la ĉeesto de Hus, ne kuraĝas renovigi la interdikon.

En la Betlehema kapelo oni predikas dufoje tage, Havlík alternas kun Milíč. „Havlík via anstataŭanto, nun estas nia pac-predikanto,“ konserviĝis popola kanteto. Ne pasis do eĉ unu jaro kaj Hus spite al la kuriaj ordonoj estas en Prago kaj la Betlehema kapelo ne estas silentigita. En la betlehemaj predikoj okazis rimarkebla ŝovo en la elekto de tiutempaj aludoj, ankoraŭ en januaro kaj februaro ili koncernis ĉefe la indulgencojn, nun en marto kaj aprilo, kiam la konflikto kun la teologoj akre pintiĝas, atingas superecon la klarigado de la koncepto de eklezio kaj ĉefe la rango de papo en ĝi. La temoj estas rekte direktitaj kontraŭ la opinioj de la teologoj: kontraŭ la konceptado de la eklezio kiel papo kaj kardinaloj; kontraŭ tio, ke oni devas kredi *je* la eklezio kaj *je* la papo, kiam eblas kredi *nur* je Dio; kontraŭ rangaltigo de pastroj ĉe ilia servorajto ĉe la absolvado de pekoj; kontraŭ la diboĉemo de prelatoj, la malfervoro ĉe predikoj, la havigo de prebendoj. La

predikoj eĉ laŭnome montras al Páleč kaj al Stanislav. La 1-an de aprilo diris Havlík en la betlehema predikejo: „...kiel faras la modernaj doktoroj kaj precipe Páleč kun Stanĉjo, kiuj per siaj insidaĵoj klopodas subfosi la eklezion Dian.“ La aŭtoro de la prediko povis esti Havlík, sed povis verki ĝin eĉ Hus.

La laika publiko estas entirata kaj sciigata en la teoriajn disputojn kaj Hus, kiu nun povas zorgi pri la Betlehema kapelo rekte, igas sur la vandojn de la kapelo surskribi latinajn tekstojn pri ses herezoj, de sex erroribus. Sub la ses sloganoj, „krei“, „kredi“, „absolvi pekojn“, „obei“, „esti anatemita“ kaj „simonii“, Hus elektis citaĵojn el la Skribo, el S-ta Aŭgusteno, S-ta Gregoro kaj S-ta Bernardo, per kiuj li demonstris la ses ĉefajn herezojn: ke pastroj kreas dum meso la dian korpon kaj fariĝas diaj patroj; ke oni devas kredi je Maria Virgulino, je la eklezio, je la papo, kvankam estas eble kredi nur je Dio; ke pastroj rajtas kiun ajn absolvi, kvankam absolvas sole Dio; ke subuloj estas devigataj obei eĉ nepermesitajn ordonojn; ke eĉ maljusta anatemo devoligas la anatemiton; kaj ke estas permesita la simonio.

La surskriboj en la Betlehema kapelo similas al klerigaj kaj varbaj tabuloj de la germanaj magistroj Petro kaj Nikolao de Dresdeno; konserviĝis priskribo de iliaj demonstraj bildoj, sur kiujn ili vicigis unu apud alia citaĵojn el la Skribo kaj al ili kontraŭajn opiniojn aŭ agojn de la samtempa eklezio, aŭ ili igis desegni sur ilin la rekte kontraŭajn scenojn el la vivoj de Kristo kaj de la papo. En la ekzaltitaj tempoj de la dekdua kaj dektria jaroj la Dresdenanoj portigis siajn tabulojn eĉ en pragajn stratojn kaj el la torsoj de konservitaj tekstoj kaj referencoj ŝajnas, ke tiaspeca publika agitado estis favorata edukrimedo de reformistoj. Nikolao de Dresdeno eble laboris en proksimeco al Hus kaj laŭ iuj signoj li povis esti utila al Hus ankaŭ per sia granda kono de la eklezileĝa juro. Post la morto de Hus li forte influis la movadon per sia kiliasma koncepto kaj ĉe sia misia pilgrimado li estis iam antaŭ la jaro 1419 brulmortigita en Meissen.

La kontraŭulojn de Hus la tekstoj sur la betlehemaj vandoj rekte indignigas. Kelkajn polemikaĵojn verkis nesubskribitaj anonimuloj, Štěpán de Dolany en speciala kontraŭhusa traktato riproĉis al la elekto de la citaĵoj nekompletecon. Ripetas tion post li Štěpán Páleč, pri kiu historiisto skribis, ke li estis de la surskriboj en Betlehemo furiozigit. Páleč ankaŭ en Konstanco strebas, ke la betlehemaj surskriboj estu neniigitaj, skribas pri tio Hus kaj elvokas tio liajn malbonajn sonĝojn. La senruze lakona praga popolo, post kiu en la historio ne konserviĝos pli, ol agoj kaj kantetoj, kaj al kiu tiu ĉi eduka mesaĝo estis destinita, pri la malamikoj de evangeliismo kantis:

„Dio, donu al ili la scion,  
ke ili prenu instruon  
ke via morttorturo  
ne estas en ŝtono truo,  
ĉar ili la Skribon ne konas.

Se ili la Skribon volus,  
ili en Betlehemon devus,  
sur la vandoj ili lernus,  
kion tie ordonis  
magistro Johano Hus.“

Iam en marto pritraktas publika universitata kunveno la leteron de reĝo, en kiu Venceslao postulas referencon, kiel estus plej bone atingi trankvilon en la disdubiĝinta popolo kaj pastraro; kaj samtempe kun tio estis sciigite, ke la reĝo pretendas la sanktgeorgan interezon de klerikaro, por ke por ĝi povu esti sendita misio en Romon. La komisiono do vivigas la pacigajn provojn kaj la reĝo samtempe atakas kontraŭ la prelatoj, kaj li atakas eĉ dufoje, per ĝiro de la sanktageorga interezo en la reĝajn kasojn kaj per la preteksto de misio en Romon, do la misio, kiun la prelatoj certe ne povas deziri. La politikon de la reĝo modelis ia tre inĝenia viro, la pacigaj provoj estas samtempaj kun la plej sentebla formo de regreso, la perdo de enspezo, pli vere premo al doktoroj, ol la vojo al paciĝo, la deklaro pri konkordo evidente devas esti eltrudita, ne akirita, kiel oni sukcesis antaŭ jaroj ĉe



Zbyněk. Por teologoj estas karakterize, ke en la universitata kunveno ili ne kuraĝis al la reĝa pretendo pri enspezo oponi.

La 19-an de marto, estante certa, sed pli ol estis adekvate al la vera stato de aferoj, Hus denove komencis prediki en la Betlehema kapelo. En *Postilla* sian decidon li klarigis jene: „Poste, kiam en tiu jaro (t. e. en la jaro de la traktadoj) estis nenio por liberigo de la Dia vorto, mi denove predikis...“ Kiam do la komisionaj traktadoj stagnis sur la inerteza punkto de la doktoraj obstrukcoj aŭ – kiel la sencon de la interkonsento komprenis Hus - , kiam la traktado ne ebligis al li libere prediki, li rajtigis sin mem. Li elektis sendanĝeran temon, pri la virino Kananea kaj pri supraĵaj manieroj de pentofaro, kaj tamen la prelatoj, kvazaŭ ili atendus nur tiun ĉi okazon, jam la sekvantan tagon ree proklamis super Prago interdikon. Ne estas tute klare, kio okazis pli frue, ĉu la prelatoj proklamis la interdikon, incititaj de la reĝa sekvestro de la sanktgeorga interezo, aŭ ĉu male la reĝo sekvestris la pastran enspezon, incitita de la interdiko pro la prediko de Hus, certe estas, ke fine de marto kaj en aprilo denove timige kontraŭ si leviĝos du voloj, tiu de la prelatoj kaj tiu de la reĝo. Kaj eĉ per tio, ke la reĝa komisiono plu devigas la doktorojn partopreni la traktadojn, Hus kvazaŭ fariĝus nura preteksto de la konflikto pli signifoplena, la konflikto nun jam rekte inter la sekulara kaj la eklezia potenco.

La reĝo ne hezitas elpostuli la interezon perforte, kaj nome tiom pli, ke en Prago leviĝis granda maltrankvilo pro la interdiko kaj en la maltrankvila situacio perforto ne estas malproksima; „li ŝtele forprenis ĝin laŭ sia volo aŭ bezono“, skribis Ondřej de Brod pri la eksproprieto de la interezo fare de la reĝo. Sed pri la doktoroj postlasis sufiĉe ironian informon Hus, ilian reagon pri la forpreno de la enspezo li eĉ priskribis en la lasta alineo de la traktato *Pri la eklezio*, tiel li opiniis la vortatakon grava. „Diris ja doktoroj, ke post kiam estos kondamnitaj la artikoloj de Wicleff, ekestos paco kaj konkordo. Sed ilia profetado ŝanĝiĝis en malon. Ĉar ili ĝojis kondamnante, kaj bedaŭras pagante imposton. Ili kondamnis la artikolon, ke ‚la dekonaĵoj estas nuraj almozoj‘, kaj poste ili venadis en urbodomon kaj postulis, ke iliaj impostoj, kiuj estas almozoj, ne estu nuligitaj. Sed iuj sinjoroj el la urbodomo diris al ili: ‚Antaŭe vi kondamnis la artikolon, ke la dekonaĵoj estas nuraj almozoj, kaj nun vi diras, ke ili estas almozoj; vi do batalas kontraŭ la propra kondamno‘.“ Páleč estis pro tiu ĉi rikano tiom ekscitita, ke li ne forgesos citi ĝin dum la publika esplordemandado de Hus en Konstanco.

Laŭdire la interdiko estis plenumata ankoraŭ pli emfaze ol pasintjare, la diservoj estis haltigitaj en la tuta Prago, escepte de Vyšehrad, pastroj malaprobis asisti per sakramentoj kaj rifuzadis fari eĉ sepultojn. Mortintoj tiam estis entombigataj tuj en la mortotago, rifuzi sepultron elvokis la plej grandan malkontenton, kaj tial laŭdire eĉ la reĝaj korteganoj mem, eksciinte pri tia okazo, venis „kun multnombra sekvantaro“ la mortinton enterigi. Kaj denove Prago estis plena de eksceso, krioj, kvereloj kaj mokaj kantoj kaj la objekto de moko kaj demonstradoj estis ankaŭ la teologoj. En *Alma et venerabilis* Stanislav Znojemský skribas pri „senhontaj bruaj kanzonoj abomenaj, pri malĝentileco kaj kruduleco“; katedroj de magistroj estis makulitaj per homaj fekaĵoj kaj oni priŝmiris per tio ankaŭ iliajn pordegojn kaj pordojn. Aliloke li skribas „pri evidentaj maljustaĵoj, perfortaĵoj kaj bastonadoj, senigadoj de prebendoj kaj de ekleziaj posedaĵoj...“ Ankaŭ Páleč skribis *Contra Quidamistas* pri „forprenado de bienoj“. Maltrankvilo vastiĝis tra la tuta lando. En Žatec estis eble konekse kun la pragaj eventoj ŝtiparumita monaĥo; du klerikoj, pastro kaj studento, estis dronigitaj en la rivero Ohře. Sed brutale kondutas ambaŭ partioj.

„Ĉe kiu oni trovas,“ skribis Hus en *Postilla*, „ke li la veron de Kristo rekte konfesas, tiun oni malbenas, malhonorigas, ekzilas, kvereligas, torturas kaj arestas kaj eĉ mortigas. Kiel nun en Moravio oficisto kaj aliaj fidelan homon per malsato pereigis kaj pastroj al Marteno, predikisto, la kruojn ensterkigis, kaj kio okazis pasintjare en Prago, eĉ nun okazadas al tiuj, kiuj la veron de Kristo proklamas...“ Fonon de opini-konflikto havis ankaŭ la murdo de la sinjoro Půta junioro, ĝi okazis en la tago de la februara sinodo en la domo de Bechyně en Malnova Urbo, kaj la publika opinio atribuis ĝin al unu el la fruntlokaj kontraŭuloj de la husismo, sinjoro Jan Městecký de Opočno. La murdistoj post la ago forirante kantis la Sanktvenceslaan ĥoralon, kiu fariĝis himno de la kontraŭuloj de reformoj. Sed kontraŭe belan ateston pri la influo de la reformismo prezentas la militista ordeno publikigita per reĝa ordono. En la dektria jaro en Bohemio okazis kelkaj lokaj

miltoj kaj la ordono ĉe la sieĝado de la burgo Skály enhavas artikolon, ke la batalantoj devas batali antaŭ ĉio kontraŭ pekoj. Pri Jakoubek de Stříbro konserviĝis informo, ke kelkfoje li donis al soldatoj spiritan konsolon.

„... nek mallaŭdado, nek torturado, nek pereigado povas haltigi predikadon de la vero,“ skribis Hus en *Postilla*, „sed elpensita haltigo de diservo estas granda subpremo. Ne por tiu, kiu ŝatus prediki, sed por la popolo, kiu ŝatus aŭdi. Ĉar kio povas pli multe premi la kristanojn, ol ke oni ne donus al ili sepulton, bapton, konfesion, dian korpon.“ Hus ankaŭ konsilas, kiel ŝiri tiujn ĉi ruzajn retojn de Antikristo: al pastroj li rekomendas, ke la malpermeson de diservoj ili simple ne obeu, kaj al laikoj, ke ili ne zorgu pri tio, kie mortintoj estos enterigitaj, ĉu eĉ ekster la preĝejoj tombejoj, kaj en granda neceso ili baptu siajn infanojn mem. Kompreneble tio estas konsilo tro frue devancanta la tempon, la interdikto elvokas koleron kaj konsternon kaj Hus ree foriras el Prago. „Kaj ke tiu haltigo diabla grandan subpremon de la popolo faris, kiam ili ne volas bapti nek mortintojn enterigi, kaj timante grandan plagon en la popolo, mi denove cedis.“ En *Postilla* Hus skribis, ke li restis en Prago „dum la granda nokto“, kio signifus, ke la interdikto validis eĉ dum Pasko kaj Hus foriris sub impreso de la timego, iuj historiistoj tion klarigas tiel, ke li estis en Prago ĝis Pasko kaj foriris ĝuste por eviti la timegon pro la interdikto dum Pasko. Pasko falis tiujare en la 23-an de aprilo.

En marto kaj en aprilo ambaŭ partioj submetiĝis al granda traktata konflikto. Hus aperigis du publikajn deklarojn kontraŭ la konsilantaro de doktoroj, unu ĉeĥlingve por la publiko, la alian latine; li skribas ilin, kiam la reĝo jam postulas la interezon kaj validas la interdikto, kaj en la ĉeĥa teksto li ironie uzas la maltaŭgan formulon de Páleč pri neordonado de nura malbona kaj pri nebremasado de nura bona. La doktoroj ne volas obei la reĝon kaj doni al li po unu interezo, kvankam la reĝo per tio ne ordonas al ili nuran malbonan nek bremsas nuran bonan; kaj samtiel ne estas ordo de nura malbona, kiam la reĝo ordonos, ke ili ne haltigu diservojn, ĉar tio ne estas nura malbona, ke pastroj al Dio servu; doktoroj mem ne sekvas tion, kion ili proklamas, aŭ prefere ili pruvas la sensecon de tio, kion ili akceptigas. Doktoroj, skribas Hus, „malhonorigas kvardek kvin artikolojn kontraŭ la ordo preĝeja“, malgraŭ tio, ke „multajn el tiuj artikoloj la magistro Staník kaj la magistro Páleč pli frue respektis kaj defendis, ĝis kiam ili en la timon profanan falis“. Hus nomas la „tri verojn“ de Páleč, pri la difino de la nocio de eklezio laŭ Páleč li ne mencias, nur konstatas, ke la doktora konsilio por la sinodo kaj por la reĝo mallaŭdas ĉeĥojn kaj „iujn“ kulpigas pro erara supozo kaj herezeco; sed tion la doktoroj pruvu kaj se ili ne pruvos tion, ili suferu „kiel mallaŭdantoj kaj perfiduloj de la honoro de la Ĉeĥa reĝlando“. La ferman frazon de la ĉeĥa deklaro Hus skribas ree kun sia sento por drameco: „Tial ilia konsilo kiel hontinda devas rifuzita esti.“

En la latina teksto Hus postulas, ke doktoroj nomumu tiujn, kiuj laŭ ili apartenas en la pastraron pestoportan, kaj ironie li ilian kulpigon inversigas, ĉu per tio ili eble opiniis simoniistojn, konkubinulojn kaj avarulojn, kiuj misuzas la potencon de ŝlosiloj ĉe la pekpardono kaj ĉe indulgencoj kaj negocas pri ili kaj pri relikvoj; aŭ ĉu per tio ili eble opiniis mem Stanislavo-n, kiu skribis pri la komunio aferojn reciproke kontraŭajn kaj neniu pli ol li, se temas pri komunioj, eraris pli grave. Ĉi tie Hus rifuzas la formuladon de la nocio de eklezio kaj al doktoroj li riproĉas, ke siajn konsilojn ili proklamas netuŝebla aŭtoritato kaj argumentas kontraŭ ili per la Skribo, per S-ta Aŭgusteno kaj ankaŭ per praktikaj ekzemploj. Kaj denove iom mallice li skribas, ke en la universitata kunveno doktoroj ne kontraŭstaris la ordonon cedi la sanktgeorgan interezon al la reĝo, kvankam per tio plenumiĝas la artikolo de Wicleff pri forpreno de sekularaj posedaĵoj, kiun ili rifuzas; sed ili rifuzas ĝin kaj tiam ili kondamnas la reĝon, kiu ĝin plenumas. La kialo, ke la procesojn kontraŭ Hus estas necese respekti, ĉar ili estis akceptitaj de la praga pastraro, estas laŭ li tiom valida, kvazaŭ iu dirus, ke ĉar la procesoj de la diablo kontraŭ Kristo estas de la komunumo de pastraro en avareco, amorado kaj fiero akceptitaj, estas necese obei ilin. Publikan respondon kontraŭ la konsiloj de doktoroj skribis ankaŭ Jesenice.

Stanislav de Znojmo kaj Štěpán Páleč respondis per traktatoj, tiu de Páleč havas la nomon *Replicacio contra quidamistas*, *Respondo al iuj*, kaj tie ĉi per quidam-istoj Páleč nomas iom tromokeme la adeptojn de Hus; la esprimon „quidam“, iuj, kiel ni memoras, Páleč uzis en siaj „tri veroj“ por tiuj, kiuj liajn verojn ne agnoskas. La verko de Stanislav havas titolon *Alma et venerabilis*, tio estas la unuaj vortoj de la teksto de *Antikveglora kaj majesta* teologia fakultato de la

praga universitato... Se ni ekkonscias, ke tiun ĉi fakultaton formis ĝuste la ok doktoroj de teologio, kiuj opozicias al reformistoj kaj propre al la plimulto de la universitato, ni havas la bildon de la etoso, en kiu ambaŭ doktoroj siajn verkojn skribas: tie quidam-istoj, nesignifaj iuj, ĉi tie la antikvegloraj kaj majestaj teologoj. „... ni havas kiel adeptojn pastrojn malgrandajn kaj malriĉajn,“ skribis Hus polemikante kun la verko de Páleč kontraŭ la quidam-istoj, „sed la mensogulo“, do Páleč, „kun siaj kunuloj pavas pro la tuta pastraro en la Ĉeĥa reĝlando kaj en la tuta kristanaro...“ Per kromnomoj, tre neflataj, tiutempe oni pafis de ambaŭ flankoj, Hus foje embarasis eĉ novtempan tradukanton. Polemikante li skribis pri doktoro de juro Ŝimon kaj uzis por li lian laŭdire „kutiman kvankam nebelan kromnomon“. En la latina teksto estis la nomo kun la kromnomo „Simonem Merdam“ kaj la embarasita tradukanto de la verkoj de Hus tradukis tion Ŝimon Venda. En la malnovĉeĥa lingvo „merdat“ signifis movi la kapon aŭ ĉe hundo svingi la voston kaj Ŝimon Merda estis Ŝimon Kapsignanto, tiom multenhava lingvo estas la ĉeĥa.

La personaj interpafiĝoj en tekstoj informas nin pri la tempo kaj ankaŭ pri la karaktero de homoj. Tiel Páleč ekzemple skribas, ke ne estas eble kulpigi konkretajn herezulojn, ĉar la akuzanto per tio endanĝerigus la sekurecon de la vivo kaj la havaĵon. Sed tiel li proponis sin al rekta kontraŭbato, ĉar Hus je tio kontraŭas, ke tiamaniere Páleč propre kulpigas siajn sampartianojn kaj ankaŭ sin „pro timo antaŭ la mondo kaj homoj“ kaj citas Mateon: „Kaj ne timu tiujn, kiuj mortigas la korpon“; kaj li glavohakas, ke se Páleč skribas pri si, ke li estas konfesanto de la sankta teologio, „kial li ne kuraĝas konfesi la veron, kiam li ja akceptis bireton per la ĵuro por tio, ke li la veron konstante ĝis la morto defendu“. En la urbodomo sub defendo de sbiroj Páleč kuraĝis deklari, ke kiu ne obeos la papan dekretan, tiu mortu, sed nun, kiam la ŝanco transformiĝis en malon, li diras, ke en Bohemio ne estas loko por herezulon montri rekte; „kvankam pli frue li montris al mi, metante kontraŭ mi artikolojn“. Hus la plendon de Páleč komplete renversas kaj rimarkigas, ke ne en Bohemio, kie eĉ Páleč ekstaris kontraŭ Meistermann, sed en Romo minacas „la danĝero de havaĵo kaj de korpoj“, kiam ja la patro de tiu kortego mem prirabis la mensoganton kun lia kunulo Stanislav kaj enprizonigis ilin kaj tie ilin longe tenis.

En la unua parto de la verko *Alma et venerabilis* Stanislav defendas sian koncepton de la eklezio kaj sufiĉe neklare polemikas kun la koncepto de Hus; sian teorion li kondukas ĝis la praktika postulo, ke oni ne rajtas dubi, ke ĉiu deklaro, kiun la roma eklezio, tio estas papo kaj kardinaloj, ordonas al la fideluloj de Kristo havi aŭ kredi, estas en la vero aŭ en akordo kun la Skribo sankta de la Malnova kaj ankaŭ Nova Testamentoj. En alia parto li kritikis la pastraron, kiu nomas sin evangelia kaj kiu la roman eklezion „ne obeas, dissemis herezojn pri internaj reguloj de la eklezio, la staton eklezian metis al moko, malamo, rabo, potenco kaj popolo laika“. Stanislav jen vidiĝas eĉ entuziasma defendanto de la papo kaj prelatoj.

Lia verko estas pli esenca, ol tiu batale polemika de Páleč, sed li ankaŭ uzis kelkajn personajn vortatakojn; pri Jesenice li skribis, ke li estis engaĝita kontraŭ la kardinaloj per favoro aŭ mono kaj ke pri la buleoj de Petro li mensogas. En la parto verkita kontraŭ Hus li plej multe okupiĝas per la atako de Hus pri lia remanenceco. Li skribas, ke se Hus havus la ĝustan kredon katolikan pri la sakramento, se li amus ĝin kaj ĝian herezon abomenan li malamus, li ŝatus la turniĝon de Stanislav kaj ne skribus tiel malsaĝe kaj hereze; pri la vortoj, ke neniu super li en la koncepto pri la sakramento herezis pli malbone, li koleras, sed pri remanenco Hus li ne kulpigas, nur aludas, ke li neniam elpaŝis kontraŭ la remanenca teorio rekte; tiu ĉi argumento de Stanislav estas transprenata ankaŭ de la novtempa katolika literaturo. La teksto de Stanislav estas preskaŭ neelteneble multvorta, ĝi estas nebuligita per vorta emfazemo kaj kolorriĉeco; Hus nomas tion „blogoj“, sed kiam li estos al ambaŭ traktaĵoj respondanta, li indignite nomos Páleč nur Mensogulo, dum al Stanislav li respondos per vasta pruvmaterialo, senkompromise en la koncepto, sed respekte en la tono.

La memfidon de doktoroj kaj prelatoj firmigis fine de printempo Romo. Antaŭ jaro kunvenis tie koncilio nomata „ekumena“, ĉar ĝi estis venkonta la tripepecon post la elekto de Johano; ĝi estis kunveno nesignifa, neprestiga kaj ĝia sola konkreta rezultato estis kondamno de verkoj de Wicleff tiel, kiel tion postulis la pragaj doktoroj de teologio pasintjare somere. La papo fondis por la prijuĝo de Wicleff komisionon kaj tiu komence de januaro al la kunveno eksplikis, kiajn domaĝojn faris la

verkoj de Wicleff en Anglio, Bohemio kaj ankaŭ en Portugalio kaj rekomendis malpermesi ilin; la 10-an de februaro estis pri tio legita la buleo de Johano en la unua kaj lasta koncilia kunveno; eĉ tiu estis laŭdire pro neadekvate malgranda nombro da ĉeestantoj senĉese prokrastata. La saman tagon estis la verkoj de Wicleff antaŭ la templo de sankta Petro forbruligitaj.

En Pragon venis la papa buleo nur fine de majo, ĝi estas tiu, al kiu Jesenice faros senrespektajn rimarkojn, kiujn oni volos en Konstanco imputi al Hus; plirapidan informanton havis en Romo Ondřej de Brod, iaspecan papan kontroliston, kiu skribis, ke la informo „estos por li granda konsolo“. En la medio de Hus la buleo ĝenerale renkontiĝos kun senrespekto, la skribisto de universitata kroniko notante la informon pri forbruligo de la libroj de Wicleff en Romo, skribos: „Estas nenio mirinda, ĉar li bone priskribis Antikriston kun lia sinagogo kaj maskitaj fratoj, kiuj lin defendis.“ En Prago oni laŭdire pli multe parolis pri plua malbona signo, kiu la papon persekutis: Johano XXIII-a sur la pordegon de la Laterana preĝejo pentrigis sian blazonon, sed fulmo ĝin detruis. Sed tamen: se ĝis nun Romo estis malproksime kaj la reĝo proksime kaj la teologoj hezitis pri rekta rezisto kontraŭ la reĝo, nun, almenaŭ laŭ ilia pritakso, per la kondamno de Wicleff la situacio ŝanĝiĝis; krom tio daŭras la dure aplikata interdikto – kaj la doktoroj pri teologio en sia nova versio, kiun ili prezentis al la reĝa komisiono, aŭdacis uzi ekstrepikajn formulojn.

Ni citos ĉiujn iliajn proponojn, kiel purigi la universitaton, por ke la leganto, se li havos tian paciencon, ankaŭ aŭdu, kiel la doktoroj siajn postulojn rulasigas kaj akumulas en la multparola ĝojo pro sia opiniata supereco: ĉiuj doktoroj kaj magistroj kolektiĝu ĉe la ĉefepiskopo kaj ĵuro, ke ili ne volas obei la 45 artikolojn de Wicleff; ili ĵuratestu, ke pri sakramentoj, ŝlosiloj ktp. ili opinias samkiel la roma eklezio, kies kapo estas papo kaj la korpo estas kardinalaro kiel la evidentaj kaj aŭtentikaj posteuloj de S-ta Petro kaj de apostoloj; ĉiu konfesu, ke en la aferoj de la kredo li obeos la decidojn kaj ordonojn de roma eklezio kaj de kurio apostola; kaj ke estas necese obei la prelatojn en ĉio, kie oni ne ordonas nuran malbonan; kaj ili ĵuratestu, ke la opinio de Wicleff kontraŭa al la roma eklezio estas falsa; kaj al ĉiuj membroj de la universitato estu sub la ĵuro kaj sub la puno de anatemo kaj de ekzilo malpermesite defendi la artikolojn de Wicleff kaj kredi alimaniere, ol la eklezio roma; kaj tio ĉio estu por la purigo de loĝantaro proklamita de la sinodo kaj de surpredikejoj; kaj de la reĝo kaj de skabenoj estu malpermesitaj indignigaj kaj ofendaj kantoj; kaj al Hus estu malpermesita la sekreta restado en Prago kaj la predikado, kiam li ne havos absolvon de la kurio. Kaj sole se Hus plenumos la unuajn kvar artikolojn, la doktoroj estas komplezaj publike konfesi, ke ili estas konkordaj en la kredo; alikaze ili mensogus al la tuta mondo kaj ankaŭ al la reĝo. Kaj al la komisiono ili komunikis, ke pri ĉio ĉi, „kiel ordonas tion al ili la honoro“, ili skribos al la papo. Kaj kiu kun tio, kion ili proponas, ne volas konsenti, „fariĝas tre suspektinda en la kredo“.

Dume Hus en Kozí Hrádek en la suda Bohemio finverkas la traktaton *Pri la eklezio*, kies konsistaĵoj estas ankaŭ la polemikaj verkoj kontraŭ *Contra Quidamistas* de Páleč, kontraŭ *Alma et venerabilis* de Stanislav kaj *Kontraŭ la konsilio doktora*. Kiel la laboro progresas, Hus poparte sendas en Pragon pretajn ĉapitrojn, kiujn oni en la Betlehema kapelo laŭtleagas kaj tuj samtempe kopias; laŭ Páleč tiun ĉi multobligadon de la traktato *Pri la eklezio* partoprenis minimume 80 homoj, tiom ampleksa instituo estis la Betlehema kapelo. La kopiantoj finis la laboron la 8-an de junio, sed oni kopiis ankaŭ la ceterajn polemikajn tekstojn; Hus skribas al magistro Jan de Rejnštejn, ke li sendos al li la traktaton kontraŭ Stanislav, kiam ĝi estos kopiita.

La komisiono ankaŭ distance invitas Hus al traktadoj, konserviĝis letero, per kiu ĝi respondas ĝuste al Jan de Rejnštejn. Hus tre akre rifuzas la novajn konsilojn de la teologia fakultato. „Eĉ se mi starus antaŭ fajro por mi preparita, kun la helpo de Kristo Sinjoro mi ne akceptos ilin kaj mi esperas, ke la morto pli frue sendos aŭ min aŭ du apostatojn de la vero en la ĉielon aŭ en la inferon, ol mi esprimus konsenton kun ilia opinio.“ La kalumniojn de Páleč kaj de Stanislav, ke ili, husanoj, estas herezaj viklefanoj, ke ili estas nefidelaj, perfidemaj, frenezaj, klerikaro malbeninda, li ne atentus, se tio ne fortigus la koleron de Antikristo. „Sed mi esperas, kun la helpo de Dio, se estos necese, mi kontraŭstaros ilin ĝis la brulmorto per fajro. Kaj se mi ne povas liberigi la veron en ĉio, almenaŭ mi ne volas esti ties malamiko kaj mi sopiras per morto rezisti la aprobon. La mondo kuru, kiel Dio permesis al ĝi kuri. Pli bone estas bone morti, ol malbone vivi. Pro timo de la mortopuno

oni ne rajtas peki.“ Per citado de bibliaj psalmoj, de Predikanto kaj de evangeliistoj Hus firmigas sin en la konvinko, ke venkos tiu, kiu ne timas la morton, kaj ke beata estas tiu, kiu toleras la tenton. „Tio estas miaj fundamentoj kaj subtenoj, per kiuj refreŝiĝas mia spirito, por ke ĝi estu forta kontraŭ ĉiuj kontraŭuloj de la vero.“

Jan Rejnštejn skribis al Hus, ke eĉ doktoroj ne volas agi kontraŭ sia konscienco, kaj Hus rememoras al li, kiel alie pli frue parolis Páleč en lia domo kaj ke Stanislav skribis pri la remanenco de pano; „kaj antaŭ ol la malkonkordo komenciĝis, li demandis min, ĉu mi volas la samon kun li koncepti“; kaj komence pri Štěkna, alveninta kun lia traktato, li diris, ke li surgenue pardonpetos lin, kaj fine pro timo antaŭ la ĉefepiskopo li diris pri la traktato, ke ĝi ne estas finita. „Kiel do mi povas fidi al ili, ke ili nevolonte agas kontraŭ la konscienco?“ Kaj en tio ilia konscienco ne malhelpas, nomi nin nefidelaj, perfidemaj, frenezaj kaj klerikaro malbeninda? „Dio tion decidu.“

La tono de la letero estas ekscitita, sed la daŭra ripetado de tio, ke li prefere mortos, ol li rezignus je vero, ne estas esprimo de inklino al martireco. Hus akceptas kaj utiligas praktike ankaŭ kun dankemo ĉiun eblecon, kiun la amikoj akiros por li kaj ĉe la reĝo kaj ĉe prelatoj por lia aktivado, sed samtempe, ĉar li estas la kapo de la movado, li sentas sin jam apartigita de tiu ĉi tro utilcela traktado. Iuj historiistoj skribas, ke Hus per la akrigita opinio fariĝis izolita, iu eĉ kulpigas lin, ke ĝuste per la letero al Jan Rejnštejn li detruis la traktadon de la komisiono; se oni rezonas taktike celkonscie, oni povus tiel diri. Sed Hus rezonas alimaniere. Se la defendo kaj sukcesigo de la Dia vero ne postulus malpli, ol pro ĝi morti, tiam restas nenio, ol por tio kolekti fortojn. Ĝi estas prefere esprimo de lucideco, tio, ke Hus vidas tiom akrigite sian situacion, kaj la decido „per la morto oponi al konsento“ estas batalema, ne rezignaciema. Malama kontraŭpremo, de kiu ne eblas fuĝi, ĉar ĝi ne ĉesus efiki, eĉ se Hus humiliĝus; elreviĝo pro ambaŭ iamaj amikoj, kiuj fariĝis liaj plej grandaj malamikoj; kaj ankaŭ la karaktero, sentoplena kaj temperamenta; sed precipe la nerimarkebla io, kion krome havas homoj eksterordinaraj – tio ĉio Hus pli kaj pli enpremas en profetan mision. Kaj estis lia homa grandeco, ke li ne timis tiun postulon, ke li akceptis ĝin eĉ kun la risko de teruraj sekvoj, pri kiuj li dum la tuta tempo antaŭe scias. Samkiel pri ili scias Páleč, kiu herezulon eĉ konkrete ne nomus, kvankam nepre ne minacus al li tia persekutado, kian Hus, kiel alta arbo fulmon dum tempesto, altiras kaj alvenigas.

La komisiono faros al la kvar teologoj novan premon, la informoj pri tio estas nekompletaj, ŝajnas, ke iam en duono de junio la komisaroj la doktorojn denove venigis kaj eldevigis de ili deklaron pri konkordo, la doktoroj postulas, ke la formulado pri konkordo estu prezentita al la tuta fakultato, tion la komisiono rifuzos kaj memorigos, ke per malkonsento ili subiĝos al punpago, al kiu ili devoligis sin en februaro; la komisaroj minacas, ke dum semajno ili vidos la rezultojn de sia hezitado, estas konata la instrukcio de la reĝo aŭskulti ankaŭ la opinion de magistroj – kaj Páleč, Stanislav, Petr de Znojmo kaj Jan Eliáš, por ne devi subigi sin al ĝi, fuĝos el Prago. Tiam Páleč skribos al ceteraj teologoj leteron kun priskribo de la februara kaj ankaŭ de tiu ĉi traktadoj, li fuĝas evidente tiel haste, ke li ne kapablas interkonsiliĝi kun ili rekte; li petas ilin, ke ili la enhavon de la letero sciigu al sinjoroj prelatoj kaj avertas ilin, ke, se ilin oficiale invitus la rektoro, ili ne traktu kun li, kaj li konsilas al ili, ke ili prefere eskapu aŭ kaŝu sin, por ke la invito antaŭ la rektoron ne surprizu ilin. Post Křišť'an estis fine de aprilo elektita rektoro de la universitato Michal Čížek de Malenice, la samregionano kaj amiko de Hus, kaj ankaŭ tiu ĉi elekto sufiĉe aludas pri la situacio en la universitato kaj pri la izoleco de teologoj.

Reĝo Venceslao nomis la kvar fuĝintojn „aŭtoroj de kvereloj“, li ekzilis ilin definitive el siaj landoj, senigis ilin je profesoreco en la universitato kaj forprenis de ili ĉiujn ekleziajn prebendojn. Štěpán Páleč ĝuste tiun ĉi dektrian jaron fariĝis kanoniko de la preĝejo de Ĉiuj sanktuloj en la Praga kastelo, la altan eklezian postenon li longe ne ĝuis. Stanislav de Znojmo foriris ien en Moravion, Páleč kaŝadis sin ie en Bohemio, la postsignoj de du aliaj doktoroj malaperas komplete; el Prago fuĝis al Mělník ankaŭ Ondřej de Brod.

Kaj Hus male revenas en Pragon, la reĝo sur la postenojn de la forigitaj teologoj enpostenigas liajn adeptojn, Brod tion riproĉos al Hus kiel lian personan kulpon kaj Páleč pri tio, ke Hus en tiu ĉi ĉeĥa raŭndo akiris super li superecon, skribos, ke li tion atingis helpe de perforto de sekulara potenco. Historiistoj skribas, ke la reveno de Hus en Pragon havis triumfan trajton, sed verŝajne tio

estas aserto troigita. Pri la interdikto, kvankam Hus eble denove predikas en la Betlehema kapelo, neniŭ kuraĝis eĉ menciŭ, sed Hus jam en julio el Prago denove foriras. Nun eble pli propravole ol laŭ la reĝa ordono. La 21-an de junio li finis la ĉeĥan eksplikon *Pri ses herezoj* kaj mallonge poste li komencis sian misian pilgrimon tra la suda Bohemio.

Li estas denove en Kozí Hrádek, aŭtune li komencos tie skribi *Postilla-on*, ĉeĥan libron de predikoj pri la vivo kaj postlasaĵo de Kristo, en kiu li priskribas ankaŭ la ĵusajn eventojn. Li predikas „inter palisaj bariloj, sub la kasteleto, kiu havas la nomon Kozí, inter vojoj de urboj kaj vilaĝoj“. Laŭ Malnovaj Analoj „en Kozí, en garbejo li servis kaj predikis kaj multaj ĉe liaj predikoj el Ústí estadis“. Verŝajne li ne restadas sur unu loko, li vizitas plej eble ankaŭ sian naskiĝregionon Prachatice, ankaŭ Husinec; li vizitas la hejmon, kvazaŭ li antaŭsentus, ke lia vivomigrado malrapide fermiĝas.

Štěpán Pálež, tre indignita pro la malvenko kaj ekzilo, en sia kaŝejo kritike prilaboras la traktaton de Hus *Pri eklezio* kaj la ceterajn liajn polemikajn verkojn en propra granda verkaĵo *Pri eklezio* kaj en la verko, kiun li nomos *Antihus*. Ilia formo estas pure polemika, Pálež detale citas Hus kaj refutas lin, la teksto eĉ deglitas en skribadon en la dua persono, kiel Pálež Hus senĉese alparolas. En *Antihus* Pálež nomas Hus tre superule kaj ofendeme „Husko“ (t. e. „Anseraĉo“), sed lia fasciniĝo pro Husko estas tiel forta, ke ankaŭ la skemo de lia verko *Pri eklezio* estiĝas spegulforme laŭ la skemo de Hus. La libro de Pálež estas propre bela dokumento de la provoko de racio pro malkonsento kun la motivo de la kontraŭulo. Ankaŭ Pálež en ambaŭ tekstoj laŭ sia vidmaniero priskribas kaj klarigas – sufiĉe demagogie kaj alibisme – la eventojn de la lastaj jaroj. Hus ne plu havas ŝancon la du verkojn ekkoni.

Kiam en Bohemion venas informo pri la kunvoko de la koncilio en Konstanco, Pálež ekĝojas, ke denove komenciĝis lia granda horo. „Fine ja Hus estos deviga al la kapo de la tuta kristanaro fari kalkulon de sia kredo,“ li skribis en la traktato *Pri eklezio*, „kaj koncerne lian longjaran malobeemon kaj predikatajn dogmarojn li devas antaŭsenti timon, se li ne konvertiĝos, de fajropuno.“ Kaj Pálež elprenas el la verkoj de Hus la tezojn, pri kiuj li akuzos lin en Konstanco, la cirklo malrapide fermiĝas, la dramo eniras en la lastan akton. Pálež kun Stanislav ekvojaĝis al Konstanco kiel unuj el la unuaj; valoras rimarkigi, ke Ondřej de Brod ne iras depozicii al Konstanco. Stanislav savos antaŭ la partopreno en la kontraŭhusa kalumniado en Konstanco lia propra morto: li mortis la 11-an de oktobro 1414 survoje al Konstanco ankoraŭ antaŭ la bohemia limo, en Jindřichův Hradec. Kiam venos al Konstanco Hus, Pálež lin jam tie atendas grupiĝinta en akuz-teamo kun Michal de Causis.

En 2005 j. tradukis Jiří Patera

En 6.7.2015 kontrolis Margit Turková

# Majstro Hieronimo de Prago

Oldřich Arnošt Fischer

Lernantoj en Ĉeĥa Respubliko lernas pri Majstro Johano Hus, sed ne multe pri lia amiko Majstro Hieronimo de Prago, kiu ankaŭ, same kiel Hus, estis brulmortigita en Konstanco. Kial? Kaj kiu estis tiu Majstro Hieronimo?

## Enkodigo

Por ke bone ekkomprenu situacion en Bohemio (okcidenta parto de nuna Ĉeĥa Respubliko) en la 15-a jarcento, ni ekrigardu iomete reen.

La 14-a jarcento alportis en Bohemion multe da novaj eventoj. Elmortis hejma dinastio de Premislidoj, kiu regis tie kvar jarcentojn kaj akiris la plej grandan potencon dum reĝado de Premislo Otakaro II (1233? – 1278), kiu estis bohemia reĝo en la jaroj 1253-1278. En la jaro 1306 lasta Premislido, juna reĝo Venceslao III, estis mortigita en moravia urbo Olomouc kaj tiel la dinastio elmortis virlinie.

Nova signifa dinastio, kiu regis super Bohemio, estis Luksemburgidoj. La unua Luksemburgido, kiu fariĝis bohemia reĝo en la jaro 1310, estis Johano de Luksemburgio (1296 – 1346). Li edziĝis kun Elizabeto Premislidino. Karolo IV de Luksemburgio (1316-1378), filo de Johano de Luksemburgio fariĝis granda kaj signifa reĝo (1347), ekde la jaro 1355 eĉ romia imperiestro, kiu prizorgis por benefito de Bohemio. Karolo IV kaj lia edzino Anna de Svidno havis filon Venceslaon. Tiu Venceslao IV (1361-1419) estis la dua Luksemburgido, kiu fariĝis bohemia reĝo (1363). Li estis ankaŭ romia reĝo (1374-1400). Bedaŭrinde Venceslao IV ne estis forta reĝo. Li ŝatis ĉasadojn, modon kaj havis problemojn rilate alkoholon. Li ne interesiĝis pri ŝtataj aferoj kaj dum sia regado li eĉ estis dufoje malliberigita. Unufoje malliberigis lin nobeloj (1394), duafoje lia frato, hungara reĝo Sigismundo (1402).

Sigismundo I de Luksemburgio (1368-1437) estis filo de Karolo IV kaj Elizabeto de Pomerio, hungara reĝo (1387), bohemia reĝo (1420-1422; 1436-1437) kaj romia imperiestro (1433-1437).

Dum la dekkvara jarcento romkatolika eklezio fariĝis la plej riĉa feŭdulo, ĉar ĝi proprietis trionon da kultivejo. Multe da homoj volis fariĝi monaĥoj, pastroj, episkopoj aŭ prelatoj, ĉar la eklezio estis riĉa kaj povis certigi komfortan vivon. Dum la dekkvara jarcento la eklezio morale putriĝis. Multe da romkatolikaj pastroj drinkis alkoholon, ludis riskemajn ludojn kaj ne observante celibaton generis infanojn. Ekleziaj rangoj estis vendeblaj. Kiu pagis, tiu povis fariĝi pastro, episkopo, prelato, kvankam li ne parolis latinan kaj ne estis edukita. Ekzemple praga ĉefepiskopo Zbyněk Zajíc el Házmburk estis analfabeto, kiu eklernis legi nur kiel ĉefepiskopo. Posedantoj de ekleziaj rangoj ne laboris. En preĝejoj anstataŭis ilin reprezentatoj, malriĉaj veraj pastroj. Oni povis aĉeti ne nur rangojn, sed ankaŭ pardonojn de pekoj. Kiam papo bezonis monon, li ekvendis indulgencojn, konfirmojn, ke pekoj estas pardonitaj.

Angla pastro Johano Viklefo (1324? – 1384) dubigis rolon de papo. Sed ankaŭ en nia lando moravia predikanto Johano Milíč el Kroměříž (1320-1325? – 1374) prelegis, ke malbonaj regantoj ne estas honorindaj regantoj, sed nur rabistoj.

Dekadencon de romkatolika eklezio kritikis instruitaj viroj. La plej famaj kritikistoj de malbona romkatolika ekleziestraro estis Johano Milíč el Kroměříž (1320-1325? – 1374), Konrado Waldhauser (1326? – 1369), kiu predikis germane, Mateo el Janov (1350-1394), Johano Želivský (? – 1422), Johano Hus (1371?-1415), Hieronimo de Prago (1378-1380? – 1416), Jakoubek el Stříbro (1375? – 1429), Johano Rokycana (1397- 1471) kaj Venceslao Koranda (? – 1453). Multe da homoj kritikis malbonan ekleziestraron, sed nur mallaŭte. Sudbohemia romkatolika pastro Johano Hus estis kritikanto, kiu ne timis paroli pri dekadenco de romkatolika eklezio laŭte. En Betlehema kapelo en Prago, poste en bohemia kamparo.

**Hieronimo de Prago** (1378-1380? -1416) estis pli juna amiko de Johano Hus. Li naskiĝis en Prago, en strato Řeznická, en malriĉa familio. Lia patro fabrikis pokalojn. Hieronimo bonege kantis kaj gajnis monon por studado kiel ĥora kantisto en pragaj preĝejoj. Li bakalaŭriĝis en la jaro

1398. Danke al Majstro Johano Hus li ricervis monon por sia unua eksterlanda vojaĝo en Anglion.

Li studis en Oksfordo (1399-1401), kie li eksciis verkaĵon de angla reformatoro Johano Viklefo. Kun la verkaĵo li revenis en Pragon kaj donis ĝin al sia amiko Johano Hus. Kiel pia kristano li vizitis Jerusalemon (1403). En pariza universitato Sorbono li majstriĝis en la jaro 1405. Kiel majstro li tri tagojn disputis en Sorbono pri Viklefo. En universitato de Hejdelbergo (1406) li disputis pri Viklefo kvar tagojn. Sed li ne estis kontenta en Hejdelbergo kaj forpasis en Kolonjon super Rejno (1406-1407). En la jaro 1407 li revenis en Pragon, kie li laboris kiel filozofo. En la jaro 1410 li vizitis Hungarion. Li prelegis en urbo Buda, sed estergoma ĉefepiskopo ĵetis al li anatemon. Sama situacio estis en Vieno (1410). Li prelegis ankaŭ en Krakovo (1410), sed devis fuĝi de tie. Oni nenie akceptis liajn prelegojn pri Viklefo.

Kiam en la jaro 1412 studentoj protestis kontraŭ vendado de indulgencoj, Majstro Hieronimo partoprenis en tiuj maltrankvilecoj kiel gvidanto de studentoj. Tial studentoj lin amis. Majstro Hieronimo estis inter studentoj eĉ pli fama ol Majstro Johano Hus! Li estis altstatura viro kun longa, nigra barbo kaj plaĉis al virinoj. Li vizitis ankaŭ Vicebskon kaj Pskovon. Tial li estas fama ankaŭ inter ortodoksaj kristanoj. Lasta vojaĝo kondukis en Konstanco, kie Majstro Hieronimo de Prago estis brulmortigita.

Angla pastro Johano Viklefo jam estis longe morta, kiam Hieronimo alvenis en Oksfordon, sed lia verkaĵo influis ne nur Hieronimon, sed ankaŭ Hus. Majstro Johano Hus trastudis verkaĵon de Viklefo. Li sentis, ke angla pastro pravis.

Jesuo Kristo estis Dia Filo, sed li humiliĝis, por ke savu homaron. Vojo de Jesuo Kristo, kiu portis sian krucon, tre diferiĝis de vojo de roma papo, kiu vivis lukse, vendis indulgencojn kaj eĉ batalis kontraŭ alia papo. Hus demandis: „Ĉu tiu papo estas reprezentanto de Kristo?“

En la jaroj 1402-1413 Majstro Johano Hus predikis en Betleĥema kapelo en Prago. Kredantoj tie aŭdis vortojn: „Riĉaĵo, en kiu eklezio estas dronanta, venenigis animojn preskaŭ de ĉiuj kristanoj. De tio devenas konfliktoj inter papoj, episkopoj kaj aliaj pastroj ! Hundoj interbatiĝas por ostoj. Forprenu la ostojn kaj ili plu ne interbatiĝos!“ Tio estis rekta atako kontraŭ propraĵo de romkatolika eklezio. Kaj malriĉaj homoj diris: „Li pravas!“

Majstro Johano Hus instruis: „Serĉu veron, aŭskultu veron, lernu veron, amu veron, tenu veron, defendu veron ĝis via morto!“ Lia vivo kaj morto atestis, ke li ne estis nur teoriisto.

Kiam papo Johano XXIII volis batali kontraŭ Gregoro XII kaj neapola reĝo Ladislao – unu papo batalis kontraŭ alia papo (!) – li bezonis monon kaj vendis indulgencojn. Tial en Prago ĉeĥoj subgvide de Majstro Hieronimo kaj de Majstro Johano Hus en la jaro temperamente protestis kontraŭ tiu simonio. Majstro Hieronimo gvidis siajn studentojn kaj estis eĉ pli populara inter ili ol Hus. Kelkaj ĉeĥoj eĉ sekrete pisis kaj fekis en papajn kestojn kun indulgencoj. Reĝo Venceslao IV estante koruptita subtenis vendadon kun indulgencoj, tial li ekpersekutis Hus.. Majstro Johano Hus devis forlasi Pragon kaj predikis en vilaĝoj.

## **Hus en Konstanco**

Papo Johano XXIII invitis Hus en konstancon koncilion. Vane amikoj Hus avertis. La 11-an de oktobro 1414 Majstro Johano Hus ekiris en Konstancon, kie li volis defendi siajn opiniojn. Reĝo Sigismondo I donis al li antaŭ la vojaĝo leteron, promesante en ĝi liberecon. Sed en Konstanco estis ankaŭ 3 patriarĥoj, 23 kardinaloj, 27 ĉefepiskopoj, 106 episkopoj, 343 universitataj majstroj, 28 reĝoj kaj dukoj kaj 676 nobeloj kaj kavaliroj. Grandega supernombro kontraŭ unu ĉeĥa pastro! Hus estis baldaŭ en Konstanco malliberigita. En la koncilio Hus estis proklamita herezulo.

En katolika eklezio ĉiam estis homoj, kiu serĉis proprajn vojojn. La eklezio longe nur admonis ilin. La unua brulŝtiparo ekflamis jam en la 13-a jarcento. Vere ekleziestroj en Konstanco ne volis mortigi Hus. Ili volis devigi lin al revoko de liaj opiniojn. Sed en Konstanco estis ankaŭ ĉeĥaj malamikoj de Hus, precipe Miĥalo de Causis, Stefano el Pálež, Venceslao de Thiem el Mikulov, kiuj atakis Hus pli malbone ol la koncilio.

Hus povis savi sian vivon. Li povis revoki siajn opiniojn. Sed ĉu li povis perfidi homojn, kiuj amis lin kaj kredis al li? La 6-an de julio 1415 Majstro Johano Hus estis senpastrigita antaŭ brulmortigado kaj brulmortigita. Malbona ekleziestraro mortigis Hus, sed ne povis mortigi liajn



ideojn.

### **Hieronimo de Prago en Konstanco**

Majstro Hieronimo de Prago volis helpi al sia amiko Hus. Kvankam Hus avertis lin, Majstro Hieronimo aperis en Konstanco la 4-an de aprilo 1415. Post kvin tagoj li fuĝis kaj revenis hejmen. Sed en aŭstra gastejo en vilaĝo Hirŝaŭ li parolis pri Viklefo. Tial li estis kaptita kaj en ĉenoj transportita reen en Konstancon. Ekde la 23-an de majo li estis en malliberejo en teruraj higienaj kondiĉoj. La 11-an de septembro 1415 li revokis siajn opiniojn. Sed la 26-an de majo 1416 li revokis sian revokadon kaj diris, ke li volas morti kiel Hus.

La 30-an de majo 1416 estis ĉeĥa filozofo Majstro Hieronimo de Prago brulmortigita.

Baldaŭ martiroj, Majstro Johano Hus kaj Majstro Hieronimo de Prago, estis adorataj ne nur en Bohemio, sed ankaŭ eksterlande.

### **Post morto de Hieronimo de Prago**

Konstanca koncilio solvis problemon de la ŝismo. Papo Gregoro XII abdikis. Papo Benedikto XIII estis eksigita. Papo Johano XXIII estis malliberigita en tiu sama prizono, kie antaŭe suferis Hus, kaj poste mortigita. Kiel nova papo estis elektita Marteno V. Tiu nova roma papo estis granda malamiko de husanoj.

En la jaro 1415 bohemiaj nobeloj sendis al papo protestan leteron kun 452 sigeloj. Ili protestis kontraŭ brulmortigado de Hus. Sed la papo ne respondis. En la jaro 1417 majstroj de Karola Universitato en Prago subtenis utrakvismon. Sed la papo volis sendi krucmilitiron, kiel kontraŭ iuj paganoj, en Bohemion. Kontraŭ kristana eŭropa lando!

Praganoj renkontiĝis en Templo de la Virgulino Maria la Neĝa en Prago. Tie predikis eksmonaĥo kaj nova radikala predikanto Johano Želivský. Reĝo Venceslao IV volis eviti maltrankvilojn en Prago. Li instalas en urbodomon novajn urbodomanajn. La 30-an de julio 1419 praganoj subgvide de Johano Želivský malsuprenĵetis reĝajn urbodomanajn el fenestroj de urbodomo – husana revolucio komenciĝis! Venceslao IV mortis per apopleksio.

Simbolo de husanoj estis pokalo, simbolo de utrakvismo. Tio signifas, ke ne nur pastroj, sed ĉiuj kredantoj povas preni sangon de Kristo. Programo de husanoj estis proklamita kiel Kvar pragaj artikoloj. Husanoj postulis liberecon de kredo, utrakvismon, forprenon de posedaĵo de eklezio kaj egalecon de ĉiuj pekantoj.

Husanoj atendis alvenon de Jesuo Kristo en februaro 1420. Kiam neniu alvenis, husanaj predikantoj diris: „Tio signifas, ke ni devas eliri renkonte al Jesuo Kristo!” Multe da homoj forlasis siajn vilaĝojn kaj fariĝis batalantoj de la Dio, soldatoj de popola armeo, kiu 14 jarojn estis nevenkebla.

Kiam papo Marteno V la 1-an de marto 1420 deklaris krucan militiron kontraŭ ĉeĥoj, Sigismondo ekvidis sian ŝancon fariĝi ĉeĥa reĝo. Li volis konkeri Pragon, sed ne kalkulis kun spontana husana movado.

Jam kelkaj jaroj loĝis en Prago sudbohemia nobelo Johano Žižka de Trocnov (1365? – 1424), sperta gerilano, kiu fariĝis militestro de husanoj.

La 30-an de marto 1420 husanoj fondis urbon Tábor, kiu fariĝis simbolo de la revolucio, super rivero Lužnice en suda Bohemio.

En somero de la jaro 1420 grandega kruckavalira armeo subgvide de reĝo Sigismondo volis ataki kaj konkeri Pragon. Tamen ĉeĥojn en tiu tempo jam ne gvidis malforta reĝo Venceslao IV, sed nevenkebla husana militestro Johano Žižka de Trocnov.

### **Literaturo**

AŬTORA KOLEKTIVO: Bible. Pismo svaté Starého a Nového zákona (včetně deuterokanonických knih). Ekumenický překlad. 3-a eldono, Český Těšín, Česká biblická společnost 1993, 283 paĝoj.[*Biblio. La Malnova kaj Nova Testamentoj kun la Duakanonaj Libroj; ĉeĥe*]

AŬTORA KOLEKTIVO: Biblio. La Malnova Testamento tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof kun la Duakanonaj Libroj tradukitaj de Gerrit Berveling. La Nova Testamento tradukita de la Brita Komitato (John Cyprian Rust, B. John Beveridge, C.G.Wilkinson). 1-a eldono, IKUE kaj

- KELI, Dobřichovice, Kava-Pech 2006, 1375 paĝoj. [*esperantlingve*]
- HORA-HOŘEJŠ, P.: Toulky českou minulostí. 2-a volumo, 2-a eldono, Prago, Baronet 1995, 454 paĝoj. [*Vagado tra ĉeĥa paseo; ĉeĥe*]
- HUS, J.: Postilla. Vyloženie svatých čtení nedělních. 1-a eldono, Prago, Komenského evangelická fakulta bohoslovecká 1952, 516 paĝoj. [*Postilo. Eksplikoj de la sanktaj dimanĉaj legadoj; malnovĉeĥe*]
- HUS, J.: Dcerka. O poznání cesty pravé k spasení. 2-a eldono, Prago, Kalich 1995, 68 paĝoj. [*Filineto. Pri ekkonado de vera vojo al savo; ĉeĥe*]
- KAROLO IV: La propra biografio de Karolo la Kvara. 1-a eldono, Dobřichovice, Kava-Pech 1995, 87 paĝoj. [*esperantlingve; latinan tekston „Vita Caroli“ esperantigis Josef Vondroušek*]
- PEKAŘ, J.: Dějiny československé. 2-a eldono, Prago, Akropolis kaj Agentura Tip Š 1991, 180 paĝoj. [*Ĉeĥoslovaka historio; ĉeĥe*]
- ROBERTS, J.M.: Dálný Východ a nová Evropa. Ilustrované dějiny světa, 5-a volumo, 1-a eldono, Prago, Euromedia Group, Knižní klub kaj Balios 1999, 192 paĝoj. [*Ekstrema Oriento kaj nova Eŭropo. Ilustrita historio de la mondo; ĉeĥe*]
- ŠMAHEL, F.: Život a dílo Jeronýma Pražského. Zpráva o výzkumu. 1-a eldono, Prago, Argo 2010, 390 paĝoj. [*Vivo kaj verko de Hieronimo de Prago. Raporto pri esploro; ĉeĥe*]
- TICHÁ, Z.: Cesta starší české literatury. 1-a eldono, Prago, Panorama 1984, 304 paĝoj. [*Vojaĝo de malnova ĉeĥa literaturo; ĉeĥe*].